

han riner

(Han Ryner)

★ **la kvina
evangelio**

el la franca originalo
tradukis R. Laval (Valo)

Traduko kontrolita de E. Lanti.



La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut

Noto de la tradukinto.

Han Ryner (Henri Ner, 1864-1938) publikigis en 1910 sian libron - unu el siaj majstroverkoj - "Le Cinquième Evangile". De tiam, pluraj eldonoj elĉerpiĝis, nova estas nun en preparo.*

Mi tradukis ĝin unue en la jaroj 1930-1935. Han Riner estis lerninta esperanton, sufiĉe por almenaŭ ĝin legosci. Foliumente mian unuan provtekston, li bonvolis skribi al mi, ke li trovis ĝin "fidela kaj supla", kaj afable permesi eventualan publikigon.

Tiun manuskripton poste plene tralegis Lanti. Li ĝin komparis, frazon post frazo, kun la franca originalo, helpis min per altvaloraj sugestoj kaj konsiloj, kaj varme rekomendis publikigon.

Post korektado mi submetis ĝin al kontrolo de la Literatura Komitato de SAT.

Fine, pro tiamaj malfavoraj cirkonstancoj, ne rezultis praktika sekvo.

Forpasis jaroj kaj jardekoj. Mortis Han Riner kaj Lanti. Pasis sur la mondo la kvinjara terura katastrofo - sekvita de kelkaj aliaj. Dume perdiĝis la unua manuskripto. Sed mi daŭre pensis pri la iama projekto, kaj konservis en memoro la kritikojn kaj konsilojn.

Fine mi rebakis la tradukon, penante plisupligi ĝin, imite al la neimitebla stilo de la aŭtoro, kaj enkondukante kelkajn neologismojn intertempe akceptitajn en P.V.-aldono aŭ almenaŭ en PIV.

Tiun lastan tradukon mi kuraĝas nun liveri al la esperantistaj legantoj. Ili strebu eltrovi, tra la mallertaĵoj de la traduka vesto, la mirindan belecon de la originalo.

Ankoraŭ kelkajn vortojn.

Iuj riproĉis, ke en ne malmultaj lokoj mi deflankiĝis de la teksto de la Londona Biblio. Al tiuj mi respondas :
1 - En pluraj kulturlingvoj, ekz-e la franca, aperis diversaj versioj de la Biblio. Inter tiuj diversaj versioj (eĉ inter tiuj, kiuj estas pli-malpli oficialigitaj de unu sama kristana eklezio) estas rimark-

eblaj diferencoj, multaj en vortoj kaj formo, kelkaj eĉ en senco kaj fundo.

2 - Han Riner ne estas unu el tiuj teologoj, kiuj pretendas liveri version plej konforman al iu eklezia dogmo aŭ al la "vera" Revelacio : li ja celkonscie faris originalan verkon kaj proponis propran mesaĝon.

Al tiu Rinera verko, ne al iu "oficiala" Nova Testamento, mi penis esti kiel eble plej fidela.

* 2 eldonoj en la franca originalo, kaj unu en plano;
2 en hispana, 1 en portugala traduko.

Ĉapitro I.

Pluraj priskribis aferojn, kiujn ili trovis en sia koro, sed ili kredis, ke aliaj vidis tiujn aferojn per la okuloj de l'korpo, aŭ ilin aŭdis per karnaj oreloj;

Tial ankaŭ mi, ho mia animo el amo kaj revo, ekvolis meti laŭ ordo tion, kion ci scias, post ekzakta informiĝo pere de ci.

Kaj, ĉar la memoro pri Jesuo, fluida kaj flirtanta kiel fantomo, ricevis la formojn sinsekvajn de poetoj, kiuj sin kredis historiistoj,

Ĝi do ankoraŭ akceptos la formon de revulo, kiu ja scias, ke lia revo estas revo.

Ĉar ci, ho Jesuo, estis kruda miraklisto kiel la ambicio de tiu, kiun nia nescio nomas Marko,

Kaj ci lude pereigis, en akvo mirigita, gregon de dumil porkoj.

Kaj ci estis, laŭ la vanteco de tiu, kies nomo ne estis Johano, la metafizikisto kaj predikanto pri ci mem.

Ci estis krome la akra poeto de l'malamo al riĉuloj, kiam, por kribi sian prematecon kaj sian venĝosoifon, la Greko, kiun ni senceie nomas Luko, surmetis, kvazaŭ maskon, kiu pligrandigas la buŝon kaj plilaŭtigas la voĉon, la tragikan belon de cia vizaĝo.

Sed ci fariĝis saĝulo de interna vivo, mildo kaj kompatemo, kiam cia fuĝanta formo estis skulptita en la noble naivaj manoj de la false nomita Mateo.

Nu, sur ebenaĵoj aŭ ĉe lagobordoj, tiuj tre laŭte proklamadis la evangelion de l'frenezo malama, la evangelion de l'frenezo mistika, la evangelion de l'frenezo, kiu vokas kaj akceptas miraklojn;

Aŭ iafoje, sur la monto, ili balbutis ciajn unuajn vortojn, Evangelio de ĝoja malriĉo, sinforĝesemo kaj amo.

Sed tro ofte, laŭ vojetoj de trokredemo, ili kondukis Jesuon sub ĉielojn apertiĝantajn, sub voĉojn de alte falantajn, sur teatrolumajn Tabormontojn;

Kaj ili faris el li Profeton, Kriston, Dian parolon;

Kaj, en la sekvo de l'tempoj, aliaj, pli malsaĝaj, faris el li Dion.

Tial mi cin vokas, ho filo de homo, al nova supreniro. Por ke, en la sincera helo de l'suno, ci iru al reala supro, kaj fine ci fariĝu, ho Filo de Homo, Homo.

En la tempo de Herodo, reĝo de Judio, kaj en la postaj tempoj, pluraj, sin proklamante mesioj, t.e. kristoj, logadis la popolon al dezerto, al ribelo kaj al perforta morto sub la batoj de l'Romianoj.

Kaj, kiel iam la Hebreoj sin gloradis pri la venkoj de kristo Saulo, la venkoj de kristo Davido kaj la venkoj de kristo Ciro,

Aŭ kiel ili ĝojis pro la gloro de kristo Salomono kaj la laboroj de kristo Zorobabelo,

Tiel ili nun metis siajn esperojn en iun profeton venintan el Egiptio, aŭ en kriston Teŭdason, aŭ en kriston Judason el Gamalo, kiu post ili sin levis en la tempo de l'nombrado.

Sed, kiam la profeto el Egiptio altiris ilin sur la Monton Olivarban, promesante, ke lia voĉo faligos la murojn de Jerusalemo,

Tiam venis la Romianoj, kiuj mortigis kvarcent virojn el la popolo kaj forkondukis ducent kaptitojn, kaj la profeto el Egiptio forfuĝis, kaj neniu aŭdis plu pri li.

Sed, kiam kristo Teŭdaso altiris grandan amason al la bordoj de Jordano, anoncante, ke la tago de la Eternulo estas baldaŭ,

Tiam venis la Romianoj sur siaj batalĉevaloj, kaj ili detranĉis la kapon de kristo Teŭdaso, kaj ili ĝin kunportis al Jerusalemo.

Sed, kiam kristo Judaso el Gamalo delogis la Galileanojn, instruante ilin ne elporti alian mastron ol Dion, rifuzi impostpagon al Romianoj kaj ne submeti sin al nombrado,

Tiam la Romianoj venis en Galileon, kie ili dispelis tiujn, kiuj estis kun li.

Nu, multaj aliaj sorĉistoj ribeligadis la popolon kaj ĝin kuntrenadis al solejoj, promesante signojn en la ĉielo, kaj ke la Eternulo, ilia dio, baldaŭ liberigos ilin el la serviteco;

Sed jen venis la Romianoj, kiuj faris grandan amasbuĉon, dispelis la multhomaron kaj mortigis la sorĉistojn kaj la profetojn.

Kaj la popolo daŭre aŭskultadis tiujn, kiuj venis al ĝi dirante : Mi estas la Kristo.

Ĉar estas skribite : La scepro ne eliĝos el Jehudo kaj la komando ne eliĝos el lia posteularo, ĝis venos

la Kristo.

Nu, la sceptro estis eliĝinta el Jehudo por aliĝi al Herodo, Edomido.

Tial ĉiuj kredis, ke la Kristo estas aperonta en tiuj tagoj.

Eĉ kelkiuj diris pri Herodo, kiu restarigis la templon kaj la gloron de la Eternulo, ke li estas la Kristo.

Sed la popolo malamis Herodon tial, ke li estis Edomido, ke li estis amiko de la Romianoj, kaj ke li enkondukis ĝis la pordoj de l'Templo la abomenaĵon de la bildoj kaj agloj.

Kaj la espero de l'popolo kreskadis kun ĝia mizero kaj ĝia esperbezono;

Ĉar ĝi estis pli ol iam ajn humiligata de la Edomidoj kaj premata de la Romianoj.

Kaj en kelkiuj la espero fine maltrankviliĝis, incitigis kaj sin ŝanĝis en furiozon;

Nu, tiuj sin nomis Zelotoj, kaj, kaŝante tranĉilojn sub siaj vestoj, ili frapis, meze de amaso aŭ en solecaj lokoj, tiujn, kiuj obeadis la Romianojn prefere ol la Leĝon de la Eternulo.

Kaj en ĉiuj landoj de Judio kaj Galileo estis la perioda frenezo, kiu vokas savonton, kaj esperas, kaj sin manifestas per subtilaj rezonadoj, per dankokantikoj, per incitaj krioj kaj perfortaj gestoj.

En tiu tempo estis pastro nomita Zeĥarjo, el Abia familio; kaj lia edzino estis Elizabeta, el Aarona familio.

Ili estis justaj antaŭ Dio kaj antaŭ la homoj; kaj ili marŝadis laŭ ĉiuj ordonoj de l'Sinjoro en neriproĉebla maniero.

Infanojn ili ne havis, kaj komencis ne plu esperi, ĉar ili troviĝis ĉe la bordo de maljuneco, kaj Elizabeta estis rigardata kiel ne naskipova.

Sed, tiun matenon, Elizabeta diris al Zeĥarjo vortojn, kiuj jam ridetas kaj ankoraŭ hezitas;

Kaj tiun saman tagon la loto destinis Zeĥarjon eniri en la templon kaj oferi la parfumojn: li kredis, ke tiu renkontiĝo de cirkonstancoj estas signo.

Nun la tuta multego de l'popolo estis ekstere preĝanta, en la horo, en kiu estas oferataj la parfumoj;

Kaj Zeĥarjo, sola, ĉirkaŭvolvata de bonodoraj nuboj, tremis de espero. Sed, kiel okazas ĉe maljunuloj, en lia

espero kuntremis ia timo.

Nu, en la incensonubo li kredis vidi esperajn vizaĝojn, sed li sentis la timon leviĝi el lia koro.

Kaj la paroloj de la ĝojo, kiun li ne kuraĝis akcepti, ŝajnis al li, kvazaŭ ili eliĝus el la buŝoj kaj ridetoj, ĉiumomente aperantaj en la fumo kaj malaperantaj.

Sed li respondis dubojn kaj maltrankvilojn; kaj tio estis kvazaŭ dialogo inter timanta justulo kaj anĝelo de l'Sinjoro, kiu trankviligas tiun justulon.

Li diris al si mem, preskaŭ kredante, ke parolas iu figuro en la nubo : Ne timu, Zeĥarjo, ĉar la preĝo, kiun ci jam ne kuraĝis adresi al la Eternulo, jen ĝi estas plenumita;

Elizabeta, cia edzino, naskos al ci filon; kaj en realo kiel en ciaj preskaŭ forgesitaj revoj, ci nomos lin Johano.

Li estos por ci kaŭzo de ĝojo kaj ravo; kaj pluraj ekĝojos pro lia naskiĝo. Kaj eble li estos tiu, kiu esti ci mem estus dezirinta en la sekreto de cia koro.

Eble li estos granda antaŭ la Sinjoro. Tial konsekre lin. Promesu por li, ke li nek vinon nek bieron trinkos. Eble lin plenigos la spirito jam en la ventro de lia patrino.

Eble li konvertos plurajn el la idoj de Izraelo al la Sinjoro, ilia Dio.

Eble li marŝos antaŭ la Eternulo en la spirito kaj la virto de Elijo; li unuigos per vero kaj amo la korojn de la patroj kaj la korojn de la infanoj; li rekondukos la malsaĝajn kaj la maljustajn al la saĝo de la justaj, kaj li preparos la vojojn de la Eternulo.

Sed iafoje Zeĥarjo fermis la okulojn, kaj li malsupreniĝis en la mallumajn profundojn de sia koro, kaj li estis terurita blindulo palpe stumblanta meze de arbaro en la tremado de la elrevigoj de tuta vivdaŭro.

Tiam li diris al si : Mi estas tro maljuna por vidi tiujn aferojn. Kaj, se mi sufiĉe longe vivus, eble mi vidus aferojn malajn.

Tiel li ne sciis ĉu, elirinte el la templo, li diros al sia edzino kaj al siaj amikoj siajn esperojn, aŭ ĉu li diros al ili siajn timojn.

Li do diris al si : Sur mia loko, prudenta homo diros nek siajn necertajn esperojn, nek siajn malklarajn

timojn; sed, konfidante sin al la Sinjoro, li atendus en silento.

Kaj denove ŝajnis al li, ke li vidas la anĝelon en la incensa fumo kaj aŭdas lin diri : Kiu ne konas la veron de sia koro, tiu fariĝu simila al mutulo, ĝis li konos la veron de sia koro.

Dume li malfruĝis en siaj pensoj multe trans la tempo necesa por lia deĵoro. Kaj la popolo miris, ke li restas tiel longatempе en la templo.

Kiam fine li eliris, konfuzite de sentoj diversaj, li estis tro fora de alies pensoj kaj li ne parolis; sed, kvazaŭ li estus muta, li respondis al tiuj, kiuj lin alparolis, per indiforentaj kaj- aŭ mangestoj.

Kaj li ŝanceliĝe marŝis, kiel homo trinkinta tro da nova vino aŭ tro da nova penso.

Tial pluraj imagis, ke li ricevis vizion, kaj ke, por puno ĉar li ne kredis sufiĉe frue, la anĝelo de la Eternulo lin mutigis.

Kiam finiĝis la tagoj de lia pastra servo, li revenis en sian domon.

Kaj lia edzino ĝoje diris al li : La Sinjoro min favoris, kaj li ĵetis la okulojn sur sian servistinin, kaj li min elŝiris el la hontego, en kiu mi sidis inter la homoj.

Sed Zeĥarjo rigardis Elizabetan. Kaj ŝi ne divenis, kion signifas la rideto de lia silentanta buŝo.

Nu, la silento de Zeĥarjo estis akvo en kiu, ĝin malklarigante, agitiĝas tro multaj interkontraŭaj sentoj. Kaj pluraj daŭre lin kredadis muta.

Ĉapitro II.

En urbo Galilea nomita Nazareto estis virgino fianĉinigita al maljunulo nomita Jozefo; kaj tiu maljunulo estis ĉarpentisto kaj tiu virgino havis nomon Maria;

Nu, ŝi malgajis esti fianĉino de maljunulo kaj, en la sekreto de sia koro, ŝi revis pri grekrasa centestro, nomita Pantero, kiu estis juna kaj bela.

Ankaŭ Pantero estis rimarkinta Marian inter la virginoj de la urbo, kaj lia penso ŝin sekvadis ĉie.

Ofte li mem ŝin sekvis de malproksime; sed ŝi rest-

adis meze de siaj kunulinoj, kaj neniam li trafis okazon paroli al ŝi.

Iun vesperon, envolvide en nubo el malgajo kaj revoj, forgesante pri la nunaj estaĵoj kaj la nunaj aferoj, Maria malfruiĝis ĉe la fontano post foriro de la ceteraj virinoj.

Kaj Pantero, veninte al ŝi, diris : Mi salutas cin, ho plena de gracio kaj belo. Mia koro estas ĉiam kun ci kaj la vortoj de mia spirito cin benas inter ĉiuj virinoj.

Maria, ekvidinte Panteron, estis konfuzita de lia parolo. Kaj, metante sur sian ŝultron la plenigitan urnon, ŝi volis foriĝi.

Sed Pantero staris kontraŭ ŝi, kaj, etendante la brakojn, li fermis la vojon.

Tiel, ke Maria ne havis plu la forton malobei sian koron; sed, kun tremo en la gamboj, ŝi teren metis la urnon, kaj atendis.

Pantero diris : Ho Maria, ne tremu, ĉar mi cin amas el fidela koro kaj mi cin deziras por edzino mia.

Kaj Maria demandis : Kiel tio estus ebla, dum cia raso malamas mian rason, kaj mi estas fianĉino ?

Pantero respondis : Mi ne estas el tiuj frenezuloj, kiuj konas malamon.

Mi fariĝis soldato por komplezi al mia patro, kiu estas riĉa komercisto en Cipro kaj fieras, ke mi surmetis orumitan armaĵon.

Tamen miaj manoj restis puraj je sango. Mi estas en ĉi tiu lando de mallonga tempo kaj mi ne kontraŭbatalis cianjn sampopolanojn.

Nu jen : Mi ĉesos esti militisto kaj ni kune foriros, edzo kaj edzino, al la insuloj, kie ridetas feliĉo.

Sed ŝi rediris : Mi estas fianĉino.

Tiam Pantero ŝin demandis : Aŭdacu diri, ke ci amas cian fianĉon, kaj mi foriĝos en larmoj, respektante cian volon kaj cian amon.

Maria hezitis kelkajn momentojn. Kaj ŝi tuta tremis, ĉar en ŝia koro okazis granda batalo.

Fine ŝi diris : Mi amas mian fianĉon tial, ke li estas mia fianĉo. Oni faris por mi promeson, kaj mi ĝin plenumos.

Sed Pantero asertis : Krime estas promesi por iu alia. Kaj alies krimo estas liga por ci nur en la okazo, se

cia koro estas malkuraĝa.

Kaj estas malsaĝe promesi, ke juna virgino amos maljunulon.

Do, se kuraĝa estas cia koro, ĝi, forpuŝante alies mensogon kaj malsaĝon, sin allasu al propra saĝo kaj vero.

Nu Maria ne respondis per paroloj, sed ŝiaj okuloj venkitaj verŝis larmojn.

Kaj Pantero reparolis : Se la vortoj el cia buŝo volas trompi min, kial ciaj okuloj ploras ? Aŭ kial cia buŝo ne parolas la tutan veron, nun kiam ĝin sciigis al mi la larmoj el ciaj okuloj ?

Poste, prenante la manon de Maria, li sin klinis kaj kisis ĝin.

Sed, milde retirante sian manon, ŝi diris : Kion ci postulas de mi ? Mi ne volas mensogi al Jozefo, nek al iu ajn.

Li diris : Ci ne mensogos. Ĉar ni foriros al la insuloj sur la maro; mi cin prezentos al mia patro kaj ci estos mia edzino.

Maria diris : Ci ne estas Izraelido.

Kaj Pantero respondis : Mi estas homo kaj ci estas homino.

Li diris ankoraŭ : Saĝo volas, ke oni obeu sin mem, ne aliajn. La inklino, kiu estas en cia koro, jen estas cia patrio kaj cia leĝo.

Kaj Maria respondis : Justo volas, ke mi estu mastro de mi. Ĉar, se neniu estus mastro de si, kiel iu estas mastro ? Justo volas, ke mi obeu nur al mi kaj al tiu, kiun mi amas.

Tiel Pantero revis pri saĝo, kiu liberigas de la homoj, de la patrio kaj de la leĝo; kaj Maria revis pri justo, kiu liberigas de la leĝo, de la patrio kaj de la homoj.

Tial ili kunigis siajn lipojn en la soleco, kie Dio estas justo, saĝo kaj amo, for de l'homoj, kiuj certigas, en la nomo de Dio, leĝojn de maljusto, malsaĝo kaj malamo.

Kaj plurfoje ili rekuniĝis, apud la fontano aŭ en aliaj sekretaj lokoj.

Kaj ili kredis, ke neniu scias pri iliaj renkontoj. Sed kelkaj el iliaj paroloj estis aŭditaj de iuj Zelotoj.

Kaj, ĉar Pantero estis prononcinta en juda lingvo la

nomon de l'Sinjoro kaj la nomon de la Leĝo, ili ekde tiam lin rigardis kiel Judon.

Kaj ili volis surprizi lin solan por proponi al li elekton inter cirkumcido kaj morto.

Iun vesperon, kiam la geamantoj estis kune, en malgranda distanco de la urbo, Maria diris al Pantero : Jen, mi sentis mian ventron tremeti.

Kaj mi estas penetrita de granda timo. Ĉar saĝo kaj justo liberigas la korojn, sed ili ne liberigas la korpojn. Kaj ĉi tiun teron regas ne saĝo aŭ justo, sed ja la leĝo kaj ĝia tiraneco.

Nu la leĝo ordonas, ke adultan fianĉinon frapu ŝtonoj de l'popolo ĵetitaj, kaj ke ŝi mortu sub la ŝtonoj, kune kun sia frukto.

Sed Pantero respondis : Ho graciplena, mia amo cin benas inter ĉiuj edzinoj kaj ĉiuj patrinoj, kaj la frukto de cia interno estas benita per la paroloj de mia espero.

Jam morgaŭ, mi faros la necesajon por ne esti plua soldato. Kaj mi cin kondukos al Cezareo. Kaj, enŝipiĝinte, ni veturos al la maraj insuloj kaj al feliĉo.

Poste li rekondukis la amatinon ĝis la pordego de Nazareto.

Kaj li mem ne eniris en la urbon, tial ke lia koro estis tro plena kaj kantanta. Sed li marŝis sur la kamparo kaj en la silento por aŭdi sian koron kanti.

Nu lia koro kantis plej ofte per vortoj, kiuj ne movas la lipojn, sed iafoje per vortoj duonvoĉe prononcataj.

Kaj la kanto de lia koro diris : Jen. Mi edukos la filon elvenontan el Maria kaj mi. Inter siaj gepatroj li grandiĝos laŭ aĝo, verkoj kaj scioj.

Komence lia spirito similos al la spirito de Maria. Ĝi leviĝos, kvazaŭ monto el justo, ĝis la fulmotondra regiono, tute bruega de tondroj, tute disŝirata de fulmoj.

Poste ĝi plu supreniros. Ĝi transpasos la fulmotondran regionon. Ĝi atingos la altojn, en kiuj nenio malklarigas la lumon; ĝi estos supro de saĝo kaj kvieto.

Kaj eble, ĉar justo kaj ties tempestoj daŭre tondrados laŭlonge de lia deklivo, li pli valoros ol aliaj saĝuloj. Kaj, ĉar li konos saĝon kaj ties serenecon,

li estos pli bela ol aliaj justuloj.

Pantero marŝis envolvite en sia ĝojkantiko kiel en nuba gloro; kaj li ne vidis, kio okazas ĉirkaŭ li.

Sed subite, antaŭ li staris viro, kiu diris al li : Ci delogis virginon el nia popolo. Kaj ni cin aŭdis prononci la nomon de l'Sinjoro kaj paroli pri la Leĝo.

Do ci estas Judo, kaj se ci ne observas ĉiujn ordonojn de la Leĝo, ci meritas morton.

Tial mi diras al ci : Elektu ĉu esti cirkumcidota, ĉu morti.

Pantero respondis : Mi delogis neniun virinon; sed tiu, pri kiu ci parolas, estas la edzino de mia koro kaj de mia vivo.

Koncerne la leĝon, ĝi ŝajnas al mi tiel malsaĝa, kiel tiuj de Likurgo, de Solono aŭ de Cezaro. Ĉar ĉiu skribita leĝo estas malsaĝaĵo; ankaŭ ĉiu religia ceremonio.

Kaj mi rifuzas esti Judo, same kiel mi rifuzas esti Greko aŭ Romiano.

Sed, estante homo, mi estas civitano de l'mondo, frato de ĉiuj homoj kaj filo de l'Diaĵo, ĉu ĝi estas unika, ĉu multopa.

Tiam la Zelotoj ekkriis : Li blasfemis. Kaj, sin ĵetante sur lin ĉiuj kune, ili murdis lin.

Kiam Maria eksciis pri la okazo, ŝi leviĝis kaj iris en granda hasto al montarlando, en urbon de l'Jehuda tribo.

Kaj, enirinte en la domon de Zeharjo, ŝi salutis Elizabetan, kiu estis parencino ŝia.

Kaj, tuj kiam ŝi estis sola kun Elizabeta, laŭtigante la voĉon, ŝi ekkriis : Benita ci estas kiel la plimultaj el la edzinoj, ci kiu vidas cian edzon viva; kaj benita estas la ido, kiun ci portas, ĉar ĝi konos sian patron.

Sed mi, malfeliĉa, mi fidis. Kaj la promesoj, kiujn mi fide aŭskultis, ne estos plenumitaj.

Ĉar tiu, kiu parolis, estis sincera, sed jen li mortis, kaj restas nur al mi morti.

Dum parolis Maria, Elizabeta sentis sian idon tremeti en ŝia ventro, kaj ŝin plenigis kompatema spirito.

Kaj ŝi diris : Ho Maria, niaj animoj ĉiam gloradu la Sinjoron.

Kaj niaj spiritoj ĝojadu en Dio, nia Savanto.

Li rigardas per okuloj de kompto la humiligon de siaj

servistinoj. Kaj eble li volas, ke la estontaj tempoj nomu nin beataj.

Ĉar li faradas grandaĵojn ĉe la malgranduloj. Ofte, por verko de gloro, li vokas per ilia nomo, jam antaŭ ilia naskiĝo, tiujn, kiuj ŝajnis ne venontaj.

Li fekundigas la senfruktajn kaj li savas tiujn, kiuj sin kredis perditaj.

Kaj Maria restadis kun ŝi ĉirkaŭ tri monatojn. Poste, reakirinte ian fidon, ŝi reiris en sian domon.

Nun, ĉar venis la templimo de Elizabeta, ŝi naskis filon.

Vidante, ke la Sinjoro ekbriligis sur ŝin sian korfavoron, ŝiaj najbaroj kaj parencoj ekĝojis kun ŝi.

Kaj, la okan tagon, kiam endis la infanon cirkumcidi, ili volis nomi lin Zeharjo, laŭ la nomo de lia patro.

Sed Zeharjo ekparolis, dirante : Johano estas lia nomo.

Nu ĉiuj ekmiris, ĉar ili aŭdis paroli tiun, kiun de longa tempo ili kredis muta.

Ĉar ili ne sciis, kia intermiksiĝo de espero kaj timo nodis lian langon, kaj ke, same kiel leviĝanta suno dispelas la nebulojn kaj triumfigas la lumon, la ekvido de la infano dispelis la timon kaj triumfigis la esperon.

Kaj la miro de l'tie-estantoj igis ilin atendi multaĵojn de la infano, kiu jam estigis tiajn mirindaĵojn.

Sed Zeharjo, rigardante la infanon, trinkis per la okuloj la vinon kaj varmon de la espero. Kaj li laŭta-voĉe laŭdis la Sinjoron, dirante :

Benita estu la Dio de Izraelo tial, ke li vizitis min en mia maljunaĝo.

Ĉar laŭ multaj signoj ŝajnas, ke la tempoj estas proksimaj, kaj tamen mi estas tro maljuna kaj malfortiĝinta por ilin vidi.

Sed ci, infaneto, eble vidos ilin;

Aŭ, almenaŭ, ci preparos ilin de pli proksime. Kaj, se ci ankoraŭ ne havos la ĝojon de la liberiĝo, ci havos malgrandiĝantajn timojn kaj grandiĝantajn esperojn.

Ĉar, kiam la nokto estas baldaŭ finiĝonta, la birdoj de l'ĉielo, ankoraŭ ne vidante la sunon, jam ekĝojas tial, ke la suno baldaŭ venos.

Kaj ci, infaneto, pli feliĉa ol cia patro, eble vidos la sunon, aŭ ci tremetos pro ĝia proksimiĝo.

Kaj eble, en la finiĝanta mallumo, ci estos unu el la lastaj torĉoj; kaj ci kondukos kelkajn pasantojn sur la vojo al paco.

Nu, la infano kreskis kaj spirite plifortiĝis. Kaj, kiam li atingis la aĝon de dek tri jaroj, li enprofundiĝis en la dezerton por interparoli sol-al-sole kun Dio kaj atendi la tempon, kiam li ripetos al Izraelo la lumajn vortojn de l'soleco.

Ĉapitro III.

Dum tiuj okazoj, Jozefo, la fianĉo de Maria, laboris for de Nazareto. Kaj, kiam li revenis, li ekvidis, ke Maria estas graveda.

Ĉar li estis bonulo kaj ne volis misfamigi ŝin, li pripensis forlasi ŝin sekrete.

Sed, dum la sekvanta nokto, en lia koro estis granda malkvieto, kaj li ne dormis.

Ĉar lia memoro vidadis, pli ol ĉion alian, okulojn de malgajo kaj lipojn de malgajo, kiuuj sin trudas al rideto.

Tial li sentis en si nenian koleron, sed li estis submergita de kompatato.

Kaj li sin mem riproĉadis, dirante : Ĉu ne renoviĝis en mi la historio de Adamo ? Li estis kulpa, ke li lasis Evan solan kaj sen defendo kontraŭ la ruzoj de la delogisto.

Kaj li demandis al si : Se la Eternulo, kiel en la tempoj de niaj prapatroj, sendus kurierojn por konsili la homojn, kaj se, malgraŭ mia kulpo, li juĝus min inda je tia favoro, kion dirus al mi la anĝelo ?

Eble la anĝelo dirus al mi : Se ci ŝin forlasos, kio ŝi fariĝos ? Vidu : ŝiaj okuloj estas ĉiam ĵus plorintaj kaj ŝiaj lipoj sin trudas al rideto pli dolora ol larmoj.

Ĉar la junaj viroj estas egoistaj kaj malicaj; ili ridante foriĝas de la virgino, kiu cedis al ili, kaj de la ido, kiun ŝi portas.

Tial la Eternulo metis mildon kaj kompaton en la kordon de la maljunuloj multe suferintaj, por ke ili riparu la malicon de la junuloj.

Sed, se mi respondus : Tiu, kiu min trompis eĉ antaŭ ol esti mia edzino, do kiel mi konfidus al ŝi ?

Kredeble la anĝelo min mallaŭdus per jenaj vortoj :
 Ĉu neniam ci mem kulpis ? Aŭ ĉu, tial ke ci kelkfoje
 kulpis, ci cian kredas kapabla je ĉiaj krimoj kaj mal-
 inda je ĉia konfido ?

Jozefo, en ci kaj en ŝi estas intermikso de bono kaj
 malico. Triumfigu la bonon en cia koro, kaj eble ci
 triumfigos en ŝia koro dankemon kaj fidelecon.

Kiam venis la mateno, Jozefo iris en la domon de Ma-
 ria, kaj, trovinte ŝin solan, li malfermis la buŝon
 por paroli.

Sed Maria faris geston, kiu petas pardonon kaj si-
 lenton. Kaj ŝi diris : Jozefo, se ci ne estas pli bona
 ol la aliaj homoj el tiu ĉi popolo, mi estas kulpa an-
 taŭ ĉiaj okuloj.

Ĉar mi enportas idon, kiu ne estas de ci. Kaj mi ne
 povas esti edzino de la patro de mia ido, ĉar Zelotoj
 mortbatis lin.

Ŝi plie diris : Sendube necesos, ke mi estu preme-
 gita sub ŝtonĵetoj de la popolo, kaj mia frukto kun
 mi.

Tamen, kvankam la vivo jam estas al mi nenio, mi de-
 zirus, ke mia infano vivu.

Kaj Jozefo respondis : Ho Maria, estu benita per
 miaj pardonaj vortoj.

Kaj, ĉar cia infano jam ne havas patron, venu en
 mian domon, ke mi estu la patro de cia infano.

Ni nomos lin Jesuo, t.e. Savanto. Ĉar, ĉu li hodiaŭ
 ne savas min el mia peko, nur pro tio, ke mi lin savas
 el la sangaj frenezaĵoj de la Leĝo ?

Tiel Jozefo obeis al sia koro, kaj li kondukis Ma-
 rian en sian domon, kaj li ŝin prenis por sia edzino.

Sed li ne ekkonis ŝin, ĝis ŝi estis naskinta sian
 unuenaskitan filon, al kiu ili donis la nomon Jesuo.

Nu, Jozefo prirevadis, koncerne la infanon de li
 savitan, la savon de la humilaj kaj malgrandaj.

Sed Maria imagadis glorajn kaj reĝajn destinojn.

Jozefo, antaŭ ol kuŝiĝi por dormi, kisis la infanon
 kaj dankis lin, dirante : Ho mia filo, ci meritas cian
 nomon Savanto.

Ĉar ci ja savis min el multe da malicaj pensoj, kaj
 ci lumigis mian menson kaj ci liberigis min el la res-
 pektó al la Leĝo, kiu estas malbona, tial ke ĝi mort-

igas.

Kaj unu nokton, li ricevis sonĝon, kiu estis jena.

Li vidis, sur la monto Nazareta, kelkajn el tiuj paŝtistoj, kiuj tranoktas sur la kampoj kaj tie gardas siajn brutarojn dum la noktaj maldormadoj.

Kaj subite, al tiuj paŝtistoj sin prezentis anĝelo de l'Sinjoro, kaj la gloro de l'Sinjoro estis ĉirkaŭ ili, kaj ilin elkaptis granda timo.

Tiam la anĝelo diris al ili : Ne timu, ĉar mi anoncas al vi grandan ĝojon, kiu estos por la tuta popolo.

Jen hodiaŭ, en Nazareto, en la domo de l'ĉarpentisto Jozefo, naskiĝis infano, kiu vin savos el la peko kaj liberigos el la Leĝo.

Kaj en la sama momento, kun la anĝelo ekestis multopa amaso el la ĉiela armeo laŭdanta Dion kaj diranta :

Gloro al Dio en la ĉiela plejalto kaj paco sur la tero al la bonvolaj homoj.

Kaj kiam la anĝeloj estis retirigintaj en la ĉielon, la paŝtistoj diris unu al alia :

Ni iru ĝis Nazareto, en la domon de l'ĉarpentisto Jozefo kaj ni vidu tiun okezon, kiun la Sinjoro sciigis al ni.

Ili tien iris en granda haŝto, kaj ili trovis Marian kaj Jozefon kun la infaneto kuŝanta en sia lulilo.

Kaj tion vidinte, ili diskonigis la informon, al ili diritan, pri tiu infano.

Kaj ĉiuj aŭdantoj ekmiris pri tio, kion rakontis la paŝtistoj.

Sed Jozefo, vekiginte, sin levis, kaj li eklumigis lanternon, kaj venis rigardi la infanon.

La lumo duonvekis Jesuon, kaj en la duba helo, Jozefo kredis vidi lin rideti, en aĝo, en kiu la infanoj ankorau ne ridetas.

Kaj, ĉar proksimiĝis la mateno, li sin preparis ĝojakore labori.

En tiu sama nokto, ankaŭ Maria ricevis sonĝon.

Kaj ŝia sonĝo ŝin transportis nemultajn jarojn pli frue, en la tagoj de l'kruela Herodo.

Nu, en la momento endormiĝa, ŝi rememoris pri la profetaĵo de Balaamo, kiun ŝi aŭdis legi en la sinagogo lastan sabaton, kaj liu anoncas, ke stelo eliĝos el Jakobo.

Kaj ŝi rememoris ankaŭ jenajn vortojn, kiujn diris

antaŭ ŝi iu rabeno : En la horo, en kiu naskiĝis nia patro Abrahamo (al kiu estu paco !) sin montris oriente mirinda stelo, kaj ĝi formangiĝis kvar stelojn, kiuj estis en la kvar ekstremaĵoj de l'ĉielo.

Tial Maria, en sonĝo, vidis stelon. Kaj tiu stelo iris tra la ĉielo. Kaj, de ĝi kondukataj, venis el Oriento reĝoj-magoj.

Ili alvenis en Jerusalemo. Kaj ili demandis : Kie estas la ĵus naskita reĝo de l'Judoj ? Ĉar ni vidis en Oriento lian stelon, kaj ni venas lin adori.

Poste la stelo kondukis ilin ĝis Nazareto. Kaj ĝi haltis super la domo de Jozefo kaj Maria.

Tiam la magoj eksentis grandan ĝojon. Kaj, enveninte en la domon, ili trovis tie la infanon kun Maria.

Kaj, ĝis la tero kliniĝante, ili adoris la infanon; kaj, malfermite siajn trezorujojn, ili donace prezentis al li oron, olibanon kaj mirhon.

Sed ofte glorsonĝoj malbone finiĝas. Herodo, incitita kontraŭ la infano, tial ke la magoj nomis ĉi tiun reĝo de l'Judoj, volis lin pereigi.

Do li ordonis masakri en Nazareto ĉiujn infanojn dujarajn kaj pli junajn. Sed Maria kaj Jozefo, ĝustatempe avertitaj, fuĝis al Egiptio, forportante kun si la infanon.

Dume la trairado de l'dezerto hirtis je danĝeroj kaj maltrankviligoj. Kaj atako far blekeganta leono teruris Marian tiel, ke ŝi vekigiĝis el sia sonĝo pri gloro kaj danĝeroj.

Kiam finiĝis la tempo de la repuriĝado de Maria laŭ la leĝo de Moseo, ili portis la infanon al Jerusalemo por prezenti lin en la Templo,

Laŭ tio, kio estas skribita en la Leĝo : Ĉiu virseksulo unuenaskita estu oferita al la Eternulo.

Nu, de longa tempo oni ne plu oferis infanojn al la Sinjoro; eĉ, Maria kaj Jozefo nesciis, ĉu iam okazis tiaj oferaj.

Sed, laŭ la skribo, oni elacetiĝis la unuenaskitojn de la virinoj, samkiel la unuenaskitojn de la azeninoj, per ofero de ŝafido aŭ de kaprido.

Kaj, kiam la gepatroj estis tro malriĉaj por aceti ŝafidon aŭ kapridon, ili kompanse oferis du turtojn aŭ du malgrandajn kolombojn.

Nu en Jerusalemo estis viro nomita Simeono, filo de Hilelo kaj patro de Gamalielo. Tiu viro estis justa kaj Dion timanta, kaj li vivadis en atendo pri la konsolo al Izraelo.

Ofte li venis en la Templon, kaj se oni alportis unuenaskiton por fari kiel kutime laŭ la Leĝo, li prenis lin en siaj brakoj kaj elparolis vortojn de beno kaj espero.

Do li ekprenis Jesuon inter siaj brakoj, kaj benis Dion, kaj diris :

Ĉiu infano naskiĝanta en Izraelo aperas al mi kvazaŭ Kristo. Ĉar ci, Sinjoro, ordonis, ke ni fruktu kaj multiĝu, por ke la gloro de cia popolo estu granda helo lumiganta la naciojn.

Jozefo kaj Maria ridetis dum Simeono diris tiujn parolojn.

Kaj la maljunulo benis ilin, kaj li diris al Maria : Memoru, patrino, ke ĉiu infano naskiĝanta en Izraelo tien venas por faligi aŭ relevi plurajn kaj por esti elmetata al ĉiaj kontraŭdiroj.

Kaj la pli altvaloraj kaŭzas pli da doloro al sia patrino. Ĉar la plej malgrava vorto ilin frapanta, ĉu ĝi ne estas glavo penetranta en la koron de la patrino ?

Post kiam ili plenumis ĉion, kio estas ordonita per la Leĝo de l'Sinjoro, ili reiris en Galileon, al Nazareto, ilia urbo.

- Dume la infano kreskadis, kaj spirite fortiĝadis, kaj li estis plena je amo al la homoj, kaj Dia mildo estis en li.

Kaj li helpadis sian patron en liaj laboroj. Li fabrikis plugilojn, pensante pri la neceso plugi la teron kaj la animojn, semi grenon kaj veron.

Ankaŭ pesiltelerojn fabrikis li, kaj pensis pri la egala justo.

Nu, ĉiujare liaj gepatroj iradis al Jerusalemo por la Paskofesto.

Kaj, kiam li estis atinginta la aĝon de dek du jaroj, ili iris al Jerusalemo kun li, laŭ la kutimo de la festo.

Sur la vojo ili renkontis, meze de granda amaso, mal-sanan infanon, kiu mordis al ĉiu ĉirkaŭ si. Kaj oni diris, ke li estas ekposedita de demono.

Jesuo, proksimiĝinte al li, levis la manon, kaj lin

alparolis milde, lin nomante : Mia tre amata frato.

Tiam la infano laŭdire demonhava ekvolis sin ĵeti al li por lin mordi. Kaj la tie-estantoj lin malhelpis, sed li batis al Jesuo ĉe la koron.

Kaj Jesuo ekploris, ne pro la sufero de sia korpo, sed tial ke li vidis malican frenezon, kaj nenion povis por ĝin sanigi.

Nu, hundo, kiu estis en la amaso, tiam ekbojis rabie kaj forkuris.

Tial pluraj diris, ke Satano eliĝis en formo de furioza hundo el la korpo de la demonhava infano.

Tiu infano, kiu batis Jesuon, tial ke Jesuo volis lin sanigi, estis el la vilaĝo Is karioto* en Judio, kaj estis nomata Judaso; kaj estas li, kiu pliposte liveris Jesuon al liaj malamikoj.

Post kiam forpasis la festotagoj, kiam ili revenis, Jesuo restis en Jerusalemo, kaj Jozefo kaj Maria tion ne rimarkis.

Sed, supozante lin en akompano de iliaj kunvojaĝantoj, ili marŝadis unu tagon, poste ili ekserĉis lin inter siaj parencoj kaj konatoj.

Kaj, ne trovinte lin, ili reiris al Jerusalemo por lin serĉi.

Post tri tagoj ili trovis lin en la Templo, sidantan ĉe la piedoj de l'doktoroj. Kaj ili ekaŭskultis kun la ceteraj ĉeestantoj.

Nu Gamalielo, ido de Hilelo, disputadis pri la Kristo kun iu filo de Ŝamajo.

Kaj ili akordiĝis dirante, ke la Kristo estos el la idaro de Davido; kaj la filo de Ŝamajo eĉ asertis, ke li naskiĝos, kiel Davido, en Bet-Leĥemo, urbo de Jehudio.

Sed infano Jesuo demandis : Kiel la Kristo povus esti Davidido ?

Ĉar Davido mem diris : La Sinjoro diris al mia Sinjoro : Sidiĝu ĉe mia dekstro, ĝis mi metos ciajn malamikojn por servi kiel ŝtupareto al ciaj piedoj.

Do ĉar Davido nomis lin sia Sinjoro, kiel li estus lia ido ?

Kaj la multo da ĉeestantoj plezuris lin aŭskulti. Jesuo diris ankaŭ : Pri la Sanktoleivo de l'Sinjoro

*Iskarioto aŭ Kerioto. Tial : Judaso Iskariota.

estas skribite, ke li ne rompos difektitan kanon kaj ne estingos ankoraŭ fumantan meĉon. Kiel do li estus ido de Davido,

Kiu estis la plej kruela el la militistoj kaj la plej perfida el la amikoj;

Kiu perfide mortigis sian amikon Urijon la Ĥetidon, tial ke li amis Bat-Seban, edzinon de Urijo;

Kiu segigis per segiloj la loĝantojn de Rabao, kaj metigis ilin sub erpilojn kaj sub ferajn hakilojn, kaj pasigis ilin tra hejtita forno;

Kaj samon faris al ĉiuj urboj de la Amonidoj ?

Nu, la filo de Samajo diris al li : Infano, atentu, ke ci ne blasfemu, kaj ne parolu kontraŭ la Skribon. Sed prefere aŭskultu en silento la saĝulojn kaj tiujn, kiuj estas kun la Leĝo de la Eternulo.

Kaj Jesuo respondis : Ĉu ci ne legis en la libro de la vortoj de profeto Jeremio : Kiel vi povas diri : Saĝuloj ni estas, kaj la Leĝo de la Eternulo estas kun ni? Ĉar oni agadis mensoge kaj la plumo de l'skribistoj skribadis malveraĵojn.

Tiam pluraj ekmurmuris, dirante : Necesus punbati tiun infanon per fera vergo.

Sed unu viro blanke vestita (ĉar li estis Eseno kaj venis de la bordo de la maro Morta) diris : Pravas tiu infano.

Ĉar en la Skribo estas duobla profetaĵo : unu estas vira, sed la alia estas ina; unu estas pura, sed la alia malpura; unu anoncas diajn kaj verajn aferojn, sed la alia anoncas aferojn terajn kaj falsajn.

Ĉar unu venas de Adamo kaj Habelo, sed la alia venas de Eva kaj Kaino; kaj sur la tuta deklivo de la Libro fluadas la rivero de malpuro apud la puraj akvoj.

Nu, Davido apartenas al la malpura profeteco, ĉar li estas adulta, ĉar li sin kovris per la sango de siaj malamikoj kaj la sango de siaj amikoj,

Kaj ĉar li ludadis harpon, kio estas signo de falsa profeteco. Ĉar la prapatro de tiuj, kiuj tuŝadas tiajn instrumentojn, ĉu ne estas Jubalo, Kainido ?

Tial la profetaĵoj, kiuj venas de Davido, kaj tiuj, kiuj rilatas al li kaj al lia filo, temas pri tera regno, ne pri la regno de Dio.

Sed la Kristo, ĉu li ne estas sendota por fondi la regnon de Dio ?

Kaj ĉiuj longe disputadis por ekscii, kio estos la Kristo kaj kio estos la regno de l'Kristo.

Poste Gamalielo kaj la Ŝamajido disputis pri tio, ĉu licas konsoli la malsanulojn en sabato. Kaj Gamalielo diris, ke licas.

Tial la Ŝamajido akuzis la Hilelidon, ke li detruas la Leĝon.

Sed Gamalielo akuzis la filon de Ŝamajo, ke li detruas eĉ la fundamenton de la Leĝo, ĉar li igas ĝin abomena al la bonuloj, detruante en la helpemaj koroj la amon al la Leĝo.

Kaj Jesuo demandis : Ĉu Samuĉelo ne oferbuĉis, malgraŭ la Leĝo, ekster la sanktejo, en kiu sidis la Kesto de la Interligo ?

Kaj, post kiam Salomono konstruis la Templon, ĉu Elijo kaj Eliŝao ne oferbuĉis, malgraŭ la Leĝo, ekster la Templo kaj Jerusalemo ?

Tamen ni scias, ke la oferoj de Samuĉelo, de Elijo kaj de Eliŝao estis agrablaj al la Sinjoro.

Do, kion la Sinjoro postulas de sia popolo, tio ne estas, ke ĝi obeadu la Leĝon;

Sed ke ĝi simulu al Samuĉelo, kiu estis justa, al Elijo kaj Eliŝao, kiuj estis puraj, kiuj malamis la grandulojn kaj amis la malgrandulojn.

Dum kelkaj murmuris, Jesuo aldiris : Ĉu ne la Sinjoro mem kondamnis la Leĝon per propraj vortoj ?

Aŭ ĉu ne estas skribite : Mi donis al ili preceptojn ne bonajn kaj juĝojn, laŭ kiuj ili ne devas vivi. Kaj mi lasis ilin malpuriĝi per siaj oferoj, kiam ili oferis al mi siajn unuenaskitojn.

Tiel la Sinjoro kondamnis la Leĝon. Kaj kio vere venas de la Sinjoro, tio estas ne la Leĝo, sed la korpureco kaj la kompatemo.

Tiam pluraj ekkriis : Silentu, infano. Ĉar ĉi blasfemas. Kaj la Leĝo ja venas de la Sinjoro.

Kaj Jesuo respondis : La Leĝo venas de la Sinjoro kiel kuracilo iome riparanta la malbonon, kiun vi faris al vi mem. Sed la korpureco kaj la kompatemo venas de la Sinjoro unuavice, ĉar ili venas de l'Sinjoro kiel la sano de l'korpo.

Kaj vi kaŭzas al vi mem malsanojn en la korpo kaj en la animo, ne nur per viaj kulpoj, sed ankaŭ per misuzado de kuraciloj.

La Leĝo estas farita por la maliculoj, kiuj estas en Izraelo, sed la veraĵ idoj de Izraelo ne bezonas la Leĝon;

Ĉar oni skribis leĝojn por malhelpi, ke la maliculoj faru ĉion, kio estas en ilia koro;

Sed kio estas skribita en la koro de l'bonaj, tio pli valoras ol tio, kio estas skribita en la Leĝo de l'malicaĵ.

Do legadu tion, kion la Sinjoro skribis en viaj koroj, kaj vi forgesos la Leĝon, kaj vi estos pli bonaj ol la Leĝo, kio estas la vera maniero ĝin plenumi.

Kelkaj el la idoj de Hilelo estis ravitaj de lia saĝo kaj de liaj respondoj.

Sed la idoj de Ŝamajo incitiĝis, dirante : Ĉu la Skribo estis donita por servi kiel ludilo al infanoj ? Kaj ĉu la patro de ĉi tiu ne devus bati lin per vergoj ?

Kaj iu lin demandis : De kie ci venis, infano ? Aŭ ĉu ci ne havas la prononcon de l'Galileanoj ?

Jesuo respondis : Ci diris. Mi estas Galileano el la urbo Nazareto.

Tiam la idoj de Ŝamajo ekkriis la proverbon : Ĉu de Nazareto povas veni io bona ?

Tiujn aferojn vidante kaj aŭdante, miris Maria kaj Jozefo. Kaj al Jesuo diris lia patrino : Filo mia, kial ci tiel agis kontraŭ ni ? Jen cia patro kaj mi cin serĉadis en granda zorgo.

Kaj li diris al ili : Kial vi serĉis min ? Ĉu vi ne sciis, ke Izraela infano devas plene okupiĝi pri la aferoj de la Eternulo ?

Sed ili ridetis kaj skuis la kapon, trovante en liaj paroloj saĝon de infano, vidanta nur unu flankon de la aferoj kaj ne konanta la necesajojn de la vivo.

Poste li foriris kun ili kaj revenis al Nazareto. Nu, lia patrino konservis en sia koro ĉiujn tiujn aferojn.

Tial ŝi ridetis kaj tremis. Ĉar ŝi ree songadis pri gloro kaj danĝeroj.

Kelkajn tagojn poste, dum Jozefo estis elirinta por sia laboro kaj Maria estis en la domo kun siaj aliaj infanoj,

Jesuo sola estis laboranta en la granda hangaro, kiu servis kiel laborejo.

Li fabrikis jugon, kaj revis kun kompato pri la bovo,

kiu ĝin surportos, kaj zorge ĝin poluris, por ke ĝi ne vundu la karnon, kaj faris ĝin glata kaj malpeza.

Dum li estis sola en tiu laboro kaj en tiuj pensoj, jen samaĝa infano eniris por diri al Jozefo, ke li venu fari laboron en lia domo.

Jesuo diris al li : Mia patro estas eliminta. Sed sidigu por atendi, ĝis li revenos; aŭ diru al mi, kiu ci estas kaj kie ci loĝas, por ke mi ripetu al li ciajn parolojn.

La infano respondis : Mia patro havas nomon Abaso, tial oni kutime nomas min Barabaso.

Kaj ni loĝas je nelonga distanco de Nazareto, ĉe la vojo al Seforiso.

Tion dirinte, infano Barabaso diris plie : Ni kune ludu.

Jesuo ne volis malĝojigi lin per rifuzo. Do ili metis sur stablon la mezon de tabulo kaj, eksidante sur ambaŭ ekstremaĵoj, ili komencis sin balanci.

Nu, la tabulo estis longa, la stablo alta kaj ĝia bazo mallarĝa,

Tial, ili ludis de mallonga tempo, kiam la stablo eksanceliĝis kaj kliniĝis falonte.

Kaj Jesuo estis supre kaj Barabaso malsupre. Sed, tuj kiam Barabaso estus supre, la stablo falus kaj Barabaso estus vundita.

Jesuo ekvidis tiujn aferojn per unu nura rigardo de siaj okuloj kaj unu nura rigardo de sia spirito.

Do li ekkriis, dirante : Barabaso, rapide elsaviĝu, ke ci ne estu vundota.

Kaj Barabaso sin elsavis, kaj ne estis vundita. Sed Jesuo falis de tre alte sur la plankon. Kaj li sentis doloron en siaj membroj, kaj sur lia vizaĝo fluis sango.

Tiam li sin levis kaj, proksimiĝante al Barabaso, li demandis kun tenero kaj zorgo : Frato mia, ĉu mi sufiĉe frue cin avertis kaj ĉu ci ricevis nenian vundon ?

Barabaso ne respondis per vortoj. Sed li rigardis Jesuon kunonta kaj malama okulo.

Kaj, tuj elirante, li forkuris kun klinita kapo preter la muroj, kvazaŭ homo ĵus ofendita aŭ kvazaŭ besto ĵus eskapinta el danĝero.

Tiu Barabaso, anstataŭ kiu Jesuo propravole falis

kaj suferis, estas la sama, anstataŭ kiu Jesuo, iĝinte matura homo, propravole estis krucumita.

Nu Jesuo grandiĝis laŭ aĝo, sed lia korpo ricevis malmulte da forto. Kaj lia spirito kreskadis je saĝo de kompatato kaj amo pli ol je saĝo de prudento kaj singardemo.

Kaj li ĝojis en sia koro, ĉar li sin sentis agrabla al Dio kaj al la plej bonaj inter la homoj.

Ĉapitro IV.

En tiu tempo Johano venis en la landon ĉe Jordano, predikante la bapton de pentato por la malsuldigo pri la pekoj,

Penante esti tiu, pri kiu estas skribite en la libro de l'vortoj de Jesaĝo : Pretigu la vojon de la Eternulo, ebenigu liajn irejojn;

Ĉiu valo estu plenigita, ĉiu monto malaltigita; rektigu la tordaj vojoj kaj glatigu la krudaj;

Por ke ĉiu karno vidu la savon de Dio.

Tial li diradis al malriĉaj : Ŝanĝu viajn korojn, se vi volas, ke la regno de Dio estu proksima.

Sed al riĉaj li diris : Ŝanĝu viajn korojn, ĉar la regno de Dio estas proksima.

La loĝantoj de Jerusalemo kaj de tuta Judio kaj de la tuta lando ĉirkaŭ Jordano venis al li;

Kaj, post kiam ili konfesis siajn pekojn, li baptis ilin en Jordano.

Nu, Johano havis veston el kamelhara teksaĝo kaj ledan zonon ĉirkaŭ siaj lumboj; kaj lia nutraĝo konsistis el akridoj kaj sovaĝa mielo.

Kaj, kiam li vidis veni al lia bapto plurajn el la Fariseoj kaj Sadukeoj, li diris al ili : Vipuridoj, kiu instruis al vi fuĝi antaŭ la proksimiĝanta kolero ?

Faru do la fruktojn konvenajn al homo, kiu ŝanĝis sian koron; sed ne diru interne de vi kun memfido : Ni havas Abrahamon kiel patron. Ĉar mi diras al vi, ke eĉ el ĉi tiuj ŝtonoj Dio povas estigi idojn al Abrahamo.

Ĉu vi ne vidas la hakilon jam kuŝantan ĉe la piedo de la arboj ? Ĉiu arbo, kiu ne produktas bonajn fruktojn, estas dehakota kaj en fajron ĵetota.

Kaj la popolo lin demandis : Kion ni faru ?

Li respondis : Ŝanĝu viajn korojn, tiel, ke tiu, kiu posedas du vestojn, donu unu veston al tiu, kiu estas nuda, kaj ke tiu, kiu posedas nutraĵon, donu nutraĵon al tiu, kiu estas malsata.

Ankaŭ impostistoj venis por esti baptitaj. Kaj diris al li : Majstro, kion ni faru ?

Kaj li respondis : Ŝanĝu viajn korojn, tiel ke, por komenco, vi ne postulu pagon super la ordonita.

La militistoj lin demandis : Kaj ni, kion ni faru ? Li respondis : Ŝanĝu viajn korojn, tiel ke vi ne plu tentiĝu uzadi perforton aŭ trompon kontraŭ kiun ajn, sed ke, por komenco, vi kontentiĝu per via soldo.

Kaj la impostistoj kaj la militistoj kaj la popoloj demandis : Majstro, ĉu tio, kion ci diras, sufiĉas por esti savota ?

Sed li respondis : Ŝanĝu viajn korojn, kaj viaj koroj diros al vi tion, kio sufiĉas. Ŝanĝu viajn korojn, kaj vi donados fruktojn de pento, justo kaj kompato.

Koncerne min, mi baptas vin per akvo kaj parolas al vi, en via vintro, pri la floroj de l'printempo.

Sed la floroj de l'printempo, ĉu ili ne venigos la fruktojn de l'somero ? Iu alia eliĝos, por ilin gvidi, el viaj ŝanĝitaj koroj, kaj tiu baptos vin per fajro kaj suno.

Kaj tiu, kiu elstariĝos el viaj renovigitaj koroj, tiu tenos la ventumilon en siaj manoj; kaj vi perfekte purigos la draŝejon de Izrael, vi amasigos la tritikon en viaj grenejoj, sed vi forbruligos la tutan pajlon.

Ankaŭ aliajn admonojn li direktadis al la popolo, anoncante al ĝi la Bonan Novaĵon.

Kaj li diris : Sur plurajn la spirito de Dio malsuprenvenis en la momento mem, en kiu mi baptis ilin, kaj al mi ŝajnis, kvazaŭ mi vidus la ĉielon apertiĝi kaj kvazaŭ kolombo malsuprenvenus sin meti sur ilian kapon.

Ĉar la ĉielo ĉiam apertiĝas, samtempe, kiel la koro.

Nu la popolo estis en granda spirita malcerteco; ĉiu pripensis en si mem, ĉu Johano ne estus mem la Kristo.

Sed Johano diris al la popolo : Neniu homo estas la Kristo. La plej grandaj el la homoj estas antaŭuloj de l'Kristo.

Ĉar la plej grandaj el la homoj parolas nur al la oreloj, kaj nur la korpon ili povas bapti aŭ cirkumcidi.

Sed la Kristo estas la Parolo, kiun Dio diras en la fundo de l'koro; kaj la koron ĝi baptas kaj cirkumcidas.

Do ĉiu el vi aŭskultu, kio estos dirata en lia purigita koro; tiel, kiam li estos aŭdinta la Kriston en sia koro, tiam la paroloj el lia buŝo preparos la ceterajn Izraelidojn aŭdi la Kriston en sia koro.

Faru do tion, kion mi faras, kaj ebenigu la irejojn en vi kaj antaŭ vi. Ĉar ĉie, kie la irejoj estas ebenigitaj, tie venas la Kristo, marŝanta kiel reĝo de gloro.

Kaj liberigu viajn korojn el la sklaveco de l'peko. Ĉar en ĉiujn korojn liberigitajn el la sklaveco de l'peko, penetras la Kristo, alportanta plenecon kaj gloron.

Dum la tuta popolo sin baptigis, ankaŭ Jesuo venis al Johano por ekscii la instruadon de Johano, konfesi siajn kulpojn kaj ricevi la bapton de akvo kaj inicado.

Nu Johano jam konis Jesuon kaj de li multon esperis. Kaj, lin baptante, li diris: Jen estas mia Filo tre amata, en kiun mi metas mian plej grandan amon kaj miajn plej grandajn esperojn.

Kaj Jesuo restadis iom pli ol jaron apud Johano, aŭdante liajn instruojn, preĝante kaj pentofarante.

Sed, kiam li estis proksimume 30-jara, li estis tirata de sia spirito en la profundojn de l'dezerto. Ĉar li soifis ekscii, ĉu Dio, en la soleco, portos al li iun novan penson nekonatan de Johano.

Kaj li volis restadi sola dum kvardek tagoj, manĝante, kiel Johano, nur iom da sovaĝa mielo kaj kelkajn akridojn.

Jesuo estis de malmultaj tagoj en la profundoj de l'dezerto, kaj li marŝis kun bastono en mano; kaj multaj akridoj ekflugis ĉe la bruo de lia bastono kaj ĉe la bruo de liaj paŝoj.

Kaj ekflugante ili elmontris, sub la flugiloj sabloaŭ rokokoloraj, kiuj malhelpas la birdojn ilin vidi, aliajn flugilojn blujajn aŭ ruĝajn.

Kaj Jesuo laŭdis la Eternulon, ke li donis al tiuj bestoj grizan mantelon, kiu ŝirmas ilin, kaj sub tiu mantelo li metis veston pli delikatan kaj brilkoloran ol tiu de Salomono en ties tuta gloro.

Nu, proksime de la loko, en kiu pasis Jesuo, estis

dorna seka herbo. Kaj eta akrido, volante eviti la piedon de Jesuo, sin ĵetis meze de tiu dornaĵo en aranean retan.

Ankaŭ al la araneo la Eternulo donis brilan veston, kaj ĝiaj kruroj kaj ĝia ventro estis kovritaj per nigraj ringoj kaj flavaj ringoj, kiuj ŝajnis faritaj el riĉa veluro.

Sed, sin ĵetante sur sian predon, la araneo kun malbelega ventro kaj belaj koloroj ĝin laĉis per la multaj fadenoj eligantaj el ĝia korpo.

Tiel, envolvita kvazaŭ en vandoj, la tuj mortonta akrideto similis ĵus naskitan infanon.

Jesuo disŝiris la retan per sia bastono kaj, tenante en siaj manoj la mizeran kreaĵon, li ĝin liberigis el ĝiaj subtilaj vandoj; kaj li tre zorgis, ke li ĝin ne ŝiru aŭ vundu.

Sed, kiam ĝi estis liberigita el ĉiuj fadenoj, ĝi restis sur la mano de Jesuo, ne eksaltante nek ekflugante. Kaj ĝi havis longajn tremojn de agonio.

Jesuo komprenis, ke la araneo ĝin morte pikis. Pro kompatato li finis la kruelan agon de la araneo kaj mortigis la akridon.

Poste, rigardante la araneaĵon pendantan en du ŝirpecoj, li malgajiĝis, dirante : Mi ruinigis la sagacajn laboraĵojn, kiu estis necesa al la malsato de ĉi tiu.

Kaj la akridon, kiun vivan li deŝiris disde la araneo, mortan li redonis al ĝi.

Sed la araneo malŝatis tiun predon malpurigitan per la homa kontakto.

Jesuo, tion vidante, diris : Mi deziris bonon kaj faris malbonon. Mi plidaŭrigis la agonion de la suferanto. Kaj la malsatanton mi senigis je nutraĵo.

Tial, ne satigite, ĝi frapos alian viktimon. Kaj tiu nova murdo estos ido de miaj manoj.

Tamen mia koro estas bona, kaj en ĝi mi ebenigis la vojojn de l'Sinjoro. Kial do la frukto, kiun mi donis, troviĝas malbona ?

Tiam li rigardis al la ĉielo, dirante : Patro, kiu estas en la ĉielo, klarigu al mi cian juston kaj cian kompaton. Ĉar al mi ŝajnas, ke la malsato de la araneo, la morto de la akrido kaj la senpoveco de mia bonvolo direktas akuzon al ci.

Kaj mi kredas aŭdi sur la tuta tero la grandan lamenton kaj la grandan tumulton de la kreaĵoj akuzantaj la Kreinton.

Dum li marŝis en tiuj pensoj, jen, sub sia piedo, li sentis reziston malfortan, cedantan, kaj li aŭdis mallautan ekkrakon.

Kaj, returniĝinte, li vidis, ke senceie li surtretis insekton. Kaj li ree parolis : Patro, patro, mi cin demandas, kiu do kulpas pri tiu murdo ?

Sed li ne estis sufiĉe harmonia kaj forta por tenadi sian vojon inter preĝo kaj blasfemo.

Tial li ektimis pro siaj pensoj. Li ne plu kuraĝis fronte kontesti al la Eternulo; kaj li kredis, ke liaj meditoj venas ne de li mem, sed de la Malamiko, kiun li konis per la libro de Ijubo.

Kaj li nomis sian penson : tento. Kaj li diris : Patro, liberigu min de l'Maliculo. Iam ci permesis, ke li tentu Ijobon, frapante lin en lia korpo kaj en liaj bienoj.

Jen li, pli subtile, nun tentas min per doloroj, kiuj ne estas miaj, kaj, sub kovro de kompato, li volus, ke mi blasfemu cin en la nomo de aliaj.

Sed cin, ho Patro, ne blasfemos mi.

Ĉar ci kreis ĉiujn estulojn por feliĉo kaj senmorteco.

Kaj ja la homo enmetis en cian verkon ĉiujn malordojn, nome la pekon kaj ambaŭ idojn de l'peko, doloron kaj morton.

Tial mi estos bona kaj mia buŝo cin laŭdacos. Kaj mi strebos, ke la ceteraj homoj reboniĝu, kaj ke ilia buŝo laŭdadu cin,

Por ke ci liberigu el ĉia malbono la homojn kaj la vivajn kreaĵojn.

Ĉar, kiel ci promesis per la parolo de cia profeto Jesajo,

Kiam justo estos zono ĉe la lumoj de l'homo kaj fido zono ĉe liaj flankoj,

Tiam la lupo loĝos kun la ŝafido kaj la leopardo kun la kaprido; la bovidino sin paŝtos kune kun la urso, kaj la leono manĝacos herbon, kiel la bovo;

La suĉinfano ludos sur la truo de la aspido, ĵus demamigita infano ridante retiros sian manon el la kavo de la bazilisko.

Neniu malbonfaros plu; neniu kaŭzos damaĝon al alia

sur la tuta monto de cia sankto; sed la tuta tero estos plenigita per la konado de la Eternulo kaj de lia justo, samkiel la fundo de l'maro estas plenigita per la akvoj.

Patro, metu do cian pacon en mian koron, kaj sur miajn lipojn la kantikon de laŭdado al ci,

Por ke mi metu en la koron de aliaj homoj grandigantan pacon kaj sur iliajn lipojn suprencelantajn himnojn,

Kaj ke ci estu fidela al cia promeso, pri kiu mi kredas per mia tuta spirito.

Tiel Jesuo revis kaj preĝis, kaj kredis pensi. Kaj li faris el la ombro de sia justo kaj bono estontecon de bono kaj justo.

Nu, la maltrankvilo de la tero faras sezonojn diversajn, jen tro varmajn, jen tro malvarmajn;

Sed la maltrankvilo de la tero neniam trovos la daŭran varmeton kaj la nevelkeman printempon.

La maltrankvilo de la vivo faras naskiĝon kaj morton, doloron kaj ĝojon;

Sed la maltrankvilo de la vivo serĉadas la eternan vivon kaj la daŭran ĝojon, kaj ne trovos ilin.

La maltrankvilo de la homo ŝanĝas la vizaĝon de l'maljusto, metante supren tion, kio estis malsupre, malsupren tion, kio estis supre, glorante kelkajn humiligitojn, subigante kelkajn superulojn, riĉigante kelkajn malriĉulojn, malriĉigante kelkajn riĉulojn;

Sed la maltrankvilo de la homo ne trovos, escepte en malmultaj koroj, la juston kaj la regnon de Dio.

Nu Jesuo, ankoraŭ ne suspektanta tiujn aferojn, estis, kiel la plej bonaj el la domo de Izraelo,

Ebria de justo kaj freneza de espero.

Kaj li diris en si mem: Ĉar la peko de unu sola kaŭzis la doloron kaj la morton de ĉiuj kreaĵoj,

Kial ne la justo de unu sola rejustigus la teron, liberigante ĝin el ĉia malordo,

Tiel, ke oni ne vidu plu iun karnon suferi kaj morti?

Kaj, sin turnante al la ĉielo, li promesis kaj preĝis: Patro, mi faros, kio estos en mi ebla, por ke mi fariĝu la Justulo kaj la Savonto.

Donu do al mi forton kaj kuraĝon, ke mi fariĝu la nova Adamo kaj savu tion, kion pereigis la unua Adamo.

Donu al mi, Patro, multe da forto kaj multe da kuraĝo; ĉar mi petas, ke ci reĵetu sur min la tutan ŝuldon al ci de la homoj pro iliaj pektoj;

Kaj mi petas, ke ci ŝarĝu min solan per la katenoj de ĉiuj, per la doloro de ĉiuj, per la morto de ĉiuj, Por ke mi estu la malliberulo, kiu, prenante sur sin la katenojn de siaj fratoj, liberigu siajn fratojn.

Jesuo malgaje sin deturnis de la akridoj, kaj jam nur manĝis, kiam li renkontis mielĉelaron aŭ sovaĝan radikon.

Li repuŝadis, nomante ilin tentoj kaj kredante, ke ili venas de ekstera malamiko, kelkajn el siaj pensoj, ŝajne kontraŭdiraj al lia ĉefa penso, sed eble necesaj por fari ĝin plena kaj ekvilibra.

Kaj en la malforteco de sia korpo, ĉiutage pli malrapida kaj lacega, li estis malpli kaj malpli mastro de sia spirito.

Tial li pli kaj pli malespere luktadis kontraŭ la penson, kiun la lukto faris al li malamika.

Longajn horojn li restadis kuŝante sur la grundo en stato, kiu ne estis vekiteco kaj ne estis dormo.

Tiam la revo, per kiu li volis plenigi sian tutan spiriton, kaj la penso, kiun li volis forpeli el sia spirito, surpronis korpajn formojn, fariĝis fantaziaj estaĵoj.

La Malamiko, aperante antaŭ li kvazaŭ reala persono, parolis al li per voĉo simila al la voĉoj, kiujn oni aŭdas en songoj.

Komence tiu voĉo estis krio de lia malsata korpo kaj la tentisto diris : Ofte ci nomas la Eternulon cia Patro. Se vere ci estas filo de Dio, ordonu do al tiuj ŝtonoj, ke ili ŝanĝiĝu en panojn.

Sed Jesuo respondis : La homo vivas ne nur de pano, sed ankaŭ de ĉiu vorto el la buŝo de Dio.

Kaj li nutris sian animon per la vortoj de promeso kaj espero, kiuj estas en la libro de la Psalmoj kaj en la libroj de l'Profetoj.

Poste ŝajnis al li, ke la Malamiko lin forportas sur altan monton kaj en unu momento vidigas al li ĉiujn regnojn de l'mondo kun ilia tuta gloro.

Kaj la demono diris : Mi donos al ci tiun tutan potencon, ĉar ĝi estas donita al mi, kaj mi donas ĝin, al kiu mi volas.

Do se ci adorkliniĝos antaŭ mi, ĉio tio fariĝos cia.

Sed Jesuo respondis : Foriru de mi, Satano. Ĉar estas skribite : Adoru la Sinjoron cian Dion, kaj servu nur al

li.

Satano ankaŭ transportis lin al Jerusalemo kaj metis lin sur la supron de l'Templo kaj diris al li : Se ci estas filo de Dio, do ĵetu cin malsupren.

Ĉar estas skribite : Li ordonos al siaj anĝeloj, ke ili zorgu pri ĉiu el liaj filoj, ke li ne falpuŝiĝu per sia piedo sur iu ŝtono.

Kaj Jesuo sentis sian korpon malpeza kaj ŝvebanta, kiel okazas en sonĝoj.

Tamen li respondis : Estas skribite : Ne provu la Sinjoron cian Dion.

Tiam la revo malaperis kaj la demono por ioma tempo retiriĝis.

Pro la tentoĵoj suferitaj en la malfortiĝo de sia korpo, Jesuo komprenis, ke fastado kaj seneco ne estas la vojoj al inteligento kaj saviĝo;

Kaj, reveninte al Jordano, li reekprenis nutraĵon.

Kaj li rakontis al sia majstro Johano la atakojn de la Malamiko, kaj kiel li repuŝis ilin.

Kaj Johano aprobis la respondojn de Jesuo al la demono.

Sed Jesuo plie diris : Kaj la dezerto instruis al mi, ke necesas ŝanĝi la akvon en vinon.

Tion la majstro aprobis, komprenante : Necesas ŝanĝi en forton kaj ardon la malforton de l'koro.

Sed samtempe kiel tion, tiu parolo krome signifis aliajn aferojn, kiujn Johano ne sciis.

Ĉapitro V.

Kel'aj el la disĉiploj de l'Baptisto aŭskultis Jesuon kun piezuro kaj maltrankvilo; kaj al ili ŝajnis, ke, uzante la samajn vortojn kiel Johano, li komencis diri aliajn aferojn al Johano.

Sed la tuta popolo daŭre venis aŭdi la Baptiston, tiel ke Herodo la Tetrarko, nomita Antipaso, ektimis pro tiu popolmovado.

Ĉar Johano parolis kontraŭ Herodon, mallaŭdante lin pri Herodiada, edzino de Filipo lia frato, kaj pri ĉiuj malbonaĵoj de li faritaj.

Tial la Tetrarko inci tiĝis, kaj al ĉiuj siaj aliaj

krimoj li aldonis tiun, nome enkarcerigi Johanon.

Tiam du disĉiploj de Johano, kiuj estis de mallonga tempo apud li, sin alligis al Jesuo.

Ĉar, dum Jesuo marŝis revante pri la promesoj de la Eternulo, li sentis, ke iu staras malantaŭ li.

Sin returninte kaj vidante, ke du disĉiploj de Johano lin sekvis kiel homoj, kiuj ne scias plu sian vojon, aŭ kiel hundoj, kiuj perdis sian mastron, li diris al ili : Kion vi serĉas ?

Ili respondis : Rabbi (t.e. majstro), kie ci loĝas ?

Li diris : Venu kaj vidu. Ili iris kaj vidis, kie li loĝas; kaj ili restis kun li tiun tagon, ĉar estis ĉirkaŭ la deka taghor.

Nu Andreo, frato de Simon-Petro, estis unu el la du, kiuj sekvis Jesuon.

Li renkontis Simonon sian fratôn kaj diris al li : Ni trovis majstron pli grandan ol Johano.

Kaj li kondukis lin al la nova majstro. Jesuo, rigardinte lin, trovis en li aspekton de forto kaj ardo. Kaj diris al li : Simono, filo de Jono, ci estos nomata Petro (t.e. Ŝtono).

Ĉar la Ŝtonoj estas fortaj, kaj el kelkaj, kiam oni frapas ilin, eliĝas fajro.

La morgaŭon Jesuo ekvolis foriri al Galileo, kaj li renkontis Filipon kaj diris al li : Sekvu min.

Nu, Filipino estis el Betsaido, kiu estas ankaŭ la urbo de Andreo kaj Petro.

Kaj Filipino estis naiva kaj entuziasma, kaj li malmulte komprenis kaj multe admiris.

Kaj renkontinte Natanaelon, filon de Tolomeo*, studentan kaj preĝantan sub figarbo, li diris al li : Leviĝu kaj venu kun ni,

Ĉar ni trovis majstron pli grandan ol ĉiuj profetoj. Kaj eble li estas tiu, pri kiu parolis la profetoj.

Sed Natanaelo, konante la spiritan malforton de Filipino, ekridetis; kaj li demandis : Kiu estas lia nomo kaj de kie li venas ?

Filipo respondis : Estas Jesuo el Nazareto, filo de ĉarpentisto Jozefo.

Tiam Natanaelo rideksplodis kaj diris la proverbon : Ĉu el Nazareto povas veni io bona ?

Poste li ekpentis pri sia rido kaj sia parolo. Kaj,

* Filo de Tolomeo = Bartolomeo.

ruĝiginte, li diris : Mise mi parolis; ĉar laŭ la fruktoj, ne laŭ la radiko, oni konas arbon. Do mi iros kaj vidos.

Nu, Jesuo staris ne malproksime, kaj li vidis kaj aŭdis.

Tial, kiam Natanaelo venis al li, li diris : Jen estas vera Izraelido, en kiu ne estas falso.

Natanaelo demandis : Kiel ci konas min ? Jesuo respondis : Antaŭ ol Filipino cin vokis, mi cin vidis preĝi kaj legi sub la figarbo.

Kaj, kiam Filipino cin vokis, mi aŭdis ciajn parolojn, en kiuj estis, kun granda strebo al justo, komenco de prudento.

Natanaelo respondis : Majstro, ci estas la plej aminda, kiun mi iam renkontis.

Jesuo diris al li : Tial ke, vidinte kaj aŭdinte, kion ci faris kaj diris sub la figarbo, mi divenis iomete el cia koro, jen ci jam amas min. Rigardu do en cia koro, kaj vi vidos en ĝi aferojn pli grandajn.

Tri tagojn poste, okazis geedziĝa festo en Kanao en Galileo, kaj la patrino de Jesuo tie ĉeestis.

Ankaŭ Jesuo estis invitita kun siaj disĉiploj.

Sed Natanaelo diris al li : Majstro, Johano ordonis evitadi la nuptojn, la festenojn kaj la lokojn, en kiuj oni ridas. Kaj vinon li ne trinkis.

Kaj Jesuo respondis : Mi volas ekscii, kun kio estas komparebla tiu ĉi generacio. Ĉu ĝi estas simila al infanoj sidantaj sur publikaj placoj ? Iliaj kunuloj vokas ilin, dirante : Ni ludis fluton, kaj vi ne dancis; ni kantis plendojn antaŭ vi, kaj vi ne ploris.

Johano venis ne manĝante nek trinkante; kaj ili diris : Li enhavas demonon.

Tial mi venos manĝante kaj trinkante, por provi, ĉu ili diros : Jen estas manĝulo kaj drinkulo, amiko de impostistoj kaj pekuloj.

Tiuj senprudentuloj preferis morti pro soifo ol trinki kun Johano la akvon de pento.

Sed mi venis ŝanĝi la akvon en vinon,

Por vidi, ĉu ili preferos morti pro soifo ol trinki la vinon de ĝojo kaj de apertiganta koro.

Nu, dum la manĝo, ĉar ekmanĝis vino, la patrino de Jesuo diris al li : Vinon ili plu ne havas.

Jesuo respondis : Virino, kio estas komuna inter
cia parolo kaj mia penso ?

La vera vino ne troviĝas en vazoj, sed en la buŝo
kaj en la koro. Vino ne estas ruĝa likvaĵo, sed varmig-
anta ĝojo.

Kaj ĉie, kie mi estas, ĉiam estas vino. Ĉar, por
kiuj min aŭdas, ĉu ne la akvo mem estas bonkvalita vino?

Kaj, dum Jesuo daŭre paroladis, la fino de l'manĝo
estis pli ĝoja ol ĝia komenco.

Tiel, ke pluraj diris : Vere li ŝanĝis en nia buŝo
la akvon en bongustegan vinon.

Kaj, ĉar la paroloj de Jesuo fariĝis pli kaj pli be-
laj, pli kaj pli ardaĵ kaj ebrigaĵ, Natanaelo diris al
li :

La aliaj prezentas unue la bonan vinon, kaj poste,
kiam la kunmanĝantoj jam multe drinkis, ili donas malpli
bonan. Sed ci, Majstro, konservis la plej bonan vinon
ĝis tiu ĉi horo.

Tiel Jesuo komencis en Kanao, urbo Galilea, fari mira-
klojn en la koroj; kaj tie li manifestis sian gloron kaj
sian potencon; kaj liaj disĉiploj pli amis lin kaj kre-
dis lin.

Ĉapitro VI.

Post tiuj okazoj, Jesuo iris al Kapernaumo kun sia pa-
trino, siaj fratoj kaj siaj disĉiploj; kaj ili tie rest-
adis nur malmultajn tagojn.

Ĉar, tial ke la Pasko estis proksima, ili iris al Je-
rusalemo kun la Galileanoj.

En la Templo li trovis homojn, kiuj vendis bovojn, ŝa-
fojn kaj kolombojn, kun monŝanĝistoj tie sidantaj. Kaj
li ekindignis kaj incitiĝis kontraŭ ilin.

Kaj, farinte el ŝnuretoj skurĝon, li pelis ilin el la
Templo kun la ŝafoj kaj la bovoj; li disŝutis la monon
de l'ŝanĝistoj kaj renversis iliajn tablojn.

Kaj li insultis ilin, dirante : Ĉu ne estas skribite :
De ĉiuj nacioj mia domo estos nomata preĝdomo. Sed vi
faris el ĝi kavernon de ŝtelistoj.

La skribistoj lin demandis : Per kiu signo ci montros,
ke ci rajtas fari tion ?

Jesuo respondis : Detruu ĉi tiun Templon, kaj en tri tagoj mi ĝin restarigos.

Tiam la skribistoj rideksplodis, dirante : Necesis kvardek ses jaroj por konstrui ĉi tiun Templon; kaj ci, en tri tagoj ci ĝin restarigus ?

Sed li diris : La Eternulo ne loĝas en domoj el ŝtonoj; la Eternulo loĝas ja en homaj koroj.

Do, se mi penetrigos la amon al justo en la koron de unu nura homo, mi estos konstruinta al la Sinjoro templon pli belan ol tiu de Salomono.

Sed Gamalielo, filo de Hilelo, alvenis pro la tumulto kaj demandis : Ĉu ci opinias, ke la skurgobatoj penetrigas en la korojn amon kaj juston ?

Kaj Jesuo silentis. Ĉar li memoris pri la senpotenco de siaj manoj por savi la akridon, kaj kiel, sen avantaĝo por la viktimo, li faris malbonon al la araneo.

Kaj li jam ne sciis, ĉu bona estas tio, kion faris hodiaŭ liaj manoj.

Nu Gamalielo aldonis tiujn vortojn : Ŝtelado estas malbono kaj perforto estas malbono. Malbonon oni ne kuracas per malbono.

Jesuo diris al Gamalielo : Ĝis nun ci estas pli bona ol mi. Mi preĝos mian Patron, ke li igu min pli bona ol ci.

Tie estis homo el la Fariseoj, nomita Nikodemo, unu el la ĉefaj en la popolo.

Tiu homo venis nokte al Jesuo kaj diris al li : Mastro, mi vidas, ke ci estas doktoro veninta komisie de Dio.

Ĉar neniu kapablas vivi, kiel ci vivas, kaj fari la sentimajn gestojn, kiujn ci faras, kaj milde konfesi siajn kulpojn, kiel ci konfesas aliajn, se Dio ne estus kun li.

Jesuo respondis : Vere, vere, mi diras al ci, mi estas malpli ol infano. Mi estas, en la mallumo, iu strebanta kaj palpanta al la lumo.

Kaj mi estas tiu, kiu penas denove naskiĝi. Ĉar ĉio, kion mi scias, estas ke, se homo ne naskiĝas denove, Dio ne estos kun li.

Nikodemo demandis : Kiel oni povas denove naskiĝi ? Ĉu homo povas reeniĝi en la ventron de sia patrino kaj duafoje eligi el ĝi ?

Jesuo respondis : Vere, vere, mi diras al ci, se homo ne renaskiĝas per la spirito, li ne eniros en la regnon de Dio.

Ĉar Jesuo eksciis, ke la Fariseoj incitiĝis kontraŭ lin, tial ke lin sekvis granda nombro da disĉiploj, Li forlasis Judion kaj reiris Galileon.

Nu, li iris la plej mallongan vojon, kiu estas tra Samario.

Li do alvenis en urbon Samarian nomitan Siĥaro, proksime de la terbiene, kiun Jakobo iam donis al sia filo Jozefo.

Tie troviĝas la puto de Jakobo. Jesuo, lacigita de la vojirado, sidigis apud la puto. Kaj estis ĉirkaŭ la sesa horo de l'tago.

Al Samaria virino veninta por ĉerpi akvon, Jesuo diris: Donu al mi por trinki.

Ĉar liaj disĉiploj iris al la urbo por aĉeti nutraĵojn. Tiu Samaria virino respondis : Kiel ci, Judo, petas por trinki de mi, Samarianino ?

Ĉar la Judoj ne rilatumas kun la Samarianoj.

Jesuo respondis : Se ci konus tiun, kiu diras al ci : Donu al mi por trinki, eble ci mem estus petinta de li. Kaj eble li donus al ci vivan akvon.

La virino diris : Majstro, ci havas nenion por ĉerpi, kaj la puto estas profunda; de kie do ci ricevas tiun vivan akvon ?

Ĉu ci estas pli granda ol nia patro Jakobo, kiu donis al ni ĉi tiun puton kaj mem trinkis el ĝi kune kun siaj infanoj kaj brutoj ?

Jesuo respondis : Ĉu cia koro ne estas sekega roko ? Sed ĉu la parolo ne estas la bastono de Moseo, kiu flugigis akvon el rokoj ?

Vere, vere, mi diras al ci; kiu trinkos akvon el la puto, tiu ankoraŭ soifos.

Sed kiu trinkos la akvon parolan, tiu neniam soifos, kaj lia koro estos fonto, el kiu viva akvo elŝprucados ĝis la eterna vivo.

La virino diris : Majstro, donu do al mi da tiu akvo, ke mi ne plu soifu kaj ne venu plu ĉi tien por ĉerpi.

Jesuo diris : mi provos doni akvon el la nesekigebla fonto al ci, kaj ankaŭ al cia edzo, se ci volas lin voki kaj reveni kun li.

Sed la virino respondis : Edzon mi ne havas. Kaj Jesuo diris : Prave, Samario, ci diras : Edzon mi ne havas; Ĉar ci kunvivis kun pluraj mastroj, kaj tiu, kiun ci nun havas, ne estas edzo cia. Virino, ci diris pli vere, ol ci opiniis.

Nu Jesuo tiel parolis per similaĵo, ĉar jam ofte la Samarianoj ŝanĝis sian Dion, kaj ankoraŭ nun ili ne adoris tiun, kiun oni devas adori.

Kaj li diris, pli mallaŭte : Cetere, escepte de la Filo de Homo kaj de tiuj, kiuj lin komprenas, kie estas la koroj ne adultaj ?

Sed la virino ne aŭskultis tiujn lastajn vortojn, kaj, responde al la unuaj, ŝi diris : Mi ja vidas, Majstro, ke ci estas profeto.

Ĉar ŝi estis kvinfoje edziniĝinta, kaj la viro, kun kiu ŝi tiam vivis, ne estis ŝia edzo.

Sed, volante paroli pri alia afero, ŝi daŭrigis : Niaj patroj adoris sur tiu ĉi monto; kaj vi, vi diras, ke la loko, sur kiu oni devas adori, estas en Jerusalemo.

Jesuo respondis : Virino, kredu min, venas la tempo, kiam oni adoras la Patron nek sur tiu monto nek en Jerusalemo.

Nun vi adoras, kion vi ne konas, kaj tiuj, kiuj iradas en la Templon, adoras, kion ili ne konas.

Min koncerne, mi adoras, kion mi konas. Ĉar mi parolas al Dio el mia koro, kaj el koro venas kono.

Tial por pluraj venas la tempo, kiu estas por mi jam veninta; la tempo, kiam la veraj adorantoj adoras la Patron laŭ spirito kaj vero.

La virino diris : Mi scias, ke la Kristo estas venonta, kaj kiam li estos veninta, li anoncos al ni tiujn aferojn.

Sed Jesuo respondis : Ne atendu alian Kriston. Prefere demandu cian koro, kaj eble ĝi diros al ci, ke por ci la Kristo estas jam veninta.

Ĉar la Kristo ne estas homo; sed la Kristo estas parolo.

Dume liaj disĉiploj alvenis, kaj surprize vidis lin paroli kun tiu virino.

La virino lasis tie sian kruĉon kaj foriris al la urbo, kaj ŝi diris al tiulokaj homoj :

Venu vidi viron, kiu diris al mi ĉion, kion mi antaŭe faris : ĉu li ne estus la Kristo ?

Kaj pluraj el tiu urbo ekkredis, ke li estas la Kristo, pro la vortoj de tiu virino, kiu tiel atestis : Li diris

al mi ĉion, kion mi antaŭe faris.

La Samarianoj do venis al li kaj petis, ke li restu ĉe ili; kaj li restis du tagojn tie.

Kaj multaj estis konsolitaj aŭ fortigitaj per lia parolo.

Sed, kiel ĉiufoje, kiam ili metis en homon sian fidon, ili diris pri li : Jen estas la Kristo,

Samkiel ili estis dirintaj pri Teŭdaso, kaj pri Judaso el Gamalo, kaj pri Johano la Baptisto; samkiel pluraj estis dirintaj pri Herodo;

Kaj kiel, en tiuj samaj tagoj, ili diris pri Simono el Samario, de kiu rakontiĝis multaj mirindaĵoj, kaj kiun aliaj nomis : la granda virto de Dio.

Ĉapitro VII.

Du tagojn poste Jesuo reiris en Galileon kaj lia famo kuris tra la tuta lando.

Ĉar li instruadis en la sinagogoj kaj estis de ĉiuj honorata.

Sed li venis en Nazareton, kie li estis naskita kaj edukita; kaj, la tagon de l'sabato, li laŭ sia kutimo eniris en la sinagogon, kaj ekstaris por legi.

Oni prezentis al li la libron de profeto Jesajo; kaj, malferminte la libron, li trovis jenan paragrafon :

La spirito de la Sinjoro estas sur mi; tial li sanktoleis min kaj sendis min por anonci la Bonan Novaĵon al mizeruloj, por bandaĝi tiujn, kies koro estas vundita;

Por anonci liberon al kaptitoj kaj reakiron de l'vidado al blinduloj, por liberigi la prematojn kaj proklami la favorjaron de la Sinjoro.

Poste, refaldinte la libron kaj ĝin redoninte al la prezidanto de la kunveno, li sidiĝis; kaj ĉies okuloj en la sinagogo estis fiksitaj al li.

Tiam li komencis ekspliki la parolon el la Skribo, dirante : La spirito de la Sinjoro estas sur ĉiu homo, kies koro estas pura.

Ĉiu homo, kies koro estas pura, ricevis la veran sanktoleadon, kaj fariĝis kristo liberiganta la kaptitojn de la peko kaj de la leĝo, kaj redonanta la vidadon al la blindaj mensoj.

Kelkaj admiris la vortojn el lia buŝo. Sed pluraj pensis : Li atestas por si mem.

Kaj kolere ili diris : Ĉu ne jen estas tiu mallabor-ema ĉarpentisto, kiu profetumas por ne plu labori per siaj manoj ? Ĉu li ne estas tiu filo de Maria, tiu frato de Jakobo, de Joseso, Judaso kaj Simono ?

Kaj ili skandaligis pri li, dirante : Ĉu ne estas tiu, kies naskiĝo okazigis tiom da famoj ne honoraj por lia patrino ?

Sed Jesuo, aŭdante iliajn murmurojn, diris : Vere mi diras al vi, ke neniu profeto estas akceptata en sia patrio.

Mia parolo faris miraklojn en la koroj de la Kanaanoj kaj de la Samarianoj. Sed jen en Nazareto, neniu ĝin komprenas.

Vere mi diras al vi, ke estis pluraj vidvinoj en Izraelo en la tempo de Elijo, kiam la ĉielo estis fermita dum tri jaroj kaj ses monatoj, tiel ke okazis granda malsato en la tuta lando.

Tamen Elijo estis sendita al neniu el ili; sed ĉe unu vidvino en Sarepto, en la lando de Sidono, tie li multobligis farunon kaj oleon.

Gardu vin, Nazaretanoj, kaj ne estu similaj al tiuj vidvinoj el la domo Izraela, por kiuj la ĉielo restis fermita, tial ke ilia koro restis fermita, kaj kiuj mortis pro la malsatego.

Vere mi diras al vi, ke estis lepruloj en Izraelo en la tempo de Eliŝao la profeto. Kaj neniu el ili resanigis; sed sole Naamano, Siriano.

Gardu vin, Nazaretanoj, kaj ne restu similaj al tiuj lepruloj el la domo Izraela, kiuj ne resanigis, tial ke la lepro estis manĝinta eĉ ilian koron.

Ĉiuj en la sinagogo, aŭdante tiujn vortojn, tre incitigis kontraŭ lin.

Kaj, ekstarinte en tumulto, ili metis lin eksteren el la urbo; kaj ili trenis lin al la supro de l'monto por lin malsuprenĵeti.

Sed, eskapante el inter ili, li foriris.

Li iris al Kapernaumo, urbo ĉe la bordo de Genesareta Lago, sur la limlokoj inter Zebulono kaj Naftalio; kaj tie li instruis en sabatoj.

Li ĉiam paroladis en la nomo de sia koro kaj sin tur-

nis al la koro de la ĉeestantoj.

Sed ili aŭskultis kun miro; ili admiris anstataŭ kompreni, kaj ili konsentis al li aŭtoritaton, kiun li ne deziris;

Kaj ili daŭre ripetadis pri li kiel pri pluraj aliaj: Tiu ĉi estas la Kristo, kiu liberigos nin el la premado, el la korpaj malbonoj, el la Romianoj kaj el la imposto.

En la sinagogo estis viro malsana kaj senprudenta. Kaj oni diris, laŭ la kutimo de tiuj tempoj, ke li estas posedata de malpurega spirito.

Ĉar la frenezo de tiu viro parolis en li, li kredis, ke la malpurega spirito movas lian langon en lia buŝo. Kaj li laŭte ekkriis: Kio estas inter ni kaj ci, Jesuo Nazaretano? Ĉu ci venis por pereigi nin? Ĉar mi scias, kiu ci estas: ci estas la Sanktulo de Dio.

Sed Jesuo parolis al tiu viro, kiel oni parolas al frenezuloj. Kaj, esperante bonfari al la malsanulo, li ŝajnis, ke li sin turnas al la malpurega spirito, dirante kun minacoj:

Silentu, kaj eliru el ĉi tiu homo. Tiam la frenezulo sin ĵetis mezen de la kunestantaro, kvazaŭ puŝite de ne-rezistebla forto.

Kaj, haltante, li diris: Jen la demono min ĵetis inter vin, kaj poste li eliris el mi, farinte al mi nenian doloron.

Kaj li ridetis; kaj li estis kvieta, simila al homoj kun sana spirito; kaj li sin kredis por ĉiam liberigita; kaj ĉiuj kredis lin liberigita; kaj ankaŭ Jesuo kredis lin resanigita.

Tiam ĉiuj tie estantaj estis ekkaptitaj de admiro kaj teruro. Kaj ili diris: Kio estas tio? Li ordonas kun aŭtoritato kaj potenco al la malpuregaj spiritoj, kaj ili obeas lin.

Tiel lia famo disvastiĝis en ĉiuj partoj de l'ĉirkaŭa lando.

Kaj Jesuo, elirinte el la sinagogo, eniris en la domon de Simon-Petro. Nu la bopatrino de Simono suferis febron, kaj ili petis, ke li ŝin resanigu.

Do, veninte al ŝi, li prenis ŝian manon kaj longe ŝin rigardis milde. Poste li minacis la febron, ordonante, ke ŝi eliru.

Kaj la bopatrino de Simono sin sentis faciligita. Kaj, leviĝinte, ŝi servis al ili.

Ĉapitro VIII.

La morgaŭon, marŝante laŭlonge de Genesareta Lago, li renkontis du fratojn, kiuj inter la unuaj fariĝis liaj disĉiploj; kaj ili ĵetis siajn retojn en la lagon, ĉar ili estis fiŝkaptistoj.

Kaj li diris al ili : Venu kun mi, kaj mi faros el vi homkaptistojn.

Tuj, lasante siajn retojn, ili sekvis lin.

Li diris plie, ridetante : Antaŭe, kiam vi estis kaptintaj kelkajn fiŝojn, vi hejmen revenis kun via kaptajo.

De nun, faru prefere kiel mi, kaj via kaptado estos mirinda. Ĉar el ĉiuj fiŝoj, kiujn mi kaptas, mi faras fiŝistojn, ke ili kaptu por mi aliajn fiŝojn.

De tie pasante iom pli foren, li ekvidis du junulojn, kiuj amis liajn parolojn. Tiuj estis Jakobo, filo de Zebedeo, kaj Johano lia frato, kiuj ankaŭ estis en barko, riparante retojn.

Tuj li vokis ilin; kaj ili sekvis lin, lasante en la barko sian patron Zebedeon kaj liajn dungitojn.

Kun ili kaj kun Filipo kaj Natanaelo, li komencis trairadi tutan Galileon, instruante en la sinagogoj kaj predikante la Bonan Novaĵon de la Regno de Dio.

Kaj, kiam li renkontis iun el tiuj frenezuloj, kiuj sin kredas posedataj de demono, li rigardis lin milde kaj aŭtoritate, poste li ordonis al la demono eliri.

Kaj pluraj estis por ioma tempo faciligitaj.

Tiel disvastiĝis la famo, ke li kuracas ĉiujn malsanojn. Kaj oni diradis : Ĉu tio ne estas signo, ke li kuracos Izraelon kaj ke baldaŭ li forpelos la Romianojn, kiel li jam forpelas la demonojn ?

Kaj lin sekvadis granda amaso el la popoloj de Galileo. Kaj pluraj venis al li de Dekapolo, de Jerusalemo, de Judio kaj de la transjordanaj landoj.

Unu tagon, sur la bordo de Genesareta Lago, li estis premata de la amaso, kiu venis por aŭdi lian parolon.

Kaj, vidinte du barkojn, kies fiŝistoj eliris por lavi siajn retojn, li eniris en unu el tiuj barkoj, apartenanta al Simon-Petro.

Kaj li petis lin iomete malproksimiĝi de la bordo, kaj, sidiĝinte, li instruis la popolon de sur la barko.

Post kiam li ĉesis paroli al la popolo, li diris al Simono : Nun, antaŭen al akvo profunda; kaj ĵetu viajn retojn por fiŝkapti.

Simono respondis : Majstro, ni laboradis la tutan nokton, kaj nenion kaptis.

Sed Jesuo diris al li : Ankaŭ mi, kiam mi iris al Nazareto, kaptis neniun fiŝon. Kaj tiu sabata tago estis kiel nokto, en kiu ĉiufoje oni retiras siajn retojn malplenaj.

Eĉ iuj homoj volis min mortigi. Kaj tiu sabata tago estis nokto, en kiu la ŝtormo preskaŭ renversas la barakon.

Miaj vestoj estis dispecigitaj per la manoj de furiozuloj. Kaj tiu sabata tago estis nokto, en kiu la retoj implikiĝas ĉe herboj kaj rokoj, kaj oni relevas ilin nur disŝiritaj.

Tial mi ŝanĝis la lokon de mia fiŝkaptado. Mi venis en Kapernaumon kaj trairis tutan Galileon.

Sekve, vidu sur la bordo la popolon da fiŝoj, kiujn mi kolektis en la retoj de mia parolo.

Faru do, kion mi faris. Ŝanĝu la lokon de l'fiŝkaptado, kaj, se bezone, tranaĝu la tutan lagon, provante per ciaj retoj, ĉu estas fiŝoj ĉi tie aŭ tie. Kaj mi promesas, ke ci kaptos ion.

Simono lin obeis, kaj, ĵetinte siajn retojn en loko, kiun li ne konis, li retiris kelkajn fiŝojn.

Kaj li kredis, ke Jesuo faris signon favore al li, kaj li ekstremis en sia tuta korpo, kaj li volis fali antaŭ li sur la genuoj.

Sed la Majstro lin detenis kaj diris : Kion mi instruis al la fiŝkaptisto, tio utilu al la homkaptisto.

Nu, Simon-Petro estis el tiuj, kiuj admiris ĉion, kion faris Jesuo kaj kredis ĉiujn liajn parolojn. Sed ili miskomprenis lin; kaj ili diradis : Tiu ĉi estas la Kristo.

Kaj ĉion, kion ili kredis legi pri la Kristo en la Skriboj, ili ankaŭ kredis retrovi en la faroj de Jesuo.

Kaj ĉion, kion ili vidis en la faroj de Jesuo, ili ankaŭ kredis legi en la Skriboj.

Ĉar, se iu homo fiksas siajn rigardojn al la suno, ĉie, kien poste li turnas la okulojn, li vidas la bildon de l' suno.

Kaj la okuloj de ilia spirito ne konis alian lumon krom Jesuo nek alian spacon krom la Skriboj.

Tial, ĉie, kie ili rigardis en la mallumo de la Libro, ili retrovis la luman figuron, kiu plenigis iliajn okulojn kaj ilian spiriton.

La famo de Jesuo pli kaj pli disvastiĝadis, kaj popolamasoj kunvenadis por lin aŭdi, kaj ili petis, ke li liberigu ilin el iliaj malsanoj.

Jesuo diris al ili verojn, kiujn ili ne komprenis; kaj li iom pacigis ilian koron; kaj, kiam la malsano de l'korpo venis de la maltrankvilo de l'spirito, ili sin sentis faciligitaj.

Sed ofte li malgajiĝis, tial ke li estis miskomprenita, kaj tial ke oni nomis lin Kristo, kaj tial ke oni petis de li aferojn, kiuj ne dependas de li.

Kaj li diris en si mem : Akridon mi ne povis savi. Kaj li aŭdis en sia animo la plorĝemojn de l'kompato kaj la ridojn de la Malamiko; kaj li retiriĝis en solejojn por preĝi.

Unu tagon, kiam li alvenis de la dezerto al Kapernaumo, homoj venis al li kaj prezentis al li, portatan sur lito, viron, kiun ili diris paralizulo.

Nu, Jesuo distingis inter ili plurajn el la fariseoj, kiuj lin kontraŭdiris kaj insultis en la sinagogoj.

Kaj li ekvidis inter ili unu el tiuj, kiuj en Nazareto provis mortigi lin.

Kaj li rimarkis interŝanĝojn de rigardoj, kaj sufokatajn ridojn, kaj mallautajn parolojn.

Li do ekkonis la mensogon faldiĝantan en la koro de tiuj homoj, kaj ke ili donis kelkan monsumon al malriĉa viro, por ke li helpu ilin meti tiun kaptilon.

Tial Jesuo, sin turnante al tiu, kiu sin ŝajnigis paralizulo, rigardis lin en maniero montri, ke li ne estas trompita. Poste li skuis la kapon kun malgajo. Fine li milde diris al li : Iru en paco, frato mia, cia peko estas al ci pardonita.

Tial la skribistoj kaj fariseoj diris inter si : Li blasfemis. Kaj la Nazaretano diris : Necesas lin mortigi, laŭ la juĝo zelota.

Kaj ĉiuj diris : Kiu alia krom Dio povas pardoni la pekojn ?

Sed Jesuo aŭdis la murmurojn de unuj kaj la kriojn de aliaj, kaj li diris al ili : Kial estas malbonaj pensoj en viaj koroj, aŭ kial estas vortoj de malamo kaj kolero

sur viaj tremantaj lipoj ?

Ĉar kio estas pli facila : ĉu diri al tiu viro : Cia peko kontraŭ mi estas al ci pardonita; aŭ diri al li : Ĉar ciaj kruroj estas tiel firmaj kiel miaj, do leviĝu kaj marŝu ?

Sed al malbonuloj ĉio estas malbona, kaj eĉ mia bon-eco vin skandalas, kaj vi ne komprenas, ke mi volis domaĝi honton al tiu viro.

Do, por ke vi sciu, ke la Filo de Homo ne estas trompita per viaj mensogoj, nun mi diras al li : Leviĝu sur ciaj kruroj, kiuj ne estas malsanaj; ŝarĝu per tiu lito ciajn ŝultrojn, kiuj estas fortaj; kaj reiru en cian domon.

La viro tre honta leviĝis, kaj, forportante la liton, sur kiu li antaŭe kuŝis, foriris al sia domo.

Kaj la skribistoj kaj fariseoj, plenaj je kolero kaj konfuzo, disiris sen ion diri.

Tial la popolanoj iris ĉien ripetante : Ni vidis la Kriston. Kaj antaŭ ni, per la potenco de unu parolo, li resanigis paralizulon.

De tie foririnte, Jesuo ekvidis viron sidantan ĉe la impostoficejo. Tiu viro estis nomata Mateo, filo de Alfeo. Kaj li estis aŭdinta mirindajn rakontojn pri Jesuo.

Tial, ekvidante lin sekvatan de granda popolamaso, li sentis sian koron konfuzita kaj li duone leviĝis, kvazaŭ por lin sekvi.

Vidinte lian ekmovon kaj la tuton de amo kaj simpleco, kiu estis en liaj okuloj, Jesuo diris al li : Sekvu min, ĉar ci amas min.

Kaj Mateo, leviĝante, lin eksekvis.

Poste Mateo faris grandan festenon en sia domo; kaj granda amaso da impostistoj kaj pekuloj sidiĝis kun ili ĉe la manĝotablon.

Tion vidante, skribistoj kaj fariseoj diris al liaj disĉiploj : Kial via majstro manĝas kun impostistoj kaj pekuloj ?

Aŭdinte, Jesuo diris al ili : Ne la sanuloj bezonas kuraciston, sed ja la malsanuloj.

Sed, se malsanulo sin kredas sana, aŭ se li metas sian fidon en falsajn kuracilojn, tiu estas perdita, kaj la kuracisto havas nenion por fari ĉe li.

Iru do kaj lernu, kion signifas jena parolo : Kompat-

emon mi deziras, ne oferon.

Min koncerne, ne la korojn de l'justuloj mi venis ŝanĝi; ja la korojn de l'pekuloj.

Sed kiuj sin kredas justigitaj per oferoj kaj neglektas kompaton, ĉu ili ne estas tiuj malsanuloj, kiuj fidas falsajn kuracilojn kaj repuŝas la sanon? Kaj por tiaj, mi povas nenion.

Tiam kelkaj ĉeestantaj disĉiploj de Johano diris al li: Kial la fariseoj kaj ni ofte fastas; sed ne cialj disĉiploj?

Kaj Jesuo respondis: Se fasto estas kuracilo por kelkaj malsanuloj, ĉu tial vi fastigos la homojn, kiuj fartas bone, kaj laboras, kaj malsatas?

Kaj li diris al ili similaĵon: Ĉu fasto ne estas malnova eluzita vesto? Kaj ĉu ofero ne estas malnova vesto? Kaj la malboneco de tiuj, kiuj portas tro pezan ŝarĝon por devigi ankaŭ aliajn ĝin porti, ĉu ne estas malnova vesto?

Neniu ŝiras pecon el nova vesto por alkudri ĝin al malnova vesto; ĉar la nova fortirus parton el la malnova, kaj la ŝiro pligrandiĝus.

Kaj neniu verŝas novan vinon en malnovajn felsakojn; ĉar la nova vino krevigus la felsakojn kaj elverŝiĝus, kaj la vino kaj la felsakoj estus perditaj.

Ŝanĝu do viajn korojn, kaj metu en novajn ujojn la dolĉon kaj la forton de mia nova vino; tiel la vino kaj la vinujoj konserviĝos.

Forĵetu do vian malnovan veston, en ĉiuj partoj disŝiriĝantan, kaj surmetu la novan veston, kiun mi alportas al vi; vestu vin per mia ĝojo, mia paco kaj mia korfavoro.

Ĉapitro IX.

Okazis, en sabato nomata dua-unua, ke Jesuo pasis laŭlonge de grenkampoj, kaj liaj disĉiploj, malsataj, komencis disrompi spikojn kaj manĝi da ili.

Tiam Fariseoj diris al li: Kial ili faras, kion fari en sabato ne estas permesite?

Sed Jesuo respondis: Ĉu vi ne legis, kion faris Davido, kiam li kaj liaj kunuloj estis urgataj de malsato?

Ke li eniris en la domon de Dio kaj manĝis la panojn

de propono, kiujn manĝi estis permesite nek al li nek al liaj kunuloj, sed nur al la pastroj ?

Kaj ĉu vi ne komprenis, ke malsato estas leĝo pli forta ol la Leĝo ?

Aŭ ĉu vi ne legis, ke la pastroj atencadas la sabaton en la Templo, tamen senkulpe ?

Nu, mi diras al vi : Ĉie, kie estas homo, estas iu pli granda ol la Templo.

Kaj kiel la homo ne estus mastro eĉ de la sabato, Ĉar la sabato estas kreita por la homo, ne la homo por la sabato ?

De tie foririnte, li venis en ilian sinagogon kaj demandis al ili : Ĉu estas permesate bonfari en sabatoj, aŭ malbonfari ? Ĉu savi iun, aŭ lasi lin pereii ? Kaj ili silentis.

Tiam, ĉirkaŭrigardante ilin ĉiujn kun indigno, kaj afliktiĝante pro la malmildeco de ilia koro, li diris : Ĉu vi ne scias, kio okazis, en la tempo de niaj patroj, kun Hilelo, la granda rabeno,

Ke li svenis en la Templo en iu sabato, kaj doktoroj Ŝemajao kaj Abtaliono lin kuracis, dirante : Tia homo meritas, ke por li estu atencata la sankteco de l'sabato?

Sed mi, mi diras al vi, ke ĉiu homo meritas, ke por li estu atencata la sankteco de l'sabato.

Aŭ pli ĝuste, la sabato estas sankta tial, ke ĝi faciligas la homojn. Kaj la ripozo estas donita al la homo, por ke li reakiru forton, ne por ke li perdu la vivon.

Kiu el vi, posedanta ŝafon, se en sabato ĝi falos en fosajon, ne relevos kaj retiros ĝin ?

Ĉu do laŭ vi homo ne tiom valoras, kiom ŝafo ? Sed almenaŭ ne atribuu vian malsaĝon kaj vian kruelecon al la Patro, kiu estas en la Ĉielo.

Li donis al vi leĝojn laŭ la krueleco de via koro, por faciligi vian sklavon, vian bovon kaj vian azenon.

Sed vi, suprenlevante per krudaj manoj la leĝotabulojn, vi faras el ili premegan ŝarĝon sur tiuj, kiujn premegas jam la vivo.

Tiel, konservante la kruelecon de via koro, vi aldonas al ĝi la malsaĝecon de via spirito.

Kaj vi estas vere la idoj de Ŝamajo, tiu frenezulo, al kiu la sabato estis ne la ripozo de unu tago, sed la maltrankvilo de la tuta semajno.

Ĉar, ekde la tria tago, li malpermesis sendi leteron,

pro timo, ke tiu letero ne alvenos antaŭ la sabato.

Kaj li turmentiĝis por scii, en kiuj kondiĉoj estas permesate manĝi ovon elmetitan en sabato;

Tiel, ke li afliktiĝis en sia koro, ke la Eternulo ne trudis la sabaton al ovometantaj kokinoj.

Vere, vere, mi diras al vi, tiaj frenezuloj estas ne nur ridindaj; ili estas ja danĝeraj.

Ĉar, ĉu Ŝamajo ne trudis fastadon al sia novnaskita nepo, kun la risko igi la infanon morti ?

Vere, vere, mi diras al vi, sklavoj de la litero, kaj, en la nomo de l'litero, tiranoj al viaj fratoj, la litero mortigas, sed la spirito vivigas.

En tiu tempo, Jesuo supreniris sur monton por preĝi kaj mediti, kaj li tie pasigis la tutan nokton preĝante kaj meditante.

Kaj, tuj je la ektagiĝo, liaj disĉiploj venis kaj diris al li : Elektu dek du el ni por regi super la dek du triboj, kiam cia regno estos veninta.

Kaj Jesuo respondis : Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo. Kaj vi venis al mi por ricevi de mi bonon, sed ankaŭ por bonfari al aliaj, ne por ilin subpremi regante super ili.

Do, ĉar tion vi deziras, mi elektos dek du el vi, por ke ili estu servantoj de siaj fratoj, kiel mi estas via servanto.

Ĉar la fortulo devas fari pli da laboro por faciligi la malfortulon. Kaj mi penas preni de ĉiu el vi parton de lia ŝarĝo.

Kiu min amas kaj volas min simili, tiu do prenu, kiom li povos, la ŝarĝon de siaj fratoj.

Kaj li elektis dek du por ilin havi kun si, por ilin sendi anonci la Bonan Novaĵon,

Por ke ili resanigu la korojn kaj forpelu la malbonajn pensojn.

La unuaj estis du fratparoj : Jakobo, filo de Zebedeo, kaj Johano, frato de Jakobo, al kiuj li donis la nomon Boanerges, t.e. Tondridoj;

Kaj Simono, kiun li jam nomis Petro, kaj Andreo lia frato;

Poste Natanaelo, filo de Tolomeo; kaj Filipino, Mateo, Tomaso; kaj Jakobo, frato de Jesuo, kromnomita malgranda Jakobo, tial ke li estis malpli granda ol la filo de

Zebedeo;

Kaj Tadeo; kaj Simono, kiun oni nomis la Kanaano aŭ la Zeloto, tial ke li antaŭe estis disĉiplo de Judaso el Gamalo;

Kaj fine Judaso el vilaĝo Iskarioto, kiu estas tiu, kiu poste perfidis Jesuon.

Poste ili reiris domon; kaj granda homamaso tien kunvenis, tiel ke ili ne povis preni sian manĝon.

Kaj, kiam lia patrino kaj liaj fratoj aŭdis pri tio, ili venis serĉi lin; ĉar ili diris, ke li perdis la prudenton, kaj ke iafoje li svene falis.

Kaj Jakobo lia frato kredis al li, nur ne kiam li parolis kontraŭ la Leĝon. Sed liaj aliaj fratoj neniam kredis al li.

Kaj lia patrino jen kredis al li, jen favoraŭskultis la parolojn de liaj fratoj.

Do ili alvenis kaj, ekstere starante, ili sendis voki lin, kaj la amaso estis ĉirkaŭ li.

Kaj iu diris al li : Jen cia patrino kaj ciaj fratoj estas tie ekstere kaj deziras paroli al ci.

Sed li respondis : Kiu estas mia patrino kaj kiuj estas miaj fratoj ?

Kaj, etendante la manojn al siaj disĉiploj, li diris: Jen estas mia patrino kaj jen miaj fratoj.

Ĉar kiu amas juston kaj kompatemon, kiel mi amas juston kaj kompatemon, tiu estas mia frato; kaj li havas la saman Patron kiel mi; kaj nia Patro vivas en niaj koroj kaj en la ĉielo.

Ĉapitro X.

En tiu tempo Jesuo haltis sur vasta ebenaĵo kun la aro de siaj disĉiploj.

Kaj ĉirkaŭ ili estis amaso da popolanoj el Jerusalemo kaj el tuta Judio kaj el la marbordoj de Tiro kaj Sidono, venintaj por lin aŭdi, por pacigi siajn korojn kaj kuracigi siajn malsanojn.

Jesuo, rigardante al tiu tuta homamaso, diris :

Feliĉaj estas vi, malriĉaj, ĉar la Regno de Dio estas via.

Feliĉaj estas vi, malsataj, ĉar vi satiĝos.

Feliĉaj estas vi, plorantaj, ĉar vi estos en ĝojo.

Feliĉaj estos vi, kiam la homoj vin malamos, vin eligos el siaj sinagogoj, vin insultos, kaj elĵetos vian nomon kiel malbonan, tial ke vi benis la nomon de l'homo kaj malbenis la nomon de la leĝo, kiu insultas la nomon de l'homo.

Ĝoju vi en tiu tempo kaj tremu pro ĝojo, ĉar via rekompenco estos granda en la ĉielo, kaj iliaj patroj traktis tiel la profetojn.

Sed unu viro ekparolis el la mezo de l'popolo, kaj ĉiuj turnis al li sian rigardon.

Tiu viro estis altkreska kaj superis je kaplongo la tutan homamason; kaj li estis nomata Eleazaro, filo de Judaso el Gamalo.

Iam la popolo estis sekvinta lian patron, nomante lin Kristo kaj Reĝo de l'Judoj.

Sed la Romianoj sendis soldatojn kontraŭ Judason el Gamalo; kaj li estis mortigita, kaj tiuj, kiuj kuniĝis kun li, estis dispelitaj.

Tiam Eleazaro estis repreninta la agadon kaj la instruadon de sia patro. Kaj li ne permesis, ke oni pagu imposton al Romianoj.

Kaj li trairadis ĉiujn landojn de Galileo kaj Judio, anoncante, ke la jaron de l'promeso antaŭvenos la tago de l'venĝo.

Komence li amis Jesuon, kredante, ke Jesuo sampensas kiel li kaj lin helpos en lia agado.

Sed, kiam li konstatis, ke Jesuo predikas pacon, rilatas kun impostistoj, ne parolas kontraŭ la imposton kaj kontraŭ Cezaron, li fariĝis malamiko de Jesuo.

Tial, ekparolante per voĉo laŭta kiel tempesto, li kriis :

Ve al riĉuloj, ĉar ili jam ricevis sian konsolon.

Ve al satigitoj, ĉar ni mergos ilin en malsaton. Ve al nun ridantaj, ĉar ni plorigos ilin.

Tiam Jesuo, levante la manon, diris : Amu viajn malamikojn, bonfaru al tiuj, kiuj vin malamos.

Benu tiujn, kiuj vin malbenas, kaj preĝu por tiuj, kiuj vin ofendas.

Sed Eleazaro ekkriis : Tiel vi kuraĝigos ilin, ke ili denove vin ofendu.

Idoj de Izraelo, fuĝu la vortojn de tiu falsa Izraelido kaj malkuraĝulo, Jesuo el Nazareto.

Kaj venu kun la fortaj, ke vi mem fariĝu fortaj. Kaj perforte malfermu la pordon de l'Regno; ĉar viaj malamikoj staras malantaŭ la pordo, kontraŭante, ke vi malfermu.

Eleazaro aldonis ankoraŭ multajn aliajn parolojn kontraŭ la Romianojn kaj kontraŭ la imposton.

Nu, li diris per brua voĉo tion, kion la popolo jam aŭdis flustri en la profundo de sia koro. Tial la popolo sekvis lin.

Tiam Jesuo fortiriĝis sur monton, akompanate de siaj solaj disĉiploj.

Kaj, suprenirante, li diris al si mem: La subtileco de miaj fingroj kaj de mia parolo savas nek la akridon nek la etulojn envinditajn en la fadenoj de la Leĝo kaj en la reto de l'Romianoj.

Nu, mi estus senprudenta, se mi provus, antaŭ la tempo de l'Patro signita, ŝanĝi la koron de la araneo, kaj se mi dirus al ĝi: manĝu herbon kaj foliojn, ke ci ne plu malsatu la karnon de akridoj kaj muŝoj.

Alveninte sur la supro de l'monto, li restis longatempe silenta.

Kaj liaj disĉiploj silentis ĉirkaŭ li. Kiel pluvon atendas soifanta tero, pluraj atendis, kion li diros.

Aliaj aŭskultis en si la vortojn de Eleazaroresonadi kaj pludaŭri. Kaj tiuj vortoj estis similaj al demonoj moviĝantaj kaj enprofundiĝantaj en la koro.

Jesuo, ilin rigardinte, vidis la malgajan sekecon de la plibonaj, la malaman flamon de la aliaj, kaj ke ĉiuj bezonas la vivan akvon de lia parolo.

Tial, malfermante la buŝon, li komencis ilin instrui:

Feliĉaj la malriĉaj en spirito; ĉar la regno de l'ĉielo estas ilia.

Sed, ne lasante lin daŭrigi, Natanaelo, filo de Tolo-meo, lin demandis:

Sur la ebenaĵo, ci anoncis: Feliĉaj la malriĉaj. Nun ci anoncas: Feliĉaj la malriĉaj en spirito.

Kial aliĝis cia parolo, kaj kion signifas cia nova parolo?

Jesuo respondis: Sur ebenaĵo oni vidas malpli da aferoj, ol kiam oni sidas sur montosupro.

Sur la ebenaĵo mi estis homo, kiu vidas ankoraŭ malmulte da aferoj, kaj mi estis homo, kies lango balbutas.

Kaj, parolante al tiu popolo, kiu ne scias ĉion, kion

vi scias, mi provis diri al ili tion, kion ili povas kompreni.

Nun mi estas homo, kiu vidas iom pli da aferoj, kaj mi estas homo, kies lango estas liberigita. Kaj mi volas diri ĉion, kion mi vidas, por ke vi komprenu.

Kiam sur la ebenaĵo mi diris : Feliĉaj la malriĉaj; ili aŭdis : Ve al riĉaj. Kaj ili deziris malbonfari al riĉuloj.

Nu, ĉu ne sufiĉas, ke la riĉaj malbonfaras al malriĉaj ? Kaj kial la malriĉaj malbonfaras al riĉaj ?

La malriĉuloj, pri kiuj mi parolis, ĉu ili ne estas similaj al la riĉuloj, loĝantaj sur la sama ebenaĵo kaj malfeliĉaj de la sama malfeliĉo ?

Ve! ho ve sur ĉiuj sklavoj de riĉaĵoj. Sed tiu sklaveco estas duspeca :

Kelkaj estas posedataj de la riĉaĵoj, kiujn ili havas; sed multaj estas posedataj de la riĉaĵoj, kiujn ili ne havas.

Kaj la deziro de la duaj, kiel la maltrankvilo de la unuaj, ĉu ne estas sklaveco kaj geheno ?

La timo perdi kaj la timo ne akiri, ĉu ne estas la sama malbono vidata de du diferencaj flankoj ?

Nu, kiu marŝas sub la pezo de l'tago kaj sub premeĝa ŝarĝo, tiu ne estos faciligita, se li turnas la ŝarĝon sur siaj ŝultroj, supren metante tion, kio estis malsupre, malsupren tion, kio estis supre.

Feliĉa estos nur tiu, kiu, scipovinte reĵeti la ŝarĝon kaj la memoron pri la ŝarĝo, marŝos kun liberigita korpo kaj liberigita spirito.

Feliĉaj estas, kiuj, estante mem en afliktiĝo, ne amuziĝas per la espero, ke aliaj siavice estos en afliktiĝo; ĉar tiuj solaj estos por ĉiam konsolitaj.

Feliĉaj la mildakoraj, ĉar, kiam iliheredos la teron, tio ne estos unutaga venko kaj unuhora konkero; sed tio estos eterna ĝojo.

Feliĉaj tiuj, kiuj, malsatante kaj soifante juston, ne provas satigi kaj refreŝigi sin per uzo de perforito kaj per sango.

Ĉar kiuj sin kredas justaj kaj volas uzi perforiton, tiuj estas malsatuloj, kiuj, malesperante iam renkonti panon, prenas al sia buŝo ŝtonojn.

Kaj ili provas la Sinjoron sian Dion. Sed Dio ne faros mirindaĵon favore al ili, kaj ili rompos siajn den-

tojn sur la ŝtonoj.

Kaj kiam fine ili eltrovos la panon de justo, la sangantaj dentkarnoj de tiuj malsaĝuloj jam ne povos mordi en la pano.

Sed la malsataj de justo, kiuj estos deflankiĝintaj de perforto, tiuj iam estos satigitaj.

Feliĉaj la kompatemaj; ĉar ili solaj ricevos kompaton.

Ho miaj tre amataj filoj, vi estas la salo de la tero; sed se la salo perdos sian guston, kiel oni ĝin redonos al ĝi? Kaj se justo fariĝos trudo kaj perforto, per kio oni ankoraŭ faros juston?

Vi estas la lumo de l'mondo. Ne lasu veni ĝis via flamo la malpuraĵojn, kiuj komence, ĉirkaŭigante vin per malbonodora fumo, vin kaŝas al ĉiuj okuloj, kaj baldaŭ vin estingus.

Kaj mi, filoj miaj, kion mi venis fari inter vi? Ĉu mi venis por detrui la Leĝon, aŭ por ĝin plenumi?

Sed kio estas la Leĝo? Ĉu la urbo, en kiun oni iru? Ĉu nur vojo, kiun oni povas sekvi? La Leĝo estas vojo al justo.

Do, kiuj estas alvenintaj en la urbo, tiuj jam ne bezonas sekvi la vojon. Per kiu ajn rimedo ili venis, estas kvazaŭ ili laŭiris la tutan vojon.

Kaj kiuj atingis juston, tiuj detruu la leĝon en sia koro. Ĉar ili ĝin plenumis, kaj ĝi jam ne povas utili al ili, kaj ĝi povus al ili malutili.

La vojo kondukas ĝis la pordo de la urbo. Sed en la urbo ĝi ne estas plu la vojo.

Ne restu ekster la muroj, sed rapide eniru en la urbon, kaj jam ne eliru, kaj ne erarvagu plu en la turnoj de la vojo, kaj ne penadu plu sub la suno sur la seko de la vojo.

Sed lavu viajn piedojn, ke sur ili ne restu plu eĉ unu polvo de la vojo.

Ĉar vere, mi diras al vi, se via justeco ne superas tiun de la skribistoj kaj de la fariseoj, vi ne eniros en la regionon de l'ĉielo.

Vi aŭdis, ke estas dirite al la antikvuloj: Ne mortigu, kaj kiu mortigos, tiu estos punita de la juĝisto.

Sed mi, mi diras al vi: Kiu ajn ekkoleros kontraŭ sian fraton, tiu estos punita de la juĝisto; kaj kiu malŝate sin deturnas de sia frato, tiu estos punita de

la juĝistaro; kaj kiu penas vundi sian fraton per la parolo, tiu estos punita per la fajrogeheno.

Do, se ci prezentas cian oferon ĉe la altaro, kaj tie ekmemoras, ke cia frato havas ion kontraŭ cin,

Lasu tie cian oferon antaŭ la altaro aŭ for de la altaro, kaj iru unue repaciĝi kun cia frato; poste, re-venu prezenti cian oferon, aŭ ne revenu.

Ĉar la Patro volas, ke liaj filoj vivu en paco, kaj li postulas de ili neniun alian oferon, sed li estas de longe naŭzita per la oferoj.

Vi aŭdis, ke estas dirite : Okulon pro okulo kaj denton pro dento.

Sed mi, mi diras al vi : ne rezistu al malbonulo; sed, se iu cin frapas sur la dekstra vango,

Ne frapu lin kaj ne retroiru antaŭ li;

Sed diru al li : Frato mia, kion ci ĵus faris, tio neniel min doloris. Kaj ci, ĉu ci bezonas frapi min ankaŭ sur la alia vango por vidi en cia koro, ke ci dolorigis al ci mem ?

Kaj se iu deziras procesi kontraŭ cin por ricevi cian tunikon, lasu lin preni ankaŭ cian mantelon.

Kaj se iu, gvidanton bezonante, volas trudi cin fari mil paŝojn kun li, faru dumil.

Donu al tiu, kiu petas de ci, kaj ne deturnu cin de tiu, kiu volas prunti de ci.

Ĉar, se ci cin deturnos, eble li mortos. Kaj se okazos, ke li mortos, ĉu ci kuraĝos diri antaŭ ci mem : Mi ne estas murdiinto ?

Vi aŭdis, ke estas dirite : Amu cian proksimulon kaj malamamikon.

Sed mi, mi diras al vi : Amu viajn malamikojn.

Simono, kromnomita la Kanaano aŭ la Zeloto, interrompis la Majstron, dirante :

La Leĝo ordonas, ke mi amu miajn malamikojn. Sed ĝi volas, ke mi malamamikon la malamikojn de Izraelo.

Jesuo respondis : Ĉu la Gentanoj* ne havas la saman Patron, kiel ni ? Sed ili ne konas lin, kaj ni lin konas.

Ja per amo ni igos aliajn koni tion, kion konas jam

* Gentanoj aŭ Nacianoj : aligentanoj, anoj de aliaj gentoj ol izraela.

nia koro; ne per malamo.

Se cia frato, estinte longajn jarojn for de l'domo, cin renkontas sur vojo kaj ne rekonas cin,

Ĉu lin insultante kaj frapante ci igos lin rekoni cin? Ĉu ne pli ĝuste per dolĉaj vortoj kaj brakumoj?

Mi diras al ci, pluraj venantaj de Oriento kaj Okcidento, de Nordo kaj Sudo, ricevos lokon ĉe la festeno en la Regno de l'Ĉielo,

Dum aliaj, inter la unue vokitaj de la profetoj al festeno kaj al lumo, estos forĵetitaj en la eksteran mal-lumon.

Ĉar Abrahamo ne estis cirkumcidita, kiam Dio lin elektis por fari kun li interligon.

Kaj la rabenoj diras, ke la filino de Faraono, kiu savis Moseon, estis Izraelidino. Kaj se ci demandas kial, ili respondas: Tial, ke ŝi adoris ununuran Dion, kreinton de la ĉielo kaj de la tero,

Kaj tial, ke ŝia koro ŝin klinis, por ilin relevi kaj savi, al pereontoj.

Kaj, longe post kiam la Eternulo elektis por si popolon, li amis, pli el ĉiujn homojn el tiu popolo, Ijobon, kiu estis Gentano el lando Uco,

Sed kiu estis pli bona ol ĉiuj el Izraelo.

Kaj ĉu li ne diris, per la vorto de profeto Hoŝeo: Mi nomos mia popolo tiujn, kiuj ne estis mia popolo; mia amatino tiun, kiun mi ne amis; kaj mia favorato tiun, kiun antaŭe mi ne favoris.

Tiel, ke en la sama loko, kie mi antaŭe diris al ili: Vi ne estas mia popolo, ili estos nomataj idoj de l'vivanta Dio.

Ci, Simono, do vidu, kun kiuj ci volas esti. Ĉar la Patro en la ĉielo konas nek Gentanojn nek Izraelidojn; sed li forĵetas la infanojn de pafarko kaj milito.

Kaj li adoptas la infanojn de paco kaj kompatemo; tiujn, kiuj scias, ke bono ĉiam restas bono; tiujn, kiuj produktas bonajn fruktojn, ne demandante, kies mano ilin kolektos.

Li levas sian sunon sur la malbonajn kaj sur la bonajn, kaj sendas pluvon sur la justajn kaj la maljustajn.

Vi do, se vi amas nur tiujn, kiuj amas vin, kian meriton vi havas? Ĉu ne tion saman faras eĉ la impostistoj?

Kaj se vi amas nur tiujn, kiuj kunbatalas vian batalon, kion ekstran vi faras? Ĉu ne tion saman faras la solda-

toj de armeo kaj la rabistoj de bando ?

Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta.

Ĉapitro XI.

Kiam vi preĝas, ne faru vantajn ripetadojn, kiel la paganoj, kaj ne parolu multajn vortojn, kaj ne petu apartajn aferojn.

Ĉar eble kion vi petus, tio estus malbona, kaj via Patro scias, plibone ol vi, kion vi bezonas.

Vi do preĝu jene : Patro nia, kiu estas en la ĉielo, cia nomo estu sanktigita;

Venu cia regno anstataŭi la regnon de la homoj kaj de la Leĝo; plenumiĝu cia volo, kiu estas paco, justo kaj amo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero;

Donu al ni hodiaŭ nian panon ĉiutagan;

Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al ĉiuj niaj ŝuldantoj;

Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la interna malbono. Ĉar nur al ci apartenas la reĝeco, la potenco kaj la eterna gloro.

Se vi pardonos, al kiuj vin ofendis, kaj se vi nenion postulos de viaj ŝuldantoj, ankaŭ al vi pardonos via Patro.

Sed se vi ne pardonas, kaj se vi turmentas viajn ŝuldantojn, kial via Patro vin pardonos ?

Ne amasigu por vi trezorojn ekstere, kie vermoj kaj rusto ĉion konsumas, kie ŝtelistoj traboras kaj rabas.

Amasigu trezorojn en via spirito; aŭ prefere, ĉiu el vi fariĝu trezoro grandiganta, en kiun penetras nek ŝtelistoj, nek rusto nek vermoj.

Ĉar kie estas cia trezoro, tie estos ankaŭ cia koro. Gardu do, ke ci ne metu cian koron en la eksteran mallumon, kaj ne elmetu ĝin al ĉiaj hazardoj.

Cia okulo estas la torĉo de cia korpo. Se cia okulo estas sana, cia tuta korpo estos luma.

Sed se cia okulo estas malbona, cia tuta korpo estos malluma. Se la lumo en ci fariĝos mallumo, kiel densa estos la mallumo !

Neniu povas servi du mastrojn; ĉar se li amas unu, li malamas la alian; kaj se li honoras tiun, li malŝa-

tas tiun ĉi. Ci ne povas servi Dion kaj Mamonon; ci ne povas servi monon kaj juston.

Tial mi diras al vi : Ne zorgu pri via vivo, scivolante, kion vi manĝos kaj trinkos; nek pri via korpo, per kio vi estos vestitaj. Ĉu la vivo ne estas pli ol nutraĵo kaj la korpo pli ol vestaĵo ?

Rigardu la birdojn de la ĉielo : ili ne semas nek rikoltas nek kolektas en grenejoj. Tamen via ĉiela Patro ilin nutras kaj varme vestas.

Ĉu vi ne multe pli valoras ol la birdoj de la ĉielo? Jes, multe pli aŭ multe malpli.

Unu justa ago prikantas la gloron de l'Patro pli bele ol tuta printempo de najtingaloj. Sed maljusta ago ŝajnas al via Patro pli kruela ol tuta monto de agloj kaj vulturoj.

Certaj venenaj herboj havas florojn, kiuj, tuŝate, malbonodoras. La zorgo de tiuj, kiuj diradas : Kion ni manĝos ? Kion ni trinkos ? estas venena herbo; ĝi produktas nur maljustajn agojn kaj malbonodorajn florojn.

Lasu do tiajn zorgojn al paganoj. Ĉar vere, mi diras al vi, estas ja la zorgo pri riĉaĵoj, kiu kaŭzas ilian malriĉon.

Sed vi, serĉu unue la Regnon de Dio kaj lian juston, kaj ĉio cetera estos al vi ekstre donita.

Ĉar maljusto senvestigas mil malriĉulojn kaj lasas ilin morti pro malvarmo por ŝarĝegi riĉulon per la pezo de mil vestoj.

Kaj, ĵetante la tutan nutraĵon sur malmulte da tabloj, ĝi kaŭzas, ke multaj homoj mortas pro malsato, kaj ke kelkaj homoj mortas pro tromanĝo.

Sed justo varme kovros ĉiujn homojn kaj troŝarĝos ne niun; ĝi nutros ĉiujn, tuj kiam ĉiuj forĵetos la malbelon tro manĝi kaj vomii.

Sed ne kedu, ke ĝi donos nur panon kaj vestojn. Ankaŭ feliĉon ĝi disdonos.

Ĉar justo nutras ne nur per greno, sed ankaŭ per amo; kaj, kiam ni estos enirintaj en ĝian regnon, la amo tenos niajn korojn varmaj, kiel la vestoj tenos ĉies korpojn varmaj.

Ne zorgu pri la morgaŭo. Sed unue la hodiaŭo zorgu pri si mem. Tial, ke pluraj volas esti morgaŭ riĉaj, multaj mortas hodiaŭ.

Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝataj.

Ĉar per kia juĝo vi juĝis, per tia oni juĝos vin; kaj per kia mezuro vi mezuris, per tia oni vin mezuros.

Kial ci rigardas pajleron en la okulo de cia frato, dum ci ne vidas trabon en cia ?

Aù kial ci diras al cia frato : Permesu, ke mi eltiru tiun pajleron el cia okulo, ci, kiu havas trabon en cia propra ?

Hipokritulo ! unue eltiru la trabon el cia okulo, kaj poste ci pripensos eltiri la pajleron el la okulo de cia frato.

Ĉu vi ne aùdis, ke en la tempo de niaj patroj, iu pagano mokis Ŝamajon dirante :

Instruu al mi la tutan Leĝon, starante sur unu sola piedo, kaj mi ne havos alian dion krom cia Dio.

Sed Ŝamajo ekprenis bastonon kaj kuris al la pagano por lin baŝi.

Kaj tiu pagano iris al Hilelo kaj diris al li la samajn mokojn.

Sed Hilelo respondis : Kion ci volas, ke la homoj faru al ci, ĉion tion faru al la homoj. Kaj li silentis.

Tiam la pagano demandis : Ĉu estas ĉio ? Kaj Hilelo respondis : Estas ĉio. Kion plian oni diros al ci, tio estos mensogo aù komento.

Zorge vin gardu de la falsaj profetoj, kia Eleazaro kaj de la falsaj doktoroj, kia Ŝamajo. Ĉar ne ĉiam ili venas kun krioj aù kun bastonoj. Sed pluraj, kiuj venas kovritaj per ŝafinaj feloj, interne estas rabaj lupoj.

La profetojn kaj doktorojn vi konos ne laù iliaj vortoj kaj doktrinoj, sed laù iliaj fruktoj : ĉu el dornarbustoj oni kolektas vinberojn aù el kardoj figojn ?

Bona arbo ne povas doni malbonajn fruktojn nek malbona arbo doni bonajn fruktojn.

Ĉiu arbo, kiu ne donas bonajn fruktojn, estas dehakota kaj en fajron ĵetota.

Do, kiu aùdas tiujn miajn parolojn per siaj oreloj kaj per sia koro, kaj metas ilin en praktikon, tiun mi komparas kun prudenta homo, kiu konstruis sian domon sur roko; kaj falis pluvo, kaj torentoj elbordigis, kaj ventoj blovis kaj sin ĵetegis al tiu domo; ĝi ne falis, ĉar ĝi estis bazita sur roko.

Sed kiu aŭdas miajn parolojn nur per siaj oreloj, kaj ne metas ilin en praktikon, tiun, eĉ se li ripetas miajn vortojn al ĉiu renkontato, tiun mi komparas kun senprudenta homo, kiu konstruis sian domon sur sablo;

Kaj falis pluvo, kaj torentoj elbordiĝis, kaj ventoj blovis kaj sin ĵetegis al tiu domo; kaj ĝi disfalis, kaj granda estis ĝia ruiniĝo.

Kiam Jesuo estis fininta tiun paroladon, la disĉiploj admiris.

Ĉar li instruis la grandajn aferojn, kiujn oni povas aŭdi per la koro; sed li ne instruis, kiel la skribistoj kaj la pastroj, la malgrandajn neutilajn aferojn, kiuj amuzas aŭ embarasas la spiriton.

Kaj li ne instruis, kiel la skribistoj kaj la pastroj, kun troservemo kaj ordonemo, kiel sklavo ripetanta al aliaj sklavoj la ordonojn de mastro.

Sed li instruis kun libero, kiel homo al homoj parolanta, kiel koro al aliaj koroj elverŝanta.

Ĉapitro XII.

Jesuo iradis de urbo al urbo kaj de vilaĝo al vilaĝo, predikante kaj anoncante la Regnon de Dio.

Kaj grandaj popolamasoj kunvenadis ĉirkaŭ li por aŭdi lian parolon.

Sed, kiam li estis en Galileo, la popolo kunvenis ĉirkaŭ li malpli multope, ol ĉirkaŭ Kristo Eleazaro, kiu parolis kontraŭ la imposton kaj kontraŭ la Romianojn.

Kaj, kiam li estis en Samario, la popolo kunvenis ĉirkaŭ li malpli multope, ol ĉirkaŭ Kristo Simono.

Ĉar oni diris pri Simono, ke li estas la granda virto de Dio, ke li resanigas ĉiujn malsanulojn kaj revivigas la mortintojn.

Tial ĉiuj, etaj kaj grandaj, sin ligis al Kristo Simono, kaj li renversis iliajn mensojn per siaj sortoj.

Li aperigis antaŭ iliaj okuloj tablojn ŝargitajn per floroj kaj fruktoj; kaj neniu sciis, de kie venis tiuj tabloj.

Poste li malaperigis ilin; kaj neniu sciis, kie ili fariĝis.

Unu tagon, ĉirkaŭ Jesuo sin premis popolamaso, ĉar de

ĉiu urbo venis al li pluraj; kaj ili volis fari lin reĝo. Sed li diris al ili parabole :

La Regno de l'Ĉielo estas simila al homo fortika, kun bona korpkonsisto kaj sen ia kriplajo.

Tiu homo renkontis lamulon, kiu pene sin trenis apogante sin sur du lambastonoj.

Kaj la lamulo diris al la fortulo : Mi kompatas al ci pro cia malriĉo, ci, kiu eĉ ne posedas paron da lambastonoj. Mi, nenombreblajn mi posedas. Venu en mian domon, kaj mi donos al ci kelke da ili.

Sed la fortulo ekridis, kaj forirante li respondis : Lambastonojn mi neniel bezonas.

Kiuj tie pasis kaj tion aŭdis, tiuj eksciis, ke la mastro de la lambastonoj malpli valoras ol la fortulo, ne nur tial, ke li lamas, sed ankaŭ tial, ke li estas malsaĝa.

Vi do, kiam al tiu, kiu estas justa kaj malriĉa en spirito, vi venas oferi reĝecon aŭ riĉaĵojn, ĉu vi ne igas vin similaj al la malsaĝulo, kiu venis oferi lambastonojn al la fortulo ?

Tiam iu el la popolo diris : Ne ĉiuj riĉuloj estas lamaj.

Kaj alia diris : Estas reĝoj, kiuj marŝas rekte, kaj nek Cezaro nek Herodo nek la prokuratoro lamas.

Jesuo respondis : Ŝiru de Herodo la reĝecon, aŭ de Cezaro la imperion. Poste rigardu, ĉu ili ploras aŭ ne. Ĉar se ili ne ploras, do ili estis embarasitaj per neutilaj lambastonoj.

Sed se, perdinte ion fremdan, ili ploras, do ili estas kriplaj kaj nekapablaj propraforte sin teni.

Ĉar la lamulo estas la sola homo, kiu ploras tial, ke li estas senigita je lambastonoj.

Riĉulo diris : Ci estas malsaĝa, kaj, malgraŭ cia envia parolo, mi estas pli feliĉa ol la malriĉuloj.

Kaj tion pravas, ke la malriĉuloj rigardas al mi kun enviaj okuloj, kaj ili dezirus esti sur mia loko.

Jesuo respondis : Ci estas ja malpli malfeliĉa ol la malriĉulo, kiu riĉaĵojn deziras.

Ĉar tiu estas lama, kiel ci, sed li ne havas lambastonojn.

Kaj en li estas demono, kiu suferas pro tio, kion ci posedas; kaj en ci estas demono, kiu ĝuas kaj sin gloras pro tio, ke la malriĉulo nenion posedas.

Ĉar ekzistas lamuloj pli malicaj ol tiu, pri kiu mi parolis, kaj ilia malico ĝojas, kiam ili vidas aliajn lamulojn senigitajn je lambastonoj.

Tamen ci, se iam la Patro donos al ci marŝi sur fortaj rektaj kruroj, tiam ci estos vere feliĉa.

Kaj ci imitos tiun paganon, kiu lamis sekve de akcidento, kaj resaniĝis.

Li kredis, ke lin sanigis demono nomata Asklepio, kaj li pendigis siajn lambastonojn en la templo de Asklepio.

Se do iam ci resaniĝos el cia kripleco, ci vendos siajn bienojn kaj disdonos la monon al malriĉuloj.

Ĉar la manoj de la malriĉuloj estas la manoj, kiujn la Patro etendas al ci, kiam li deziras, ke ci donu ion al li.

Pluraj komprenis, kion diris Jesuo, kaj vidis la veron de liaj paroloj.

La malriĉaj inter ili estis konsolitaj kaj feliĉaj.

Kaj unu el ili, kiu estis riĉa, diris : Mi vendos miajn bienojn kaj mi donos la monon al malriĉuloj.

Nu, ĉio, kion faris Jesuo, estis raportata al Johano de ties disĉiploj.

Sed ili miksis veron kun eraro; kaj ili diris al Johano, ke Jesuo sin proklamas Kristo, ke li resanigas la korpe malsanajn kaj aperigas signojn en la ĉielo.

Tial Johano maltrankviliĝis pro tio, kion li aŭdis, kaj ektimis, ĉu Jesuo ne estus ŝajniganto, kiel Kristo Simono el Samario.

Oni ankaŭ diris al li, ke Jesuo estas milda al riĉuloj kaj potenculoj, ke li manĝas kaj trinkas kun impostistoj kaj pekuloj, ke li ne fastas, ke liaj disĉiploj ne lavas sin antaŭmanĝe, kaj ke li malkonfesis la bapton de pento kaj inicado.

Tial Johano vokis du el siaj disĉiploj kaj sendis ilin al Jesuo por diri al li : Ĉu ci vere estas la venonto post mi ?

Aŭ ĉu mi elektu iun alian, por ke tiu daŭrigu mian agadon, ke li baptu en la bapto de akvo kaj pureco,

Kaj ke li diru al la tuta popolo : Sangŭ viajn korojn, kaj baptu vin mem en la bapto de amo kaj fajro ?

Tiuj viroj, veninte al Jesuo, diris al li : Johano la Baptisto sendis nin al ci por cin demandi : Ĉu ci vere estas la venonto post mi ?

Aù ĉu mi elektu iun alian, ke tiu daŭrigu mian agadon kaj baptu en mia nomo ?

Nu, en tiu sama horo, Jesuo ĵus diris la similaĵon pri la lambastonoj. Kaj malriĉuloj kantis sian ĝojon. Kaj riĉuloj disdonis monon.

Kaj eĉ unu riĉulo diris : Mi vendos ĉiujn miajn bienojn, kaj mi plenigos la manojn de malriĉuloj;

Ĉar la manoj de la malriĉuloj estas la manoj, kiujn etendas al ni la Eternulo, kiam li volas, ke ni donu ion al li.

Do Jesuo respondis al la disĉiploj de Johano : Iru kaj raportu, kion vi vidis kaj aŭdis :

Ke blindaj spiritoj reakiras vidkapablon; ke tiuj, kiuj lamis, nun marŝas sen lambastonoj; ke lepraj pensoj estas purigitaj; ke surdaj koroj aŭdas; ke mortintaj justoj reviviĝas, kaj ke la Bona Novaĵo estas anoncata al la malriĉuloj.

Kaj diru al Johano plie : Feliĉa estas tiu, kiu ne skandaliĝas pro tio, ke lia frato ne havas la saman parolmanieron, kiel li, ne diras la samajn parabolojn kaj ne faras la samajn gestojn.

Kiam la senditoj de Johano estis for, Jesuo komencis paroli pri Johano al la popolo, kaj diris : Por kion vidi vi iris en la dezerton ?

Ĉu viron ŝanĝigeman kaj ĉesantan ami sian fraton, tuj kiam lia frato, grandiĝinte, ne marŝas plu en lia ombro ? Ĉu kanon de l'vento skuatan ?

Sed ankaŭ, kion vi iris vidi ? Ĉu viron vestitan per altprezaj vestoj ? Vi scias, ke ja en reĝaj palacoj troviĝas tiuj, kiuj estas belege vestitaj kaj vivas en ĝuado.

Kion do vi iris vidi en la dezerto ? Viron, kiu marŝis rekte sen lambastonoj, kaj estis puriginta sian koron de ĉiuj malpurigoj, escepte de la orgojla malpurigo;

Profeton, kiu konis multe da veraĵoj, kaj kuraĝe diris ilin. Sed hodiaŭ li incitiĝas kontraŭ tiujn, kiuj konas aliajn veraĵojn krom liaj.

Koncerne min, mi ne incitiĝos kontraŭ lin, kaj mia buŝo estos plena de laŭdo al li. Ĉar li venis antaŭ mi kaj li instruis al mi, kion li sciis.

Li grandiĝis kaj fortiĝis antaŭ mi; kaj li helptenis min per la mano, por ke mi supreniru ĝis lia vero.

Kaj, dank'al li, suprenirinte sen laciĝo ĝis la loko, kie li pene alvenis, mi povis poste supreniri je unu ŝtu-

po pli alten.

Faru do kun mi, kion mi faris kun li. Akceptu mian manon por veni ĝis mia vero. Kaj, tie alveninte sen lacigo, vi poste supreniros pli alten ol mi en pli da lumo.

Ĉar unu Fariseo petis lin manĝi ĉe li, Jesuo eniris en la domon de la Fariseo kaj altablĝis.

Maria Magdalena*, kiu iam estis malĉastino, kaj de kelka tempo aŭskultadis Jesuon inter la homamasoj, eksciante, ke li sidas ĉe la manĝotablo en la domo de l'Fariseo, tien kunportis alabastran vazon plenan de parfumo.

Kaj, starante malantaŭ Jesuo, ŝi verŝis la parfumon sur lian kapon; kaj ŝi verŝis larmojn, kaj timeme tuŝis liajn harojn per siaj manoj kaj siaj lipoj.

Tion vidante, la Fariseo, kiu lin invitis, diris al li : CIAJ DISĈIPLĜJ CIN ANONCAS KIEL PROFETON, KAJ JEN CI NE SCIAS, KIU VIRINO CIN TUŜAS, KAJ KE ŜI ESTAS MALĈASTA.

Jesuo respondis : SIMONO, CI ESTAS PLI MALBONA PROFETO OL MI. ĈAR, KIAM CI VIDAS ARBON, KIES ŜELO ESTAS MALGLATA, CI DIRAS : TIU ARBO ESTAS MALBONA;

Kaj ci ne levas la kapon por vidi, ĉu la arbo kun malglata ŝelo ne portas bonajn fruktojn.

Kaj, kiam ci vidas iun, kiu ne vivas konforme al la Leĝo, ci diras : TIU ĈI ESTAS MALBONA.

Sed ci konas nur la literon kaj la ŝelon de la Leĝo, kaj ĝi cin erarigas en ĉiuj kiaj juĝoj.

Kaj, neniel diveninte el la koro de tiu ĉi virino, ci eĉ ne vidis ŝiajn larmojn.

Simono, ci estas tiel malbona profeto, ke eĉ apud la bordo de rivereto, ci ne scias, ke suprenirante pli alten ci trovus la fonton.

Mi eniris en cian domon, kaj ci ne ŝmiris mian kapon per oleo; sed tiu virino verŝis sur miajn harojn balzamodoran oleon, kaj ankoraŭ pli bonodorajn larmojn, kaj ki-sojn, kiuj odoras bonecon kaj amon.

Tial mi diras al ci, ke ŝiaj pekoj, kiuj estas multaj, estas al ŝi pardonitaj, ĉar ŝi multe amis; sed al kiuj malpli amas, estos malpli pardonite.

Nu, la Fariseo diris al li : KIU DO CI ESTAS, KE CI PEKOJN PARDONAS ? KAJ KIU KROM DIO HAVAS TIAN POTENCON ?

* Maria Magdalena = Maria el Magdalo (Magdalanino)

Kaj Jesuo respondis : Neniu homo havas la potencon pardoni la pekojn de alia homo. Sed ĉiu, ŝanĝante sian koron kaj farante al si aman koron, povas pardoni al si mem siajn pekojn.

Kaj, sin turnante al la virino, li ŝin demandis : Ĉu ci ne sentas, ke ciaj pekoj ja estas al ci pardonitaj ?

Maria Magdalena signis per sia kapo, ke tion ŝi sentas; kaj denove ŝi ploris; kaj ŝiaj larmoj estis larmoj de ĝojo.

Ĉapitro XIII

Kiam Jesuo iris de urbo al urbo kaj de vilaĝo al vilaĝo, predikante kaj anoncante la Regnon de Dio, la dek du estis kun li.

Kaj lin sekvis pluraj virinoj, kiuj estis liberigitaj de la maltrankviloj de ilia koro, nome : Maria, kiun oni nomis Magdalena, kaj pri kiu oni diris, ke el ŝi eliris sep demonoj;

Kaj la patrino de la filoj de Zebedeo; kaj Johana, edzino de Ĥuzo, intendanto de Herodo; kaj Susana; kaj pluraj aliaj, kiuj helpis lin per siaj havaĵoj.

Sed iafoje li iris sola en la dezerton aŭ en la kavernojn trans la lago.

Aliafoje li estis akompanata nur de Petro kaj de ambaŭ filoj de Zebedeo.

Kaj aliajn tagojn, lin sekvis disĉiploj, sepdekope kaj pli multe.

Okazis, ke Jesuo eniris en barkon kun kelkaj en siaj disĉiploj. Kaj li diris al ili : Pasu ni al la transa bordo de la lago. Kaj ili foriris.

Kaj, dum ili naĝis, impeta vento leviĝis sur la lago, la barko pleniĝis je akvo, kaj ili estis en danĝero.

Dume Jesuo estis ĉe la pobo, dormanta sur kapkuseno.

Ili venis al li kaj vekis lin, dirante : Majstro, majstro, ni pereas.

Sed li, vekiginte, parolis kun aŭtoritato al iliaj koroj kaj iliaj manoj. Tiel, ke li pacigis iliajn korojn kaj redonis al iliaj manoj forton kaj agemon.

Kaj li eksteren ŝovelis la akvon, kiu enfluis en la

barkon; kaj ĉiuj lin imitis. Kaj tial, ke li relevis ilian kuraĝon, la vento ŝajnis al ili malpli forta kaj la danĝero malpli minaca.

Mallonge poste la ŝtormo paciĝis. Kaj li diris al ili : Kie do estis via kuraĝo ? Ĉu vi ne scias, ke timo faras duonon de la ŝtormo kaj pli ol duonon de la danĝero ?

Kiam vi troviĝas en peredanĝero, fidu al la Patro kaj al vi mem. Ne forlasu vin, kaj li ne forlasos vin.

Ĉar la maristo, kiu scipovas malhelpi sian koron droni, malhelpos ankaŭ sian barkon droni.

Sed, tial ke Jesuo havis la povon ordoni al iliaj koroj, la disĉiploj kredis, ke li havas la povon ordoni al la elementoj.

Kaj, tial ke li paciĝis la ŝtormon de la timo, ili kredis, ke ja li paciĝis la ŝtormon de la akvoj.

Tiel, malgraŭ liaj neadoj, ili obstine kredis, ke li estas la Kristo.

Kaj ili diris : Ĉu la Kristo, la dua liberigonto, ne estas faranta ĉion, kion faris Moseo, la unua liberiginto ?

Moseo ordonis al la akvoj; do ĉi tiu estas mastro de la akvoj.

Kaj, tiel longe, kiel ni estas kun li, se nur li ne dormas kaj vidas nian danĝeron, nia danĝero estas nur ŝajna.

Kiam ili revenis, ili rakontis kiel eksterajn mirindaĵojn la mirindaĵojn, kiujn Jesuo faris en ili.

Kaj la popolo diris : Li ordonas al la akvoj kaj li resanigas la malsanulojn; li vere estas la Kristo.

Kaj ili ripetadis la parolon de Moseo : La Eternulo cia Dio estigos el cia nacio kaj el ciaj fratoj profeton similan al mi.

Kaj ĉiujn mirindaĵojn, kiujn ili legis pri Moseo, ili ripetadis, ke ankaŭ Jesuo faris;

Kaj eĉ la aliajn mirindaĵojn, kiuj troviĝas en la Skriboj.

Kaj ili diris : Ĉio, kion faris la Eternulo en la tempo de niaj patroj per la manoj de la justuloj, jen li ĝin refaras per la manoj de ĉi tiu nova Kristo.

La Eternulo revivigis mortintojn per Elijo, Eliŝao kaj Jeĥezkelo; kaj li revivigas mortintojn per la parolo de ĉi tiu.

Kaj tiu ĉi malfermas la okulojn de blinduloj, kiel la Eternulo malfermis ilin per Eliŝao.

Kaj li plenumas la promesojn, kiuj estas en la libro de Jesajo, igante surdulojn aŭdi, lamulojn marŝi, kaj mutulajn langojn laŭdi Dion.

Ĉar ili ne sciis, ke ĉiuj tiuj oferoj estas rakontitaj aŭ promesitaj per figuroj aŭ bildoj.

Kaj, dum granda popolamaso estis ĉirkaŭ li, kelkaj el la Skribistoj kaj Fariseoj diris al li : Majstro, ni dezirus vidi cin fari miraklon.

Kaj, kiuj kredis lin, ankaŭ tiuj urĝe petis lin : Majstro, aperigu signon en la ĉielo, ke ciaj malamikoj estu konfuzitaj.

Sed li respondis : Kiuj volas vin delogi kaj sin proklamas kristoj aŭ reĝoj de l'Judoj, tiuj promesas al vi signojn en la ĉielo;

Kaj per mensogoj kaj ruzoj, ili igas vin kredi pri mirakloj.

Tial estas skribite : Se leviĝos inter vi iu profeto aŭ songulo, kiu faros antaŭ vi iun signon aŭ miraklon,

Kaj se vi vidos aperi la signon aŭ la miraklon de li antaŭdiritan, kaj se li diros al vi : Iru ni al aliaj dioj, kiujn vi ne konis, kaj ni servu al ili;

Ne aŭskultu la vortojn de tiu profeto aŭ songulo.

Sed vi, vi aŭskultas ĉiujn, kiuj promesas al vi signojn en la ĉielo, kaj vi sekvas ilin anstataŭ sekvi la Eternulon.

Kaj ili kondukas vin for de la Eternulo, for de justo, amo kaj kompato. Kaj ili kondukas vin al aliaj dioj, al mono, al milito kaj malamo.

Koncerne min, mi ne estas la Kristo, ĉar la Kristo ne estas homo, sed ĝi estas la saĝo de l'Patro kaj la parolo de l'Patro;

Kaj se la koroj de la Izraelidoj aŭdus la parolon de l'Patro, ĉu tuta Izraelo ne estus Kristo, kiu savus la naciojn ?

Sed la parolo de l'Patro estas : Amu vi unu alian.

Kunportu la parolon ĉie, kien vi iras; profunde penetrigu ĝin en vin; jam ne estu io alia ol tiu parolo kaj tiu amo;

Tiam estos al vi donita signo, nome la signo de pro-

feto Jono.

Ĉar, kiel Jono estis en la ventro de fiŝo dum tri tagnoktoj, tiel same estas la filoj de homoj en la mallumo de la morto, de kiam pekis ilia unua patro.

Sed la parolo liberigas kaj rekondukas al bordo kaj al lumo.

Kaj ĉie, kie estas iu aŭdinta la parolon per sia koro, tie estas iu pli granda ol Jono.

Kaj li ankoraŭ diris al ili plurajn aferojn per paraboloj; kaj li tiel parolis : Semisto eliris por semi.

Dum li semis, parto el la grajnoj falis laŭlonge de vojo; kaj la birdoj de l'ĉielo, veninte, formanĝis ilin.

Alia parto falis sur ŝtonajn lokojn, kie la semo trafis malmulte da tero; kaj baldaŭ ĝi ekkreskis, ĉar ĝi eniĝis ne profunde en la teron;

Sed kiam la suno leviĝis, la semo brulis, kaj ĉar ĝi ne havis radikojn, ĝi sekiĝis.

Alia parto falis sur dornojn, kaj la dornoj, kreskante, ĝin sufokis, kaj ĝi ne donis fruktojn.

Sed alia parto, falinte en bonan teron, altkreskis en spikoj kaj dikiĝis; kelkaj grajnoj produktis tridek, aliaj sesdek kaj aliaj cent. Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu.

Tiam la disĉiploj, al li proksimiĝinte, diris : Kial ci parolas al ili per similaĵoj ?

Li respondis : Necesas, ke la grajno restu kaŝita kelkan tempon en la tero kaj laboru for de la lumo.

Sed, se ĝi falis en bonan teron, ne timu : ĝi releviĝos al lumo, ne unuope sed plurope.

Kaj Natanaelo demandis : Majstro, la grajno, pri kiu ci parolas, ĉu ne estas la parolo pri la regno de Dio ?

Jesuo respondis : Ĝuste ci diras.

Nu, kiam homo aŭdas la parolon de amo kaj ne komprenas ĝin, mil pensoj frivolaj kaj pasantaj venas kvazaŭ fluganta birdaro kaj babas tion, kio falis sur la fermitan kordon;

Kaj jen estas la grajno perdita, ĉar ĝi falis sur la vojnon, tero hardita, kiu ne malfermiĝas por ĝin ricevi.

Kiu ricevis la semon en ŝtona loko, estas tiu, kiu aŭdas la parolon kaj komence ĝin ricevas kun ĝojo;

Sed al li mankas profundo, kaj la parolo ne povas kreskigi fortikajn radikojn; tial li amas nur por kelka tempo,

kaj kiam li sentas sin bruligata per la malamo de la maliculoj, li skandaliĝas kaj tuj sekiĝas.

Kiu ricevis la semon inter dornoj, ankaŭ tiu aŭdis la parolon; sed lia koro estis jam invadita de mil pasioj, kaj li ne forŝiris ilin; tial la zorgoj pri la mondo kaj la logo de l'riĉaĵoj sufokas la parolon, kaj ĝi fariĝas senfrukta.

Sed kiu ricevis la semon en bona tero, estas tiu, kiu la parolon aŭdis kaj komprenas; kaj lia koro estas libera je ĉiaj zorgoj kaj je la deziro pri riĉaĵoj, aŭ li scipovis forŝiri ĉiujn tiujn dornojn;

Kaj tiu fruktodonas, kaj unu grajno en lin falinta produktas tridek, alia sesdek kaj alia cent.

Kaj unu tagon, kiam Jesuo parolis pri amo, Eleazaro meze de la amaso levis la manon kaj diris :

Ci ne povas ami la malriĉulojn, se ci ne malamas la riĉulojn; ci ne povas ami la prematojn de la imposto, se ci ne malamas la impostistojn; ci ne povas ami Izraelon, se ci ne malamas la Romianojn, kiuj subpremas Izraelon;

Se do la amo al ĉiaj fratoj estas en ĉia koro kaj ne nur sur ĉiaj lipoj, venu kun ni kaj kontraŭbatalu la malamikojn de ĉiaj fratoj.

Sed Jesuo respondis : la idoj de paco ne batalas per la armiloj de la idoj de milito.

Se la idoj de paco militas kiel la aliaj, ili estas venkitaj jam antaŭ la batalo; kaj eĉ, kiel gravas de tiam la rezulto de l'batalo, ĉar ili fariĝis idoj de milito ?

Vere mi diras al ci, ci ne havas aliajn malamikojn krom la malamikoj de la riĉuloj, de la impostistoj kaj de la Romianoj.

Ĉar ĉia malamiko estas ĉia mastro; kaj ci estas, kiel ili, sklavo de la riĉaĵoj kaj sklavo de l' malamo.

Do liberigu cin de la internaj malamikoj kaj forpelu la mastrojn, kiuj turmentas cian koron.

Tiam ci povos liberigi la malriĉajn kaj la riĉajn, tiujn el la domo de Izraelo kaj tiujn el la domo de Romo; kaj ci vidos, ke neniu homo estas ĉia malamiko, sed ke ĉiuj estas ĉiaj fratoj.

Sed Eleazaro rideksplodis kaj diris : Vere, ci estas senprudenta, ĉar ci volas fari panon el lolo kiel el

tritiko.

Tiam Jesuo proponis jenan parabolon : La Regno de l' Ĉielo estas simila al homo, kiu semis bonan semon en sia kampo.

Sed, dum ĉiuj dormis, lia malamiko venis, semis lollon inter la tritiko, kaj foriris.

Kaj la servistoj venis diri al la familiestro : Ĉu ci ne semis bonajn grajnoj en cia kampo ? De kie do venis en ĝi lolo ?

Kaj li diris al ili : La malamiko tion faris. Kaj la servistoj demandis : Ĉu do ci volas, ke ni iru ĝin elŝiri ?

Sed li respondis : Ne, pro timo ke, elŝirante la lollon, samtempe vi elŝirus la bonan grajnon.

Lasu ambaŭ kreski ĝis la rikolta tempo. Tiam mi diros al la rikoltistoj : unue elŝiru la lolon kaj ligu ĝin en faskoj por ĝin bruligi; sed kolektu la tritikon en mian grenejon.

Kaj Eleazaro ekkriis : Mi estos la rikoltisto de la Eternulo.

Kaj Jesuo respondis al li : Estis al ci donita la potenco rikolti en unu kampo; kaj tiu kampo estas cia koro.

Sed ci estas la malbona servisto, kiu malŝatas la taskon al li komisiitan, kaj volas fari la verkon, kiun la mastro rezervis por si.

Tial ci faros nur malbonon al ci mem kaj al la aliaj.

Kaj Jesuo malĝojis tial, ke la popolo ne komprenis lin, kaj ke la popolo aŭskultadis Eleazaron.

Eĉ liaj disĉiploj aŭskultis liajn vortojn kiel vortojn de kelka tempo, kaj ili laŭdis lian singardemon, kaj ili esperis, ke iam poste, kiam la tempo estos veninta, ankaŭ li parolos kiel Eleazaro.

Dum Jesuo silentis kaj pripensis tiujn aferojn, unu viro, antaŭeniranta el la mezo de la amaso, venis al li.

Nu, tiu viro havis vestojn polvokovritajn, kaj li tenis bastonon en la mano, kaj oni vidis, ke li alvenas de longa vojaĝo.

Li diris al Jesuo : Ĉiaj vortoj estas novaj al la oreloj de ĉi tiuj. Mi, ofte, mi aŭdis ilin en aliaj landoj.

Ĉar mi venas de landoj, en kiujn Aleksandro ne penetris; kaj en tiuj landoj estas miloj da profetoj, kiuj

anoncadas amon kaj kompaton.

Jesuo levis la manojn al tiu viro kaj diris : Estu benita, ho frato mia. Ĉar ci estas al mi la kuriero de granda ĝojo.

Poste li parolis laŭ la maniero de tiuj, kiuj parolas al si mem, kaj li ŝajnis proponi al si mem jenan parabolon :

La Regno de la Ĉielo estas simila al homo, kiu loĝas sur dezerta insulo.

Li konis nek sian patron nek sian patrinon; kaj dum longa tempo liaj okuloj, serĉante ĉirkaŭ li, neniam renkontis homan vizaĝon.

Iafoje li iris ĉe lagon ne movatan de la ventoj, kaj, sin klinante super la akvo, li rigardis sian propran vizaĝon; kaj tiam ŝajnis al li, kvazaŭ li estus malpli sola.

Aliafoje, li parolis al la plej mildaj el la kampaj bestoj, kaj ili haltis ĉirkaŭ li, kvazaŭ por lin aŭskulti. Sed ili ne havis orelojn por lin aŭdi.

Tial, ĉiuvespere, li sidiĝis ĉe la marbordo, kaj, foren rigardante, li aŭskultis sian koron ĝemi kiel malplena groto, en kiu kirliĝas la vento.

Sed li ne volis konfesi al si, kio mankas al li. Sed li timis, ke sur la tero estas neniuj homoj, kaj larmoj fluis el liaj okuloj.

Nu, iam mortiganta ŝippereinto estis ĵetita ĉe la dezertan insulon. Kaj la loĝanto de la dezerta insulo flegis lin, kiel oni flegas retrovitan fraton. Kaj li havis la doloron vidi lin morti.

Sed la mortanto anoncis per gestoj, ke trans la maro estas homoj.

Nun, ĉe vesperiĝo, la solulo ankoraŭ sidiĝas ĉe la marbordo. Kaj liaj okuloj, kiuj volus vidi pli fore ol la horizonto, estas ankoraŭ plenaj de larmoj.

Sed nun ĝojo, ne malespero, fluas kun liaj larmoj sur lia vizaĝo.

Ĉar li scias, ke trans la maro li havas fratojn al li similajn.

Ĉapitro XIV.

Tiam Jesuo, forsendinte la popolon, revenis en la domon. Nu, liaj disĉiploj proksimiĝis al li kun mal-

trankvilo. Kaj Natanaelo diris al li : Majstro, mi vidas, ke ci estas malĝoja tial, ke ni ne komprenas ĉiujn ciajn vortojn.

Tamen ni cin amas, kaj ni faras nian eblon por kompreni. Kaj ankaŭ mi, ofte vespere mi afliktiĝas, ĉar mi ne komprenas.

Sed matene, iafoje mi ĝojas, ĉar mi komprenas iom pli bone ol la hieraŭon.

Kaj Jesuo diris al li : Ĝoju do en la tuta amplekso de cia koro. Ĉar la Regno de l'Ĉielo similas al trezoro profunde kaŝita en kampo.

Kiuj malprofunde pasigas plugilon por semi ĉi-mondajn havaĵojn, tiuj ne trovos ĝin.

Kaj kiuj fosas dum unu tago, sed vespere malkuraĝiĝas, kaj morgaŭe ne revenas, ankaŭ tiuj ne trovos ĝin.

Sed tiu ja ĝin trovos, kiu ĉiumatene revenas kun espera koro kaj viglaj brakoj, kaj ĉiutage pli profunde fosas.

Ĝoju, filo mia, en la tuta amplekso de cia koro. Ĉar la Regno de l'Ĉielo similas ankaŭ al fajna perlo en amaso da falsaj perloj.

Se oni deziras trovi ĝin, necesas senĉese tenadi en la spirito la signojn, laŭ kiuj distingiĝas la veraĵoj kaj la falsaj perloj, kaj atente ekzameni unu post alia.

La plimultaj prenas la unuan perlon, kiu prezentiĝas, kaj ili diras : Jen estas la Regno de l'Ĉielo.

Sed la prudentulo provas ĉiun perlon, kaj li forĵetas la falsajn, kiaj la riĉaĵoj aŭ la gloro de ĉi-mondo; kaj fine li trovas la fajnan perlon, kaj ĝin konservas.

Petro diris : Mi profunde fosis en la kampo, kaj mi eltrovis la trezoron; mi elektis inter ĉiuj perloj, kaj mi eltrovis la fajnan perlon.

Ĉar la trezoro kaj la fajna perlo estas ci, Majstro.

Kaj, kiel la trezoro ebligas aĉeti aliajn kampojn kaj rikolti multe da greno, al mi, kiu cin kredas kaj oferis al ci ĉion, ci donos, kiam venos la tempo, riĉaĵojn kaj potencon.

Tial mi estas preta anonci antaŭ ĉiuj cian Bonan Novaĵon, kaj defendi cin kontraŭ ĉiujn;

Kaj, por savi cian vivon, mi deŝirus la vivon de ciaj malamikoj, aŭ eĉ, se necese, mi perdus la mian.

Jesuo malgaje ridetis, ĉar Petro neniam komprenis ian

verajon; Petro estis la dornokovrita grundo, kiu ricevas la semon, sed baldaŭ ĝin sufokas.

Kaj li prenis siajn dornojn por plej bona tritiko; kaj lia kala mano ne sentis la pikojn; kaj li asertis : Mia mano estas plena je bonaj grajnoj.

Nu, en tiu momento, Jesuo estis tro afliktita por respondi al li.

Sed Petro, plu parolante, diris : Majstro, aŭskultu sonĝon pri ci, kiun mi ricevis ĉi-nokte.

Mi estis kun pluraj el ciaj disĉiploj en barko de la ondoj skuata; ĉar la vento estis kontraŭa.

Kaj ci venis al ni, marŝante sur la maro.

Vidante cin marŝi sur la maro, ni estis konfuzitaj, kaj ni diris :

Estas fantomo. Kaj, pro timo, ni ekkriis.

Sed tuj ci parolis al ni kaj diris : Trankviliĝu, estas mi, neniel timu.

Kaj mi respondis al ci : Majstro, se estas ja ci, ordonu, ke mi iru al ci marŝante sur la akvo.

Tiam ci diris al mi : Venu. Kaj, elirinte el la barko, mi ekmarŝis sur la akvo por iri al ci.

Sed la vento estis forta, kaj mi ektimis; kaj, ĉar mi komencis mergiĝi, mi ekkriis : Sinjoro, savu min.

Tuj ci etendis la manon kaj kaptis min, dirante : Homo kun malgranda fido, kial ci dubis ?

Sed Jesuo respondis : Homo kun tro granda fido kaj malgranda inteligento, neniam forgesu tiun sonĝon,

Ĉar ĝi estas plena je vero, kaj ĝi diras pri cia tuta animo, kun kio bona kaj kio malbona estas en ci.

Ci estas tiu, kiu komence havas kuraĝon, sed baldaŭ ne havas plu kuraĝon; ci estas la ŝtono, kiu frapite donas fajron, sed tiu fajro ne daŭras;

Kaj ci promesas pli, ol ci povas teni, kaj ci entreprenas pli, ol ci kapablas efektiviĝi.

Ĉar ci ne konas cin mem, kaj ci ne konas la eksteron; kaj ci kredas, ke oni povas marŝi sur akvo kun la pezeco de homa korpo.

Se ci vidis min sentime marŝi sur la malamika akvo, tio estas, ke mi senigis min je ĉia pezo, kaj ne portas plu la pezan ŝarĝon de deziro.

Sed ci, ci deziras aferojn, kaj ciaj krudaj esperoj estas el tiuj, kiuj kaŭzas mergiĝon.

Tamen, ĉar en cia sonĝo mia mano cin subtenis, eble

en la vivo mia parolo cin savos, se ĝi sukcesos firme kapti cin.

Sed ĝis nun ĝi glitis sur ci, kiel glitas mano, kiu provas kapti en spegulo trompan bildon.

Kiel longe ci kredos, ke mi estas Kristo kaj disponas pri la estonteco de ĉi mondo, ci estos nur eraro kaj bildo, kaj mia mano, kiu cin amas, ne povos kapti kaj savi cin.

Kaj kiel longe ci portos la esperon dividi kun mi tiun estontecon, kiu apartenas nek al mi nek al iu ajn, ci mergiĝos en glutantan akvon.

Ĉar la estonteco de ĉi mondo estas peza. Kaj se mi marŝas sur la akvo, estas tial, ke mia regno ne estas ĉi-monda.

Kaj Petro demandis : Al kiu mondo do apartenas cia regno ? Kaj sur kiu tero aŭ en kiu ĉielo ci donos al mi la tronon, kiun mi esperas ?

Kaj Jesuo respondis : En cia koro, se iam prosperos al ci koron havi.

Sed Petro kredis, ke Jesuo tiel parolas por lin provi. Kaj li ekkriis: Kiaj ajn estas ciaj vortoj, Majstro, mi kredas al ci.

Kaj Jesuo havis rideton esperan. Ĉar, pro amo kaj esperbezono, li miskomprenis la parolon de Petro.

La morgaŭon, Petro diris al li : Majstro, iam ci elektis dek du el ni, kaj ci nomis nin ciaj Sendotoj. Kial do ci ne sendas nin ?

Kaj Jesuo respondis : Prava ci estas. Eble jam venis la tempo. Eble parolante al aliaj vi sukcesos aŭdi vin, mem.

Kaj, strebante klarigi miajn parolojn, eble vi lumigos viajn korojn.

Iru do, tre amataj miaj. Sed ne turnu vin al lando de Gentanoj, kaj ne eniru en iun urbon de l'Samarianoj.

Ĉar vi estas ankoraŭ tro Izraelidaj. Vi ankoraŭ scipovas paroli nur al tiuj, kiuj lernis la samajn aferojn, kiel vi, kaj via koro ankoraŭ ne donis al vi la kapablon pri lingvoj.

Tial iru prefere al viaj fratoj el la domo de Izraelo.

Kaj, kiam vi estos forarintaj, prediku kaj diru al viaj fratoj : Ŝanĝu viajn korojn, por ke proksimiĝu la Regno de Dio.

Sanigu malsanajn spiritojn, purigu leprajn pensojn, revivigu mortintajn justojn, forpelu la demonojn de malamo.

Ne faru kiel la doktoroj de la Leĝo, kiuj postulas salajron por diri tion, kion ili kredas vero.

Parolo kaj amo ne estas pageblaj per mono. Kaj, se oni pagas ilin per mono, ili jam ne estas amo nek parolo.

Do vi, kion vi senpage ricevis de mia amo, redonu ĝin senpage kaj ame.

Kunprenu en viaj zonoj nek oron nek arĝenton nek monerojn.

Ĉar oro kaj arĝento estas domoj, kiuj ŝiras la kordon.

Ankaŭ sakon por la vojaĝo ne kunprenu. Ĉu ne troviĝas ĉie, pendanta de arboj, la nutraĵo por birdo kaj la nutraĵo por homo ?

Kiam vi eniros en domon, salutu ĝin per tiuj vortoj : Paco estu sur tiu ĉi domo.

Sed ne demandu vin : Ĉu tiu domo estas inda ricevi mian pacon ? Ĉar via koro devas esti kapabla elverŝi pacon ĉie.

Estu similaj al bona arbo. Ĝi ne zorgas, ĉu la frukton kolektos mano de bonulo aŭ mano de maliculo, sed ĝi donas sian frukton en ties sezono.

Ĉie, kie oni ne akceptos vin kaj ne aŭskultos vian parolon, preĝu, por ke la Patro mildigu la korojn, kiuj estas ankoraŭ tro malmildaj.

Sed ne deskuu la polvon de viaj piedoj al tiu urbo aŭ al tiu domo, kiuj ne akceptis vin. Ĉar la vento reĵetas la polvon al tiuj, kiuj ĝin deskuas.

Jen. Ĉar tion vi deziras, mi sendas vin kiel ŝafojn inter lupojn. Estu do firmaj en viaj decidoj, kaj ne fariĝu lupoj similaj al aliaj.

Multaj kredis havi la spiriton de mildo, kiuj, inter perfortuloj, fariĝis perfortuloj. Kaj multaj volis amon prediki, kiuj, sentante sin malamataj, fariĝis malamantaj.

Kaj, kiam oni frapis ilin, ili frapis; kaj kiam oni mordis ilin, ili mordis.

Nu, kiu volas pacon semi, se li konsentas militi, ĉu li ne estas, nur pro tio, jam venkita ? Kaj kiel gravas, ĉu poste li estos venkito aŭ venkinto en la mi-

lito ?

Sciu jam antaŭe, je kia prezo oni amas la homojn, ke ili fordonos vin al tribunaloj kaj skurĝigos vin en siaj sinagogoj;

Kaj vi estos kondukataj antaŭ gubernatorojn kaj reĝojn.

Kiam oni fordonos vin al potenculoj, ne zorgu pri tio, kion vi diros, nek ^{kia} vi parolos. Sed estu ĉiam atentaj, pri kio estos en via koro. Ĉar la buŝo parolas el la abundo de l'koro.

Kaj vi bone parolos, se via koro estos plena je amo kaj kuraĝo.

Havu tiom da kuraĝo kiom da amo. Ĉar, tial ke la homoj militas kontraŭ pacon, okazas, ke kiu volas alporti pacon, tiu alportas militon.

Ĉu vi ne vidis jam, pro miaj paroloj, disiĝon inter frato kaj frato, inter patro kaj filo, inter filino kaj patrino ?

Ĉar kiu amas sian patron aŭ sian patrino pli ol amon; kiu, pro komplezo al sia patro aŭ patrino, direktas al aliaj homoj malaman geston; tiu ne estas inda je mi.

Kaj kiu amas sian filon aŭ sian filino pli ol amon; kiu, pro komplezo al sia filo aŭ filino, direktas al aliaj homoj malaman geston; tiu ne estas infano de amo kaj paco.

Kiu vin akceptas, sin mem ricevas; same, kiu vin aŭdas, sin mem aŭdas.

Kiu malfermas sian domon al justulo tial, ke li estas justa, ĉu li ne malfermas samtempe sian koron al justo ?

Kaj kiu donas eĉ nur glason da akvo al iu homo, ĉu li povas perai sian rekompencan ? Ĉu li ne sentas sian koron refreŝigita ?

Ĉapitro XV.

En tiu tempo Herodo la tetrarko ekaŭdis, kion oni publikigis pri Jesuo.

Kaj li sciis, ke pluraj en la popolo metis en lin sian amon kaj sian esperon.

Ĉar unuj diris : Li estas Elijo; kaj aliaj : Li estas profeto aŭ homo simila al la profetoj; kaj aliaj : Li estas la Kristo nin liberigonta el la jugo de la Edomidoj

kaj el la imposto al Romianoj.

Sed Herodo, aŭdinte, kion oni publikigis, diris : Eble li estas tiu Johano, kiun mi igis senkapigi ?

Li estis potenca laŭ verkoj kaj vortoj, kaj mi ne mirus, se li estus reviviĝinta el inter la mortintoj.

Ĉar plurfoje li aperis antaŭ mi en sonĝoj, kaj diris al mi kun minacoj : La batalado inter ni ne estas finita.

Do mi sendos soldatojn, ke ili kaptu tiun Jesuon kaj konduku lin antaŭ min. Tiam mi scios, ĉu vere li estas Johano relevita el inter la mortintoj.

Kaj, ĉiaokaze, mi lin gardos en malliberejo, por ke li ne logu plu la popolon kaj ne plu elparolu malbenojn kontraŭ la reĝojn.

Ĉar Herodo, edziĝinte al Herodiada, edzino de Filipino lia frato, estis kaptiginta Johanon, lin kateniginta kaj enkarceriginta pro ŝi;

Tial ke Johano diris al Herodo : Ne estas al ci permesate havi la edzinon de cia frato.

De tiam Herodiada insidatis kontraŭ Johanon kaj serĉis favoran okazon por mortigi lin; sed ŝi ne povis atingi sukceson.

Ĉar Herodo timis la sorĉojn de Johano; li havis ankaŭ respekton kontraŭ li kaj en pluraj aferoj sekvis liajn konsilojn; kaj li aŭskultadis lin kun plezuro kaj tremo.

Kaj li timis la popolon, kiu rigardis Johanon kiel profeton kaj Kriston.

Sed jen venis favora tago : nome la naskiĝtago de Herodo, kaj li oferis festenon al la granduloj de sia kortego, la oficiroj de siaj trupoj kaj la ĉefaj el Galileo.

La filino de Herodiada, enveninte kaj dancinte, plaĉis al Herodo kaj al la sidantoj ĉe la tablo. Kaj la tetrarko diris al la junulino : Petu de mi, kion ajn ci volos, mi ĝin donos al ci.

Kaj li ĵure promesis : Ĉion, kion ci petos, mi donos al ci, eĉ se ĝi estus la duono de mia regno.

Sed ŝi, elirinte, diris al sia patrino : Kion mi petu ? Kaj la patrino respondis : La kapon de Johano la Baptisto.

Kaj, haste reveninte al la reĝo, ŝi faris al li

sian peton, dirante : Mi deziras, ke ci tuj donu al mi, en pelvo, la kapon de Johano la Baptisto.

La reĝo afliktiĝis pro tiu peto; tamen pro la ĵuro, kiun li faris kaj pro la kunsidantoj, li ne volis rifuzi.

Kaj li diris : Eble tiel estas pli bone; ĉar, eĉ por la stulteco de l'popolo, mortinto ne estas plu estro.

Do li sendis unu el siaj gvardianoj, ordonante, ke li alportu la kapon.

La gvardiano tranĉis en la karcero la kapon de Johano, kaj, alportinte ĝin en pelvo, li ĝin donis al la junulino, kiu ĝin prezentis al sia patrino.

Tiam venis la disĉiploj de Johano, kaj ili forportis lian korpon kaj metis ĝin en tombon.

Poste ili iris anonci pri tiuj okazoj al Jesuo; kaj kelkaj el ili lin eksekvis. Sed la plimultaj iris al Kristo Eleazaro; aliaj, Samarianoj, sin ligis al Kristo Simono;

Kaj tiuj, kiuj ŝajnis aparte gravaj, ne volis havi alian estron, sed ili daŭre diris : Ni estas disĉiploj de Johano, kaj ni baptas en lia nomo.

Post tiuj okazoj, ĉar Herodo estis venkita de araba reĝo, pluraj anoncis, ke Kristo Johano venĝis al li.

Ĉar tiam oni komencis kredi, ke la Kristo povas suferi kaj morti, kaj interpreti kiel rilatajn al la Sanktoleito de l'Sinjoro ne nur la parolojn pri gloro, sed jam ankaŭ plurajn parolojn pri funebro kaj aflikto, kiuj troviĝas en la Skriboj,

Kaj kiujn antaŭe oni rilatigis al la tuta popolo Izraela.

Kaj oni ekkredis, ke Jesajo anoncis la Kriston en siaj vortoj pri la Homo de Doloro.

Tial pluraj ripetis : Johano estas la Sanktoleito de l'Sinjoro, kaj Jesajo klare lin anoncis per tiuj vortoj : Li estis vundita pro niaj pekoj, dispremita pro niaj krimoj; puno por nia bono estis sur li, kaj per lia vundo ni saniĝis;

De sur la tero de vivantoj li estas fortranĉita, pro la kulpo de mia popolo li estas frapita.

Aŭdinte, kion Herodo faris al Johano, kaj kion li

diris pri li mem, Jesuo eniris en barkon kaj transveturis la lagon por eliri el la regno de Herodo.

Eĉ, dum kelka tempo, li sin tenis kaŝita en la kavernoj sur la transa bordo de l' lago.

Sed baldaŭ li eliris el la kavernoj, kaj li iradis predikante la Regnon de Dio tra Transjordanio kaj ĉe la Samarianoj. Aŭ iafoje li enprofundiĝis en la dezerton, kaj amaso el la popolo lin sekvis tien por aŭdi lian parolon.

Aliffoje, li enbarkiĝis kaj iris paroli pri la Regno al la popoloj ĉe la lagobordoj. Sed, se la soldatoj de Herodo venis por lin kapti, li reeniris en la barkon kaj, traveturante la akvojn, li eliris el la regno de Herodo.

Unu tagon, kiam li estis revenonta en la barkon kaj traŭranta la lagon, ĉar li timis la soldatojn de Herodo,

Tiam granda homamaso venis ĉirkaŭ li, petegante, ke li parolu. Li estis tuŝita de kompatato, ĉar ili estis kvazaŭ ŝafoj sen paŝtisto, kaj li komencis instrui ilin pri pluraj aferoj.

Sed, kiam venis la vespero, liaj disĉiploj proksimiĝis al li kaj diris : Tiu ĉi loko estas dezerta, kaj estas jam malfrue.

Do resendu ilin, ke ili iru al la vilaĝoj plej proksimaj kaj aĉetu por si panon; ĉar la plimultaj havas nenion por manĝi.

Sed li diris al ili : Kaj vi, kiom da panoj vi havas ? Iru kaj rigardu. Kaj, vidinte, ili respondis : Kvin panojn kaj du fiŝojn.

Tiam Jesuo proponis al la popolo jenan parabolon : Ĉu la Regno de la Ĉielo ne estas simila al la birdoj de la ĉielo ?

Iam mi parolis en urbo de l' Samarianoj. Sur la placo, kie mi parolis, estis arboj. Kaj sur tiuj arboj birdoj kantis, kvazaŭ ili volus laŭdi la Patron, dum mi laŭdis la Patron.

Nu, levinte la okulojn por vidi, ĉu la birdoj ne donus al mi ian veraĵon por diri al la popolo, mi vidis, ke pluraj aliaj birdoj alvenas sur la placo;

Kaj ili kantis al la unuaj; kaj tuj ili foriris ĉiuj kune.

Nu, venante al tiu loko, mi renkontis junan knabon, kiu portis sakon plenan de greno. Kaj la sako, malnodiĝinte, lasis la grenon fali. Kaj la infano malbone rekolektis la grenon, lasante multe da grajnoj sur la grundo.

Do mi komprenis, kion la birdoj venis diri al siaj fratoj, kaj kial ili foriris ĉiuj kune.

Kaj mi diris al la Samarianoj : Sekvu min, por ke la birdoj de l'ĉielo instruu vin pri la Regno de Dio.

Kaj ili sekvis min. Kaj ni vidis ĉirkaŭ la greno ĉiujn birdojn, manĝantajn kun ĝojkrioj. Kaj mi rakontis, kiel la birdoj unue trovintaj la grenon informis siajn fratojn.

La Samarianoj komprenis; kaj, tiun tagon, ĉiuj homoj kaj ĉiuj birdoj en la urbo manĝis; kaj inter la birdoj aŭ inter la homoj estis nek riĉaj nek malriĉaj; kaj tio estis tago de la Regno de Dio.

Poste Jesuo prenis la panojn kaj la fiŝojn, kaj, levante la okulojn al la ĉielo, li dankopreĝis al la Patro; kaj li disrompis la kvin panojn kaj donis ilin al siaj disĉiploj, ke ili disdonu ilin al la popolo; kaj ankaŭ la du fiŝojn li donis al ili.

Kaj li diris : La zorgo de tiuj, kiuj diradas : Kion ni manĝos ? kion ni trinkos ? kaŭzas, ke pluraj suferas malsaton kaj pluraj suferas soifon.

Kaj la zorgo pri morgaŭa morto kaŭzas, ke oni mortas jam hodiaŭ.

Koncerne min, neniam mi zorgas, pri kion mi manĝos aŭ kion mi trinkos. Tial, neniam mankas nutraĵo ĉirkaŭ mi.

Jen. Miaj disĉiploj kaj mi, ni havas kvin panojn kaj du fiŝojn. Mi rompis la panojn, por ke ili estu al vi disdonotaj; kaj ankaŭ la fiŝoj estas disdonotaj.

Se do vi volas, ke ni manĝu, kiuj alportis nutraĵon, tiuj donu al ni da ĝi.

Tuj, tiuj, kiuj alportis nutraĵon, venis kaj metis ĉe la piedojn de Jesuo, kion ili havis.

Kaj ili estis en granda ĝojo.

Jesuo diris al ili : Ĉu vi ne sentas en tiu ĉi horo, ke estas pli da ĝojo, por kiu donas, ol por kiu ricevas?

Poste li ordonis al la popolo sidiĝi en diversaj truopoj sur la verda herbo.

Ili do sidiĝis laŭ vicoj, po centoj kaj kvindekoj.

Jesuo benis la nutraĵon metitan antaŭ li; kaj li laŭdis la Patron, kiu estas en la ĉielo, kaj li gloris la pacon kaj la ĝojon, kiuj estas sur la tero por la bonvolaj homoj.

Kaj li disdonigis per siaj disĉiploj la nutraĵon al la tuta popolamaso.

Ĉiuj manĝis kaj satiĝis.

Kaj oni forportis dek du korbojn plenajn de la restaĵoj el la nutraĵo.

Nu, la manĝintoj estis ĉirkaŭ kvinmil homoj.

Poste Jesuo, timante Herodon, foriris de tiu loko kaj retiriĝis al la regionoj de Tiro kaj Cidon.

Kaj virino kanaanida, nomita Justa, veninta de tiuj regionoj, ekkrie diris al li : Majstro, kompatu min, ĉar mia filino estas malsana en sia korpo.

Jesuo respondis : Mi estas sendita por savi ne la korpojn, sed la animojn; kaj mi havas panon por la infanoj, sed ne ĉiuj bestoj manĝas panon.

Sed ŝi diris : Majstro, ĉu la hundidoj ne manĝas sub la tablo la panretojn de la homidoj ?

Kaj ĉu la korpo ne estas faciligata per la ĝojo de la animo ?

Tiam Jesuo responde diris : Virino, cia inteligento estas granda; estu farite, kiel ci deziras.

Kaj, irinte ĉe ŝin, li trovis ŝian filinon, kiu estis laŭdire turmentata de demono.

Kaj li diris al ŝi : Infano, por esti pli forta ol la demono, sufiĉas voli, kion li ne volas. Diru al la demono : Eliru, kaj li eliros.

La junulino, rigardante la vizaĝon kaj la okulojn de Jesuo, estis persvadita. Kaj ŝi ridetis al li. Kaj ŝi diris : Majstro, mi obeos al ci.

Do ŝi ordonis al la demono : Eliru, tion volas la Majstro.

Poste ŝi plie diris al Jesuo : Mi sentas min faciligita, kaj kredeble li foriris; sed lin forpelis cia potenco, ne mia. Ĉar mi estas malforta; sed ci, ci estas forta.

Kaj Jesuo diris al ŝi : Se li revenos, forpelu lin en cia nomo aŭ en mia nomo, laŭ cia plaĉo.

Kaj, kiel longe ci ne kuraĝos ami cin en ci mem, almenaŭ amu cin en mi.

Tiujn vortojn ŝi ne komprenis.

Sed ŝi diris : Majstro, mi cin amas, kaj li ne revenos.

Ĉapitro XVI.

En tiu tempo Fariseoj kaj Skribistoj venis de Jerusalemo al Jesuo;

Kaj, vidante, ke pluraj el liaj disĉiploj manĝas ne lavinte siajn manojn ĝiskubute, ili mallaŭdis ilin.

Ĉar la Fariseoj kaj ĉiuj Judoj manĝis nur, post kiam ili lavis siajn manojn ĝiskubute, tiel gardante la tradicion de la antikvuloj.

Li respondis : Malbone estas prizorgi la tradiciojn de la antikvuloj aŭ eĉ la Leĝon.

Ĉar tiel oni kutimiĝas ne plu demandi al sia koro, kion oni devas fari; kaj oni obeas al skriboj kaj tradicioj, kiuj, en si mem, estas jen bonaj jen malbonaj;

Sed kiuj estas ĉiam malbonaj tial, ke ili forgesigas la vojon al la fonto de vero kaj vivo.

Li ankaŭ diris al ili : Vidu, kiel vi nuligas la ordonojn de Dio, kiuj estas la ordonoj de l'koro, por obei vian tradicion, kiu venas de la homoj.

Ĉar Moseo, post kiam li aŭskultis sur la monto sian koron kaj la Etermulon, diris : Honoru cian patron kaj cian patrinon.

Sed nuntempe, se iu diras al sia patro aŭ al sia patrino : Ĉio, per kio mi povus helpi cin, estas korban (t.e. oferdono al Dio),

Vi jam ne permesas al li fari ion por sia patro aŭ sia patrino.

Kaj ili diris al li : Majstro, se ni ne obeos al la Leĝo kaj la tradicioj de la antikvuloj, kiel ni scios, kion ni devas fari kaj kion ni ne devas fari ?

Sed li respondis : Nek al mi nek al iu homo nek al iu libro vi devas demandi pri tiuj aferoj. Sed al via koro vi tion demandu.

Ĉu vi ne legis en la libro de la Psalmoj tiun parolon, kiu leviĝas kiel flamo por bruligi ĉiujn librojn : Ĉia leĝo estas en mia internaĵo ?

Aŭ ĉu vi ne legis en la vortoj de profeto Jeremio tiun verson, kiu senigas la pastrojn je iliaj orgojlaj ornam-

vestoj : Mi metos mian Leĝon en ilian internon, kaj sur ilia koro mi ĝin skribos.

Kaj Moseo skribis sur la ŝtontabuloj, kion la Eternulo skribis sur viaj koroj. Sed ne ĉion li povis skribi sur la ŝtontabuloj.

Lernu do legi en viaj koroj.

Sed vi volas, ke la popolo vin aŭskultu anstataŭ sian koron aŭskulti.

Tial vi mem iĝis nekapablaj aŭdi vian koron.

Kaj vi jam ne estas vivantoj, sed vi estas maŝinoj, funkciantaj nur per la ŝnuroj de la Leĝo kaj la nervoj de la Tradicio.

Kaj vi ne estas el tiuj, pri kiuj la Eternulo diris : Mi estos ilia Dio kaj ili estos mia popolo;

Kaj vi estas la idoj de ofero, ne la idoj de justo;

Kaj vi ne estas el tiuj, en kies buŝo la Eternulo metis tiun laŭdan kantikon :

Ci ne ricevas plezuron el ofero kaj kuko, kaj ci ne postulis buĉoferon aŭ bruloferon pro miaj pekoj;

Sed ci malŝtopis miajn orelojn, kaj mi ricevis plezuron el plenumado de cia volo, kaj mi anoncis cian juston en granda kunveno.

Tiam, vokinte la tutan homamason, li diris : Aŭskultu, kaj komprenu jenon :

Nenio, kio estis ekster la homo kaj eniĝas en lin, povas lin malpurigi; sed kio eliĝas el li, jen estas, kio lin malpurigas;

Aŭ pli ĝuste, kio eliĝas el la homo, tio montras, ke la homo estas aŭ ne estas malpurigita.

Se iu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu.

Tiam liaj disĉiploj, proksimiĝante, diris : Ĉu ci ne rimarkis, ke la Fariseoj skandaligis pro cia parolo ?

Kaj li respondis : Lasu ilin; ili estas blinduloj kondukantoj de blinduloj; ja se blindulo blindulon kondukas, ili ambaŭ falos en fosajon.

Sed Petro, ekparolante, demandis al li : Klarigu al mi tion, kion ci diris koncerne la aferojn, kiuj eniĝas en la homon, kaj la aferojn, kiuj eliĝas el la homo.

Jesuo respondis : Ĉu do ĉiam ci estos seninteligenta? Ĉu ci ne komprenas, ke nenio eniranta de ekstere en la

homon povas malpurigi lin ?

Ĉar tio eniras ne en lian koron, sed en lian ventron, kaj eliras en apartan lokon kun ĉio malpura, kio estas en la manĝaĵoj.

Sed kio eliras el la buŝo, tio venas de la koro, kaj, se kio eliras el la buŝo estas malpura, tio montras, ke la koro estas malpura, kaj ĝin ankoraŭ pli malpurigas.

Ja de la koro eliras malbonaj pensoj, murdoj, agoj por havigi al si riĉaĵojn, fraŭdo, malica parolo kaj falsaj atestoj.

Kaj ĉio tio estas aĝegaj odoroj, kiuj vidigas la internan kloakon. Kaj, kiel putraĵo naskas putraĵon, tiel tiuj malpuraĵoj venintaj el la koro igas la koron pli malpura.

Kaj Petro diris : Min koncerne, mi ĉiam lavas miajn manojn ĝiskubute antaŭ ol preni mian manĝon, kaj por nenia prezo mi konsentus manĝi malpurajn bestojn.

Kaj Simono la Zeloto diris : Majstro, Petro estas prava. Sed ci, ci metas nin sur malbonan deklivon, kaj, se ĝisfine ni ĝin malsuprenirus, ni estus tiaj, kiaj paganoj.

Tiam Jesuo proponis al li jenan parabolon : Iam, en la profundo de l' dezerto, mi estis malsata.

Kaj mi ne scias, ĉu mi dormis aŭ maldormis; ĉu mi vidis sonĝon, aŭ ĉu okazis al mi mensoravo.

Sed jenon mi vidis. La ĉielo estis apertiginta, kaj el ĝi malsuprenvenis granda vazo, simila al granda tablotuko tenata je la kvar anguloj, malaltiganta al tero;

En ĝi troviĝis ĉiaspecaj teraj bestoj kvarpedaj, kaj sovaĝaj bestoj, rampuloj, fiŝoj kaj ĉielaj birdoj el ĉiuj specioj.

Kaj tie troviĝis bestoj kun nedividita hufo, bestoj kun ne forkoforma piedo kaj bestoj ne remaĉantaj;

Kaj tie troviĝis fiŝoj sen naĝiloj kaj sen skvamoj;

Kaj tie troviĝis granda nombro el tiuj birdoj de l' ĉielo, kiujn la Leĝo nomas malpuraj.

Kaj ekaŭdiĝis voĉo, kiu diris al mi : Homo, ĉar ci estas malsata, ekstaru do, prenu hazarde kaj manĝu.

Sed mi respondis : Sinjoro, ne hazarde mi prenos; ĉar neniam mi manĝis ion malpuran aŭ malpurigitan.

La voĉo, duafoje parolante, diris : Neniam rigardu kiel malpuran tion, kio estas kreaĵo de Dio.

Kaj trifoje okazis tio; poste la granda vazo estis retirita en la ĉielon;

De tiu tago, mi ne rigardas kiel malpuran ion ajn, kio eliĝis el la manoj de la Patro;

Sed mi manĝas el ĉiuj viandoj kreitaj de la Patro;

Kaj, forgesinte la praktikon de la Leĝo kaj la tradiciojn de la antikvuloj, mi estas simila al homo, kiu estis sklavo, sed al kiu prosperis liberiĝi, kaj kiu jam ne volas reveni al sia antaŭa sklaveco.

Kaj mi ridas pri la sklavoj, kiuj diradas : Se mastron mi ne plu havus, kiu do min instruus pri tio, kion mi devas fari, kaj kion mi ne devas fari ?

Li diris al ili ankaŭ jenon : Kiu ne plu havas mastron inter la homoj nek inter la skribitaj leĝoj, tiu ne plu estas filo de servuteco, sed li estas vere filo de Dio.

Se do vi min amas, kaj se vi vin mem amas, ĉesu esti filoj de la Leĝo kaj de la servuteco, por ke vi fariĝu filoj de Dio.

Kaj li ankoraŭ proponis al ili jenan parabolon : La Regno de l'Ĉielo estas simila al la suno; sed la regno de la Leĝo estas tia, kia lampo de malriĉulo, en kiu oleo malabundas.

Vidu do, al kiu lumo vi volas aparteni. Ĉu vi volas esti la filoj kaj radioj de la lampo, aŭ la filoj kaj radioj de la suno ?

Koncerne min, mi volas esti filo de l'suno kaj radio de la saĝo de l'Patro; kaj mi nenion petas de la saĝo de l'homoj kaj de la malriĉa lumo de la lampo.

Tial mi estas inter vi, kaj tamen mi estas en la ĉielo. Ĉar la radioj tuŝas la teron, kaj tamen ili sin tenas al la sunglobo kaj ne forlasas ĝin.

Tiel, kvankam mi estas ĉi tie, mi restas en la sino de mia Patro; kaj tiel mi konsilas, ke, restante ĉi tie, vi rifuĝu en la sino de via Patro.

Kaj nenio tera povas malpurigi la radiojn; sed ili, ne malpurigante, lumigas eĉ koton kaj ŝlimon; kaj koto kaj ŝlimo kuŝantaj sur ilia vojo restas al ili fremdaj.

Tiel, ne nur mi povas preni miajn manĝojn ne lavinte miajn manojn ĝiskubute, kaj mi povas manĝi la bestojn, kiujn la Leĝidoj nomas malpuregaj,

Sed mi ankaŭ povas aŭdi la parolojn de la Fariseoj, sen ke mia koro ricevu kontraŭon per ilia hipokriteco kaj ilia malsaĝo, sen ke mi forportu kun mi iom el iliaj eraroj, iliaj mensogoj kaj ilia servuteco.

Ĉar la radio kunportas al suno nenium el la kotaĵoj kaj el la pezaĵoj, kiujn ĝi lumigas.

Sed Petro ankoraŭ diris : Majstro, mi cin amas kaj amas la Leĝon, mi volas sekvi cin kaj tamen sekvi la Leĝon.

Kaj Jesuo respondis : La Leĝo estas mortaĵo; sed mi, mi estas la vivo. Ĉar kiu ajn detruas la leĝon en la nomo de sia koro, tiu estas vivanto kaj vivofonto.

Ci ne povas kune loĝi en la domoj de l'vivantoj kaj en la tomboj de l'mortintoj.

Necesas do ke ci elektu, Simono filo de Jono, kaj, se ci volas min sekvi, ke ci lasu la mortintojn entombigi siajn mortintojn.

Poste, de tie foririnte, li iris al la limoj de Tiro kaj Sidono por eskapi de siaj malamikoj; kaj, enirinte en iun domon, li deziris, ke neniu sciu pri tio; sed li ne povis resti kaŝita.

Kaj li demandis al siaj disĉiploj : Kion diras la homoj pri mi ?

Kaj ili respondis : Iuj diras, ke ci estas Johano la Baptisto; aliaj, Elijo; aliaj, Jeremio aŭ unu el la profetoj.

Li skuis la kapon kaj demandis : Kaj vi, kion vi diras ?

Simon-Petro, ekparolante, diris : Ci estas la Kristo, la filo de l'vivanta Dio.

Kaj Jesuo respondis : Malfeliĉa ci estas, Simono filo de Jono, ĉar tiujn aferojn diras al ci la karno kaj la sango kaj la deziro reĝi.

Kaj ci parolas pri mi, kiel pluraj Zelotoj parolas pri Eleazaro, kiu jam kulpis en sia koro milojn da krimoj;

Kaj ci parolas pri mi, kiel pluraj Samarianoj parolas pri Simono la mago, kiu ĉiutage kulpas mil mensogojn.

Vere, vere, Petro, mi diras al ci, nenium nomu Kristo. Ĉar la Kristo estas nek tie nek ĉi tie, kaj ci ne vidos lin per la korpaj okuloj;

Sed, se iam ci liberiĝos el la deziro reĝi, se ci ĉesos rigardi cin en estonteco sidanta sur trono;

Tiam ci scios, ke la Kristo estas la vorto de l'Patro, kaj ke tiu vorto estas Amo, kaj ke la regno al li promesita ne estas regno simila al tiuj, kiujn ci konas,

Kun soldatoj kaj sur tremantaj popoloj. Sed ĝi estas regno en la koroj.

Kaj kiam ci parolas pri la regno de l'Kristo, estu kiel ci parolas pri la regno de amo kaj justo.

Ĉar la Kristo jam reĝis en la koro de Jesajo la profeto, kiam, parolante pri la jaro de Promeso, li diris al Izraelo : Mi faros via estraro la Pacon kaj viaj administrantoj la Justecon.

Komprenu do, Simono filo de Jono, ke la regno de l'Kristo, kiu ne estas homo, estos veninta nur tiam, kiam neniu homo regos, neniu homo estos administranto,

Kaj kiam ĉiuj homoj vivos kiel fratoj.

Min koncerne, mi estas homo simila al ceteraj. Sed mi pelas el mia koro la malbonajn pensojn :

Kiuj estas manoj malfermitaj por kapti riĉaĵojn aŭ kapti regpovon;

Kiuj estas manoj premantaj la tenilon de glavo kaj pretaj frapi tiun, kiu ne frapas min, aŭ kiu frapas min;

Kiuj estas manoj similaj al iloj, kaj movataj per ordonoj de riĉuloj, per ordonoj de mastroj, per ordonoj de pastroj aŭ per ordonoj de reĝoj kaj de administrantoj.

Kaj, en la tagoj, en kiuj mi sentas min pleje liberigita el malbonaj pensoj, en kiuj mi pleje sentas, ke la Kristo-amo reĝas sola en mia koro;

Mi diras : Mi estas filo de Dio. Sed ĉiu homo devas povi diri : Mi estas filo de Dio.

Petro aŭdis tiujn vortojn per la korpaj oreloj, sed li ne komprenis ilin; kaj li diris en si mem : Pravas mia majstro.

Ĉar oni donis la nomon Kristo al aliaj, kiuj estas malpli grandaj ol li, kaj mi devus doni al li nomon pli grandan, ol tiu de Kristo.

Kaj, ĉar li estas amo kaj justo, li anoncas ja sian regnon, kiam li anoncas la regnon de justo kaj amo.

Kaj mi, kiu estas nun la unua el liaj disĉiploj, mi estos tiam la unua el tiuj, kiuj reĝos kun li.

Ĉar mi ĉion oferis al li, kaj estas juste, ke mi estu pagota pro miaj oferoj.

Poste, laŭte li diris : Majstro, ci nomis min Petro; sur tiu ŝtono, sendube ci volas konstrui la domon de cia regno.

Sed Jesuo ridetis kaj diris : Mi konstruos pleje sinagogan, kaj mi donos al ci ĝiajn ŝlosilojn.

Sed mi jam donis al ci pli multevalorajn ŝlosilojn, kaj ci ne scipovas ilin uzi.

Mi donis al ci la ŝlosilojn de la Regno, kaj ci ne eniris en la Regnon.

Tamen, Petro, kion ajn ci ligas sur la tero, tio estas ligita en la ĉielo.

Sed jen mi ankoraŭ diras al ci vortojn, kiuj ne estas por ciaj oreloj.

Tamen, Petro, strebu ligi cin al bono kaj amo, por ke la Patro ligu cin al bono kaj amo.

Kaj deligu cin de la deziro reĝi kaj de ĉia penso el orgojlo kaj perfortemo, por ke la Patro deligu cin de ĉiuj tiuj katenoj.

Kaj deligu cin de cia malbona amo al mi; ĉar ci amas min kun kruda espero por ci kaj por mi.

Do ligu cin per amo pli bela, ne plu esperante pri teraj havaĵoj por cia amato nek por ci mem.

Ĉar mia regno estas regno de ĝojo en la koro kaj de sufero ekstere. Necesos, ke mi estu persekutita de la de la pliaĝuloj, ĉefpastroj kaj skribistoj.

Kaj eble mia trono estos kruco. Ĉar ĉiam ili mortigis la profetojn kaj la dirantojn de veraĵoj, kaj ĉiujn parolantajn pri amo inter la furioza trupo de iliaj malamoj.

Kiu parolas pri amo meze de la filoj de malamo, ĉu li ne estas kiel ŝafido inter lupoj ?

Kaj kiel la lupoj ne disŝirus la ŝafidon ?

Tiam Petro, prenante lin aparte, komencis admoni lin dirante: Al Dio ne plaĉu, Majstro; tio ne okazu al ci.

Sed Jesuo, sin turnante, diris al Petro : Retiriĝu de mi, Satano; ĉar ci estas al mi skandalo, kaj ci ne havas emon al la aferoj de Dio, sed nur al la aferoj de la tero.

Poste, revenante al siaj disĉiploj, li diris al ili : Se iu volas veni en miaj vojoj, li estu preta por ĉiaj krucoj.

Ĉar kiu ajn pripensas savi sian vivon, tiu per tio mem ĝin perdis; kaj li jam ne estas plu vivanto, ĉar li

estas maltrankvilo kaj tremado.

Kaj kiu ajn estas preta perdi sian vivon, tiu estas trovinta sian vivon. Ĉar tiu sola povas libere pensi kaj sentime ami; kaj tiu sola estas filo de Dio.

Sed kiel utilis al homo gajni la universon, se li perdus sian animon? Nu, ĉu vi scias, kio estas perdi sian animon?

Perdi sian animon, ĉu ne estas doni ĝin al la aferoj? Ĉu ne estas fordoni ĝin al la riĉaĵoj, al la reg-eco, aŭ eĉ nur al la malkuraĝa deziro longe vivi?

Ĉapitro XVII.

Ses tagojn post tiuj okazoj, Jesuo, preninte kun si Petron, Jakobon kaj Johanon lian fraton, kondukis ilin sur altan monton por preĝi.

Dum li silente preĝis, la tri disĉiploj, haltinte iom malpli alte, ankaŭ preĝis kaj interparolis.

Kaj en iliaj preĝoj, kaj en la vortoj, kiujn ili parolis unu al aliaj, ili nomis Jesuon Kristo kaj Savonto, kaj ili komparis lin kun Moseo kaj Elijo.

Kaj ili diris: Kristo Jesuo parolas al la Eternulo sur la montoj, kiel Moseo parolis al li sur Sinajo. Kaj, kiam Moseo remalsupreniris en la ebenaĵon, oni vidis, ke la haŭto de lia vizaĝo estis tute radianta.

Same, se nia Majstro turnus al ni sian vizaĝon, sendube ĝi lumradius al niaj okuloj kiel la gloro de la Eternulo.

Ĉar ĉiuj aliaj aferoj, kiujn faris Moseo, ĉu ne estas ankaŭ de li faritaj? Ĉu la akvoj ne obeas al li, kiel al Moseo?

Nu, tion dirante, ili endormiĝis. Kaj Petro, laŭ sia kutimo, ricevis sonĝon el la gloro kaj malsaĝo.

En tiu sonĝo, la vestoj de Jesuo brilegis kiel lumo; kaj lia vizaĝo transformita belege lumis kiel la suno.

Samtempe aperis Moseo kaj Elijo, interparolantaj kun li.

Poste, jen venis nuboj, kiu superombriis ilin, kaj subite eliĝis voĉo el la nuboj, diranta: Ĉi tiu estas mia tre-amata filo, en kiu mi metis mian tutan amon; aŭskultu lin.

Nu, en tiu punkto el la sonĝo de Petro, Jesuo, lin

tuŝante, diris : Leviĝu, kaj ni malsupreniru.

Sed Petro, malfermante la okulojn, ekvidis Jesuon kun du aliaj homoj. Kaj la leviĝanta matenhelo igis liajn vestojn pli blankaj kaj brilaj ol kutime.

Kaj Petro diris : Majstro, estas bone por ni ĉi tie. Se ci volas, ni starigu tri tendojn, unu por ci, unu por Moseo kaj unu por Elijo.

Ĉar li ne sciis precize, kion li diris, tial ke li estis ne plene vekiginta kaj li estis plena de timo.

Jesuo respondis : Kial ci parolas pri Moseo kaj Elijo ? Aŭ ĉu ci ne vidas, ke mi estas sola kun Jakobo kaj Johano, kiuj leviĝis antaŭ ol ci ?

Tiam Petro, sin levante, diris : Majstro, ĉu mi ricevis sonĝon ? aŭ ĉu plivere mi vidis cian gloron, kiun ci ordinare kaŝas al mi, por ke mia koro ne malhumiliĝu?

Kaj Petro rakontis, kion li vidis. Kaj Jakobo kaj Johano lia frato ekmiris, ĉar ankaŭ ili sonĝis pri Moseo kaj Elijo.

Sed ilia sonĝo estis malklara, kaj ĝis tiam ĝi fuĝis, kiam ili volis kapti ĝin. Tial ili kredis esti vidintaj tion, kion Petro estis vidinta.

Kaj, malsuprenirante de la monto, Jesuo malpermesis, ke ili rakontu tiujn aferojn. Kaj Petro demandis : Kial mi ne diru la veron ?

Sed Jesuo respondis : La vero de Petro ne estas vera.

Koncerne min, neniam mi rakontas sonĝojn sen diri, ke sonĝojn mi rakontas; kaj se mi proponas parabolon, mi diras, ke parabolon mi proponas;

Kaj se iam mi rakontus la viziojn de frenezulo, mi dirus, ke viziojn de frenezulo mi rakontas.

Kaj Johano diris : Pravas la Majstro. Tiujn aferojn ni ne devas diri al la popolo. Ili incitus kontraŭ lin kaj igus lin mortigi.

Sed Petro respondis : Ĉu Dio ne sendus, por lin defendi, dek du legiojn el siaj anĝeloj ? Aŭ, se estas utile, ke la Majstro estu morigita kiel la profetoj,

Ĉu Dio ne revivigus lin el inter la mortintoj ?

Tiam Jesuo, milde lin mokante, diris : Ne ripetu do tiujn aferojn al iu ajn, ĝis mi estos revivigita el inter la mortintoj.

Post kiam ili malsupreniris de la monto, ili renkontis ĉiujn disĉiplojn. Kaj, irante al unuj kaj aliaj,

Petro, Jakobo kaj Johano rakontis, kion ili kredis esti vidintaj.

Kaj ĉiuj disĉiploj miris kaj ĝojis, dirante : Kia gloro estas do rezervita por ni en la Regno !

Sed baldaŭ ili interdisputis pri la demando, kiu el ili estos la plej granda.

Kaj Jesuo, silente marŝante, aŭdis plurajn el iliaj paroloj.

Kaj ili alvenis al Kapernaumo kaj eniris en la domon. Tiam Jesuo demandis al ili : Pri kio vi kune parolis sur la vojo.

Sed ili silentis; ĉar ili ne kuraĝis diri, ke ili disputis sur la vojo, kiu el ili estos la plej granda.

Nu, enirante en la urbon, ili estis renkontintaj infaneton; kaj Jesuo, ĝin prenante per la mano, estis ĝin kondukinta ĝis en la domo, parolante kun ĝi.

Li do metis tiun infaneton en ilian mezon, kaj, kinte ĝin, li diris al ili : Vere, mi diras al vi, se vi ne fariĝos tiaj, kia tiu infano, vi ne eniros en la Regnon.

Ĉar, kiu volas esti pli granda ol la aliaj, kiel li enirus en la Regnon, kie ĉiuj estos egalaj ?

Kaj kiu pripensas igi siajn fratojn siaj sklavoj, kiel li ankoraŭ havus fratojn ?

Sed Petro diris : Necesas, ke mi estu pli granda ol la aliaj, se mi ne volas, ke la aliaj estu pli grandaj ol mi;

Kaj necesas, ke mi havu glavon, se mi marŝas inter glavoportantoj.

Nu, ĉiuj homoj portas glavojn; kaj kiuj ne lasas vidi siajn armilojn, tiuj estas la plej kruuele armitaj; Kaj ĉiu volas esti super mi.

Kaj, se ankaŭ mi ne volus esti super la aliaj, kio mi fariĝus ?

Ĉiuj estus super mi. Kaj ĉiuj min surtretus, eĉ ne vidante min; aŭ, min vidante, ili vole min ofendus.

Kaj Simono la Zeloto diris : Prava estas Petro. Kiu, ofendite, pardonas, tiu vokas al si ofendon; kaj kiu sin malgrandigas, tiun traktas ĉiu kiel sklavon.

Tiam Jesuo diris al ili : Ho Simono filo de Jono kaj ci Simono Zeloto, kiel vi kredas vin miaj disĉiploj? Mi, mi pardonas al miaj fratoj, kiam ili min ofendas;

Kaj mi faris al mi koron simplan kaj mildan kiel la koro de tiu infano.

Kaj Simon-Petro demandis : Majstro, kiomfoje ci ordonas, ke mi pardonu al mia frato, kiam li estos ofendinta min ?

Ĉar mi metis en cin mian amon kaj esperon; kaj mi volas gardi ciajn ordonojn,

Por ke mi eniru kune kun ci en la Regno, kaj ke ci ne forgesu min, kiam ci difinos ĉies rangon.

Kaj mi konsentas esti malgranda dum mallonga tempo por esti granda dum longa tempo.

Ĉu do ci ordonas, ke mi pardonu ĝis sep fojoj ?

Sed Jesuo diris : Simono filo de Jono, faru al ci koron, kiu scipovu nur pardoni. Kaj ĉiam pardonu.

Pardonu do al cia frato ne sep fojojn, sed sepdekoble sep fojojn, kaj eĉ pli se necese.

Ĉar la Regno de l'Ĉielo estas simila al reĝo, kiu volis fari kalkulon kun siaj servistoj.

Kiam li komencis kalkuli, oni prezentis al li unu, kiu ŝuldis al li dekmil talantojn

Kaj, ĉar tiu ĉi ne havis, per kio pagi, la reĝo ordonis, ke estu venditaj li, lia edzino kaj liaj infanoj, por ke la ŝuldo estu pagita.

Sed tiu servisto, ekfalante al liaj piedoj, lin petegis, dirante : Sinjoro, paciencu kontraŭ mi, kaj mi ĉiom pagos.

Tiam la majstro, kortuŝite de kompatato, lin ellasis kaj liberigis el lia ŝuldo.

Nu, tiu servisto, elirinte, renkontis unu el siaj kunuloj, kiu ŝuldis al li cent denarojn; kaj, lin kaptinte ĉe la gorgo, li preskaŭ strangolis lin, dirante : Pagu al mi, kion ci ŝuldas.

Kaj lia kunulo, ekfalante al liaj piedoj, petegis lin, dirante : Paciencu kontraŭ mi, kaj mi ĉiom pagos.

Sed li ne volis aŭskulti lin, kaj li metigis lin en karceron, ke tie li restadu, ĝis la ŝuldo estos pagita.

Tion vidante, la aliaj servistoj indignis, kaj venis raporti al la reĝo pri la okazo.

Tiam la reĝo alvokis tiun homon kaj diris al li : Al ci, maliculo, mi fordonis cian tutan ŝuldon, tial ke ci petegis min;

Ĉu ci ne devis kompati cian kunulon, kiel mi kompatis cin ?

Kaj la reĝo, incitite, lin transdonis al persekutistoj, ĝis li estos paginta sian tutan ŝuldon.

Petro diris : Majstro, mi forlasos al miaj ŝuldantoj kaj pardonos al miaj ofendantoj, por ke mi estu, en cia Regno, riĉulo al neniu ŝuldanta;

Kaj ke la Eternulo fordonu al mi mian tutan ŝuldon.

Jesuo diris al li : Iru, kaj faru, kiel ci diris.

Kaj Petro ankaŭ diris : Ĉar mi ne volas esti fordonita al persekutistoj, t.e. al demonoj.

Jesuo respondis : La Patro estas pli bona ol la reĝo, pri kiu mi parolis. Kaj nenium li fordonas al persekutistoj.

Sed kiu ne pardonas, tiu sin mem fordonas al persekutistoj, t.e. al turmentantaj pensoj.

Do liberigu cin el ĉiuj tiaj pensoj; liberigu cin el la deziro pri riĉaĵoj, el la deziro esti super ciaj fratoj, el la deziro reĝi, el la orgojlo kaj el aliaj demonoj, kiuj agitiĝas en ci;

Tiam ci ne havos plu ion ajn, per kio oni povus ofendi cin, kaj ci senpene pardonos al ciaj fratoj.

Ĉar ci diros : Neniu povas kaŭzi al mi ian malbonon; kio venas de aliaj, tio ne povas ofendi min mem, sed nur demonojn, kiuj iĝis al mi fremdaj.

Kaj mi eniris en la Regnon, kie neniu povas ion kontraŭ mi, ĉar por mi ne ekzistas plu ia malbono.

Kaj eĉ, la senprudentulo, kiu volas insulti min, ĉu mi ankoraŭ lin pardonu ? Ne, mi ne plu bezonas lin pardonon, sed mi klinas min al li pro kompato.

Ĉar li ne scias, kion li faras; kaj la sago, per kiu li kredas min bori, revenas al li; kaj la vundo kaj insulto, kiujn li direktas al mi, refalas sur lian koron; kaj nur sin mem li vundas kaj insultas.

Petro, de ĉi dependas, ke ci supreniru ĝis la Regno super nuboj kaj ŝtormoj; kaj nur malsupren povas la nuboj ĵeti la insulton de siaj pluvoj kaj la ofendon de siaj hajloj.

Sed Petro ne komprenis ĉiujn tiujn vortojn de Jesuo.

Tiam iu doktoro pri la Leĝo eniris en la domon kaj diris al Jesuo : Majstro, kion mi faru, ke mi heredu la eternan vivon ?

Jesuo respondis : Kio estas skribita en la Leĝo kaj kion ci legas en la Libro ?

Li respondis : Amu la Sinjoron cian Dion per cia tuta

koro, per cia tuta animo, per cia tuta forto kaj per cia tuta menso, kaj amu cian proksimulon, kiel cin mem.

Jesuo diris : Ci respondis, kvazaŭ ci parolus per cia koro, ne per cia memoro : faru do, kion ci diris, kaj ci vivos.

Sed tiu homo, celante delogi de Jesuo liajn disĉiplojn, demandis : Kaj kiu estas mia proksimulo ?

Jesuo, ridetante, sin turnis al Petro kaj diris : Simono filo de Jono, kion ci opinias pri tio ? Eble, senkonscie, ci estas pli proksima de tiu viro ol de mi;

Kaj al li pli plaĉos cia respondo, ol mia.

Petro diris kun memfido : Mia respondo kaj cia estos ununura respondo. Kaj se oni demandus al ĉiu Izraelido unu post alia, ili ĉiuj same respondus.

Ĉar nia proksimulo estas ĉiu ido de Izraelo.

Jesuo do reprenis la parolon kaj diris : Unu homo malsupreniris de Jerusalemo al Jeriĥo, kaj falis en la manojn de rabistoj, kiuj lin senvestigis; kaj, vundinte lin per pluraj batoj, ili foriris lasante lin duone senviva.

Nu, okazis, ke iu pastro malsupreniris la saman vojon, kaj, vidinte tiun homon, li preterpasis.

Ankaŭ iu levido, veninte al tiu loko kaj lin vidinte, preterpasis.

Sed iu Samariano, kiu sekvis la saman vojon, venis al tiu homo, kaj, lin vidinte, estis kortuŝita de kompatato.

Kaj, proksimiĝinte, li bandagiis liajn vundojn kaj surverŝis oleon kaj vinon; poste li metis lin sur sian ĉevalon kaj kondukis lin al gastejo kaj zorgis pri li.

La morgaŭon, forirante, li eltiris du denarojn kaj donis ilin al la gastejestro, kaj diris al li : Zorgu pri li, kaj ĉio, kion ci elspezos, mi repagos al ci je mia reveno.

Kiun el tiuj tri vi opinias la proksimulo de tiu, kiu falis en la manojn de la rabistoj ? Ĉu unu el la Izraelidoj ?

Petro ne respondis, kaj la doktoro ne respondis. Sed Natanaelo diris : La proksimulo de tiu homo estas tiu, kiu evidentigis sian kompaton kontraŭ li.

Jesuo plue demandis : Se, anstataŭ esti helpita de Samariano, li estus helpita de Romiano aŭ de alia pagano, aŭ de impostisto, kiu estus lia proksimulo ?

Kaj, ĉar ĉiuj silentis, li reparolis : Kiam Petro man-

ĝas frukton, ne laŭ ĝia gusto li juĝas tiun frukton;
Sed li demandas, kiuj estas la radikoj de la arbo,
kaj ĉu ili enprofundiĝas en Izraela grundo.

Koncerne min, mi diras al vi, vere : tiel longe,
dum mi estis infano bezonanta pri alies helpo, mi nomis
mia proksimulo tiun ajn, kiu povis bonfari al mi;

Kaj precipe Johanon la Baptiston mi tiutempe nomis
mia proksimulo.

Kaj, de kiam mi estas homo, kiu marŝas ne bezonante
alies manon,

Mi nomas mia proksimulo ĉiun homon, kiun mi renkon-
tas.

Sed precipe tiun, ĉu li estas el la domo Izraela,
el la domo Samaria, el la domo Roma aŭ el ĉiu alia do-
mo, al kiu mi povas bonfari.

Tiam Simono la Zeloto diris : Min koncerne, neniam
mi konfuzos la idon de Izraelo kun la malamiko de Izra-
elo, ĉar la ido de Izraelo estas al mi frato;

Sed la fremdulo estas al mi vorema lupo, kaj necesas,
ke mi lin mortigu, aŭ ke li min voru.

Kaj la idoj de Izraelo estas solaj nobelrasaj kaj
solaj filoj de la Eternulo.

Jesuo respondis : Kiu estis en la komenco, tiu ne
estas nomata Izraelo. Sed kiu estis en la komenco, tiu
nomiĝas Adamo.

Kaj la Patro kreis ununuran Adamon,

Por ke neniu homo diru al alia : Mi estas pli nobel-
rasa ol ci.

Kaj Simon-Petro reparolis : Ĉu ne estas skribite, ke
la Eternulo ordonis detrui la malamikojn de Izraelo,
kaj ke li forĵetis Saulon, tial ke li domaĝis kelkajn
el ili ?

Sed Jesuo respondis : Ho Simono filo de Jono, kaj ci
Simono Zeloto, kaj vi ĉiuj, tre amataj miaj,

Ne fidu la Skribojn pli ol Dion mem.

Ĉar la skribistoj metis en la Skribojn mensogojn.

Pesu kaj juĝu do tion, kio estas en la Libro; distin-
gu kaj elektu.

Sed Petro, skuante la kapon, diris : Se la parolo de
Dio fariĝos trompa, per kio ni ĝin juĝos ?

Por mi la Skribo estis la pesilo, per kiu mi pesis

ĉiujn aferojn.

Nun ci ordonas al mi pesi la Skribojn. Per kio do mi pesu la pesilon ?

Jesuo respondis : Ho Petro-Ŝtono, forĵetu la ŝtonan koron, kiu estas en cia brusto, por ĝin anstataŭigi per koro el karno.

Ĉar homa koro estas la sola pesilo por pesi la skribojn, la parolojn kaj la agojn.

Ĉapitro XVIII.

Iam Jesuo predikis la Regnon de Dio, eksplikante, ke la Regno de Dio estas amo,

Kaj ke neniu povas servi du mastrojn, sed ke kiu amas la riĉaĵojn, tiu ankoraŭ ne amas la homojn.

Kaj li diris : Elektu do, aŭ resti en la ekstera mal-lumo, katenitaj al la deziro gajni kaj al la timo perdi;

Aŭ, liberigante el ĉiuj katenoj, elektu penetri en vin mem, interne en la helo, kiun la Patro tie eklum-igis.

Tiam, unu el la aŭskultantoj diris al li : Majstro, diru al mia frato, ke li dividu kun mi la heredaĵon.

Sed Jesuo respondis : Ĉu mi estas starigita por esti via juĝanto aŭ dividanto ?

En mia Regno ne estas juĝantoj. Sed ĉiu demandas sian koron kaj diras al ĝi : Juĝu min.

Kaj en mia Regno ne estas dividoj. Sed ĉiu diras al sia amo : Faru ĉion, kion ci volos.

Ĉar en mia Regno neniu nescias, ke estas pli da ĝojo en dono ol en ricevo.

Nu, tiu viro foriris, dirante : Mi perdas mian tempon apud ĉi tiu malbona profeto. Tamen, mi diros al miaj amikoj, ke ili konduku al li mian fraton.

Jesuo, plu parolante, diris : Ĉu la posedaĵoj el tiu ĉi mondo ne estas similaj al la manao, kiun kolektis niaj patroj en la dezerto ?

Vi scias ja, ke ĉiu devis kolekti da ĝi po unu mezuro ĉiutage. Nu, pluraj estis avidaj kaj prenis plimulte. Sed, alveninte al sia tendo ili troviĝis kun nur unu me-zuro, kiel la aliaj.

Tiel, kiu amasigas multe da greno en siaj grenejoj,

kaj pro kiu pluraj havas neniom da greno, tiu tamen ne manĝos pli ol sia mezuro, kaj ĉiuj liaj riĉaĵoj ne pli-grandigos lian buŝon aŭ lian ventron;

Kaj kiu ŝtofojn amasigas, kaj pro kiu pluraj estas senvestaj, ankaŭ tiu portas nur sian mezuron, kaj ĉiuj liaj riĉaĵoj ne plialtigos lian staturon je unu ulno.

Kaj vi scias, ke la hieraŭa manaŭo estis morgaŭe putrinta.

Same, kiu heredas, tiu hodiaŭ ĝojas. Sed, post kiam li dormis sur sia ĝojo, matene li trovas ĝin putrinta.

Kaj lia heredo ne plu ĝojigas lin, sed kaŭzas al li zorgojn, kaj lin igas pripensi, ke ekzistas ŝtelistoj.

Kaj vi scias, ke la sesan tagon oni kolektis po du mezuroj da manaŭo, unu el kiuj konserviĝis senputre por la sabato.

Vi scias ankaŭ, ke Moseo metis unu mezuron da ĝi en la keston de interligo, por ke ĝi estu memorsigno pri la boneco de l'Sinjoro, kaj tiu mezuro evidentiĝis ne-putrema.

Ĉar la sabato kaj la kesto estis figuroj pri la Regno. En la Regno, kie ĉio apartenas al ĉiuj, ĉiuj riĉaĵoj estos uzataj, neniu putrante, kaj nenian ĝojon putrigos la timo pri ŝtelistoj.

Sed, jam nun, vi povas meti viajn riĉaĵojn en la Regnon, donante ilin al malriĉuloj. La malriĉuloj estas la sankta kesto, en kiu ne putras la manaŭo.

Kaj la ĝojo de donanto ne fariĝas, kiel la ĝojo de akiranto, konfuzo kaj maltrankvilo.

Vi scias ankaŭ, ke la manaŭo gustis diverse, laŭ tiuj, kiuj ĝin manĝis; kaj ĝi estis al unuj sengusta kaj naŭza, sed al aliaj frandega.

Ĉar la gusto de tio, kion vi manĝas, estas en via buŝo, ne en la aĵoj; kaj la gusto de tio, kion vi posedas, estas en via koro, ne en la aĵoj.

Kaj por kiu estas avara aŭ malica, ĉiuj aĵoj estas sengustaj kaj naŭzaj.

Li parolis plu pri pluraj aliaj aferoj kaj diris al ili plurajn aliajn similaĵojn.

Post kiam li ĉesis paroli, kelkaj rakontis, kio okazis al iuj Galileanoj, kies sangon Pilato miksis kun tiu de iliaj oferaĵoj.

Kaj Jesuo demandis ilin: Ĉu vi opinias, ke tiuj

Galileanoj estis pekuloj pli ol aliaj Galileanoj, tial ke ili tion suferis ?

Aŭ pri tiuj dek ok, sur kiujn falis la turo en Silo-ano kaj ilin mortigis, ĉu vi opinias ilin pli kulpaj ol ĉiuj loĝantoj en Jerusalemo ?

Kaj, ĉar ili silentis, Jesuo reparolis : Ne, pli kulpaj ili ja ne estis, kaj la eksteraj aferoj ankoraŭ ne dependas de la justeco de kelkiuj.

Sed, kiam ĉiuj homoj estos justaj kaj bonaj, tiam la aferoj estos justaj kaj bonaj.

Tamen, vi estu justaj kaj bonaj jam hodiaŭ. Ĉar la internaj aferoj jam hodiaŭ dependas de via justeco kaj de via boneco.

Faru do al vi koron kaj buŝon, kiuj trovu la manon frandega.

Kiu, doninte sian vinon al sia frato, mem trinkas akvon, ĉu tiu ne havas en la buŝo kaj en la koro guston de plej frandega vino ?

Sed kiu trinkas tro da vino, kaj senigas je ĝi aliuojn, ĉu tiu ne havas en la koro galan guston kaj en la buŝo vomajan guston ?

Kaj kelkaj diris al li : Majstro, ĉu nur malmultaj homoj estos savitaj ?

Kaj li respondis : Penu pasi tra la mallarĝa vojo, sur kiu mi marŝas; ĉar la vojo estas mallarĝa.

Sed ĉiu trapasanto ĝin iom plilarĝigas. Kaj, se vi volas, baldaŭ ĝi fariĝos la reĝa vojo, tra kiu la tuta popolo eniros en la Regnon.

Tiun saman tagon kelkaj Fariseoj venis diri al li : Tiriĝu de ĉi tie kaj foriru, ĉar Herodo cin serĉas por mortigi cin.

Li respondis al ili : Iru diri al tiu vulpo : Jen, mi forpelas la malbonajn pensojn kaj mi flegas la malsanajn korojn dum kelkaj tagoj plu; kaj post kelkaj tagoj mi finos mian vivon.

Tamen mi devas marŝi hodiaŭ, morgaŭ kaj kelkajn tagojn plu, ĉar en Jerusalemo devas morti profeto.

Kaj pluraj diris al li : Majstro, ne mortu, sed restu kun ni.

Sed li respondis : Vere, vere, mi diras al vi, necesas, ke mi mortu, por ke vi aŭdu kaj amu plurajn el miaj vortoj.

Necesas, ke mi mortu murдите de la Leĝo, por ke vi malestimu kaj malamu la Leĝon;

Necesas, ke mi mortu murдите de la pastroj, por ke vi malestimu kaj malamu la pastrojn;

Necesas, ke mi mortu murдите de ĉiuj, kiuj aŭdacas frapi, por ke vi malestimu kaj malamu tiun ajn, kiu aŭdacas juĝi kaj kiu aŭdacas frapi.

Tiam iu Fariseo interrompis lin, dirante : Do ne ĉiuj homoj estas plu ciaz fratoj, ke ci ordonas al ni malestimu kaj malami kelkajn el ili ?

Jesuo respondis : Malestimu kaj malamu la pastron, sed ne la homon. Kaj, se vi povos, veku la homon el la pastro, por ke ne plu ekzistu pastroj.

Malestimu kaj malamu la juĝiston aŭ la soldaton, sed ne la homon. Kaj, se vi povos, veku la homon el la juĝisto aŭ la soldato, por ke ne plu ekzistu soldatoj kaj ne plu juĝistoj.

Malestimu kaj malamu la riĉulon, sed ne la homon. Kaj, se vi povos, veku la homon el la riĉulo, por ke ne plu ekzistu riĉuloj kaj ne plu malriĉuloj.

Malestimu kaj malamu la Leĝon, ĉar ĝi estas servuteco sur la homo, kaj faras vin sklavoj de la riĉulo, de la pastro, de la juĝisto kaj de la soldato; kaj ĝi faras la pastron, la juĝiston, la soldaton kaj la riĉulon sklavoj de sia malsaĝo.

Koncerne min, mi estas kiel patrino, kiu, ĉar ŝi amas sian infanon, malamas la febron, kiu turmentas ŝian infanon, aŭ la lepron, kiu faras el ŝia infano doloran korpon kaj objekton de abomeno.

Tial, ke mi amas ĉiujn miajn fratojn, mi malamas la febrojn kaj la leprojn, kiuj faras el pluraj mal-sanulojn kaj objektojn de abomeno; la febrojn kaj la leprojn, kiuj faras, ke pluraj, anstataŭ esti homoj sanaj,

Estas riĉuloj, juĝistoj, pastroj aŭ soldatoj.

-Kaj, forsendinte la popolon, li restis sola kun siaj disĉiploj kaj li diris al ili : Tre amataj miaj, necesas, ke mi mortu pro amo, por ke vi mortu pro amo.

Ĉar vi provas ami min; sed vi ankoraŭ ne scipovas amon, tial ke vi ne amas ĉiujn, kiujn mi amas.

Kaj vi estas kvazaŭ pajlamasoj, kiujn mia ardo sekigis, sed ankoraŭ ne ekbruligis.

Mia morto estos la torĉo, kiu vin ekbruligos. Ĝi bruligos vian inteligenton kaj vian koron.

Tiel, incendiante min, mi estos kaŭzinta sepdek incendiojn kaj pli.

Kaj ankaŭ vi mortos pro amo. Kaj eble ĉiu el vi ekbruligos sepdek amojn kaj pli. Kaj kiujn vi estos ekbruligintaj, tiuj faros, kiel vi faris.

Tiel, post mallonga tempo, la tuta tero estos vestita per robo el amo kaj fajro.

Ho miaj filoj tre amataj, la Regno de l'Ĉielo, ĝi estas amo.

Eniru ni tra la mallarĝa vojo, por ke nia trapaso plilarĝigu ĝin por tiuj, kiuj venos post ni.

Pli poste, la feliĉo estos vivi de amo, vivi per amo kaj por amo.

Tiel longe, ĝis tia vivo estos ebla, ĉu la sola feliĉo ne estas morti pro amo kaj por amon disvastigi ?

Vidante nin, la homoj diros : Kio estas do tiu amo, kiu pli valoras ol la vivo, kaj pro kiu ĉi tiuj donas sian vivon ?

Kaj ili gustumos nian amon; kaj ili ne deziros plu alian nutraĵon.

Tiam Simon-Petro diris mallaŭte al Simono la Zeloto : Ni ne lasos lin morti, sed ni faros lin reĝo.

Ĉapitro XIX.

En tiu tempo Jesuo proponis al la popolo la parabolon pri la paŝtisto, kiu havis cent ŝafojn kaj perdis unu ŝafon; la parabolon pri la virino, kiu havis dek drakmojn kaj perdis unu drakmon; la parabolon pri la patro, kiu havis du filojn, kaj kies unu filo foriris;

Kaj li diris la ĝojon de la paŝtisto retrovanta la perditan ŝafon; la ĝojon de la virino retrovanta la perditan drakmon; kaj li diris, kiel la patro buĉas grasigitan bovidon, kiam la filo, kiun li kredis perdita, ekpentas kaj revenas en la domon.

Kaj li plu diris al ili, rilate la Regnon de Dio, plurajn similaĵojn, kiujn aliaj ekzakte raportis.

Sed, ĉar Fariseoj lin demandis, kiam venos la regno de Dio, li respondis : La regno de Dio ne venos okulfrappe.

Kaj oni ne diros : Jen estas ĝi ĉi tie, aŭ : Jen ĝi estas tie. Ĉar la Regno de Dio ne estas ekster la homo; sed ĝi estas interne en la homo, kaj ĉiu ankoraŭ povas vidi ĝin nur en si mem.

Sed, se iam ĉiu vidos ĝin en si mem, tiam oni vidos ĝin ankaŭ en la aliaj, kaj el ĉiuj feliĉaj internoj fariĝos la ekstera feliĉo.

Do ne aŭskultu tiujn, kiuj diras al vi : La Kristo estas ĉi tie, aŭ : La Kristo estas tie. Ĉar neniam oni vidos la Kriston per la korpaj okuloj.

Sed rigardu, ĉu la Kristo estas en via koro; kaj se li ankoraŭ ne estas tie, faru tiel, ke li tie estu.

Kiam en vilaĝo estas nupto, oni iluminas la vilaĝon. Sed kiel oni iluminas la vilaĝon ? Jen : ĉiu lumigas antaŭ sia domo, tiel ke ĉiuj domoj estas lumigataj kaj la strato estas lumigata.

Do ĉiu eklumigu en sia koro; kaj li plu farados nur lumajn agojn; kaj la tuta tero estos lumigata.

Tiam skribistoj kaj Fariseoj kondukis al li virinon surprizitan en adulto; kaj, stariginte ŝin en la mezo, ili diris al li : Majstro, ĉi tiu virino estis surprizita adultante.

Kaj la leĝo de Moseo ordonas al ni ŝtonmortigi la adultintojn; ĉi do, kion ci opinias ?

Tion ili diris por lin provi, kaj por poste diri : Tiu viro aprobas la murdon, aŭ : Tiu viro detruas la Leĝon.

Sed Jesuo, sin klininte, skribis per fingro sur la sablo. Nu, li skribis jenan parolon, kiun li amis ripe ti : Ne juĝu, kaj ci ne estos juĝita.

Ĉar ili plu demandis lin, li leviĝis kaj diris al ili : Kiu el vi estas senpeka, tiu ĵetu sur ŝin la unuan ŝtonon.

Kaj, denove kliniginte, li ree skribis sur la sablo. Nu, li skribis jenan parolon : Kiu frapas per la Leĝo, tiu pereos per la Leĝo.

Sed ĉiuj paroloj de Jesuo estis skribitaj sur sablo. Ĉar neniam li trovis apud si la marmoron de koro profunda kaj firma;

Kaj neniam estis ĉirkaŭ li io alia krom sabloj agitataj per la vento de l'pasioj aŭ la vento de l'frenezo.

Dume la Fariseoj kaj la Skribistoj fortiriĝis unu

post alia, unuavice la maljunuloj; kaj restis nur Jesuo kun tiu virino daŭrestaranta.

Tiam Jesuo, releviĝinte, kaj vidante neniun krom la virino, diris al ŝi : Virino, kie estas ciaj akuzintoj? Ĉu neniu cin kondamnis ?

Ŝi respondis : Neniu, Majstro. Kaj Jesuo diris al ŝi : Ankaŭ mi cin ne kondamnas. Ĉar mi ne scias la vortojn kondamnajn. Kaj eble ci pekis nur kontraŭ la Leĝon; nu, tio ja ne estas peko.

Iru do, virino, kaj neniam peku kontraŭ cian koron.

Post kiam la virino foriris, pluraj el la popolo revenis al Jesuo. Kaj unu junulo el la ĉefaj de tiu lando demandis al li : Majstro, kion mi faru por ricevi la eternan vivon ?

Jesuo respondis : Ci scias la ordonojn, kiuj estas skribitaj en la Leĝo kaj estas skribitaj en cia koro : Ne mortigu; ne ŝtelu; honoru cian patron kaj cian patrinon.

La junulo diris : Mi ĉiam observadis ĉiujn tiujn ordonojn.

Tion aŭdinte, Jesuo diris al li : Ankorau mankas al ci la afero plej necesa. Vendu ĉion, kion ci posedas, kaj disdonu la monon al malriĉuloj. Tiel ci havos trezoron en cia koro kaj ci povos min sekvi.

Sed tiu viro foriris tute malgaja, ĉar li posedis grandajn bienojn.

Kaj Jesuo diris : Estas pli facile por kamelo iri tra kudriltruo, ol por riĉulo eniri en la Reĝnon de amo.

Sed Natanaelo diris : Majstro, tiu viro estis justa. Kaj se ci ne estus postulinta, ke li faru en unu sola fojo tiel grandan oferon, eble li farus ĝin en pluraj fojoj.

Kaj ci estas malmilda, lin kondamnante tial, ke li ne faras pli ol siajn devon.

Jesuo respondis : Mi, neniun mi kondamnas. Sed kiu volas resti riĉa, ĉu tiu ne similas al malliberulo, kiu volas konservi siajn katenojn, kaj ĉu li ne sin mem kondamnas ?

Kaj li proponis al ili jenan parabolon : Estis unu riĉulo, kiu estis vestita per purpuro kaj bisino, kaj ĉiutage lukse festenis.

Estis ankaŭ malriĉulo, nomata Lazaro, kuŝanta apud lia pordo, tute kovrita de ulĉeroj; kaj hundoj venadis leki liajn ulĉerojn.

Okazis, ke tiu malriĉulo mortis kaj estis forportita de la anĝeloj en la sinon de Abrahamo. Ankaŭ la riĉulo mortis, kaj ricevis kiel sepultejon la inferon.

Dum li estis en turmentoj, li supren levis la okulojn, kaj de malproksime vidis Abrahamon kaj Lazaron en ties sino.

Kaj, ekkriante, li diris jenajn vortojn : Patro Abrahamo, kompatu min kaj sendu al mi Lazaron, ke li trempu en akvon la pinton de sia fingro por malvarmigi mian langon; ĉar en ĉi tiu flamo mi suferas egajn turmentojn.

Sed Abrahamo respondis : Filo mia, memoru, ke dum cia vivo ci havis ciajn bonaĵojn, kaj Lazaro havis siajn malbonaĵojn. Tial nun li estas en konsolo kaj ci en turmentoj.

Kaj la vortoj de Patro Abrahamo estis ne tute veraj kaj ne tute justaj; sed li diris vortojn tiajn, kiajn povas aŭdi oreloj de riĉulo.

Kaj la riĉulo diris : Juste ci parolis. Kaj mi nur suferu en silento, por ne ĝojigi Lazaron per miaj ĝemadoj.

Sed, malgraŭ lia penado, ĝemis la riĉulo. Ĉar la riĉuloj ne lernis, kiel ne ĝemi.

Tiel, ke Lazaro estis kortuŝita de lia peno. Kaj li diris al Abrahamo : Patro, mi havas koron, kiu suferas pro alies malbonoj pli ol pro miaj.

Kaj, se ĝi malbonon faras, justo ŝajnas al mi maljusta, kaj plorigas min.

Permesu do, ke mi prenu akvon kaj pacigu lian soifon kaj liajn brulvundojn.

Abrahamo respondis : Inter li kaj ni estas granda abismo, kaj ci ne povus transpasi de ĉi tie en la lokon, kie li estas.

Li sola povas plenigi la abismon kaj pasi de la loko, kie li estas, en la lokon, kie ni estas, de turmentoj en konsolon.

Sed li ne volas, kaj en ĉiu momento li denove sin mem kondamnas.

Ĉar Lazaro ploris, Abrahamo plie diris : Ciaj ploroj neniel utilos al li. Sed, se li plorus pro ciaj

estintaj malbonoj, aŭ pro la malriĉuloj nun suferantaj sur la tero, tiam la abismo estus plenigita kaj li estus faciligita.

Nu, la riĉulo aŭdis la vortojn de Abrahamo, kaj ili ĝemigis lin pli profunde.

Ĉar li estis nekapabla pensi pri aliaj krom si mem kaj plori pro aliaj krom si mem. Tial li ne estis faciligita.

Tiuj, kiuj aŭdis tiujn vortojn, demandis : Kiu do estos savita ?

Kaj Jesuo respondis : Savita estos tiu, kiu havos la forton necesan, por ami sin mem kaj la ceterajn homojn pli ol la riĉaĵojn.

Tiam Petro, ekparolante, diris al Jesuo : Ni ĉion forlasis por sekvi cin; kio estos do nia rekompenco ?

Kaj Jesuo respondis : Tiel longe ci petas pri rekompenco, ci ankoraŭ nenion forlasis.

Sed Petro mirante diris : Memoru, Majstro; mi estas ja la unua, kiu ĉion lasis por sekvi cin.

Jesuo respondis : En la Regno estas nek unuaj nek lastaj.

Sed la Regno similas al familiestro, kiu eliris je la ektagiĝo dungi laboristojn por sia vinberkampo.

Kaj, kontraktinte kun ili po unu denaro por la tago, li sendis ilin al la vinberejo.

Ĉirkaŭ la tria horo li ree eliris, kaj vidis aliajn starantajn senokupe sur la placo,

Al kiuj li diris : Ankaŭ vi iru al mia vinberejo, kaj mi donos al vi tiom, kiom estas juste.

Kaj ili iris. Li ree eliris ĉirkaŭ la sesa kaj la naŭa horoj, kaj same faris.

Kaj, ĉirkaŭ la dek-unua horo, li eliris kaj trovis aliajn nenion farantajn, al kiuj li diris : Kial vi staras ĉi tie la tutan tagon senokupe ?

Kaj ili respondis : Neniu nin dungis. Kaj li diris al ili : Ankaŭ vi iru al mia vinberejo, kaj vi ricevos tiom; kiom estas juste.

Kiam vesperiĝis, la mastro de la vinberejo diris al sia administranto : Voku la laboristojn, kaj donu al ĉiu el ili po unu denaro.

Nu, la unue venintaj, vidante, ke la laste venintaj ricevas unu denaron, kiel ili, ekmurmuris kontraŭ la fa-

miliestro,

Dirante : Tiuj lastaj laboris nur unu horon, kaj ci pagas al ili tiom, kiom al ni, kiuj elportis la ŝarĝon de la tago kaj la varmegon.

Sed li respondis al unu el ili : Amiko mia, mi faras al ci nenian maljustaĵon. Mi donas al ci, kion mi promesis, kaj kion ci bezonas.

Sed ci faras maljustaĵon al ci mem, kaj, se ci estas malfeliĉa pro alies feliĉo, pri tio kulpas neniu alia krom ci mem.

Ĉu tiuj ne estas homoj kiel ci, kaj ĉu ili ne sentas malsaton kaj soifon kiel ci ?

Oni eniras ĉe min, kiam oni scias, ke ĉe mi estas laboro por ĉiuj. Kaj, ekde kiam oni eniris, mi jam ne distingas inter la unuaj kaj la lastaj.

Kaj eĉ mi ne distingas inter la enviuloj kaj tiuj, kiuj estas feliĉaj pro alies feliĉo.

Ĉar kiel mi punus tiujn, kiuj havas malbonajn pensojn ? Kaj kian malbonon mi farus al ili pli grandan, ol la malbono, kiun ili al si mem faras ?

Oni ja ne prenas skurĝon por skurĝi la frenezulon, kiu sin mem skurĝas.

Vidu. Ĉi tiuj ricevis kiel ci nur unu denaron. Sed ilia koro estas pura je ĉia malico, kaj ili ĝojas, kvazaŭ ili estus ricevintaj multe pli.

Sed ci, ci havas, kiel ili, unu denaron. Sed cia koro estas plena je malico, kaj ci malĝojas, kvazaŭ ci estus neniom ricevinta.

Min koncerne, mi verŝis la saman akvon en ĉiujn vazojn. Sed cia vazo estis malpura, tial ci havas nenion por trinki.

Al ĉiuj saman sumon mi donis. Sed ili riĉiĝas per ĝojo, kiu venas de la pureco de ilia koro. Kaj ci, la malico de cia koro cin malriĉiĝas kaj senigas je ĉia ĝojo.

Vi nomas juston, preni al unuj por doni al aliaj, kaj doni multon al ĉi tiu kaj malmulton al tiu. Sed mi, mi nomas juston, doni al ĉiuj egale.

Kaj tial, ke al mi necesas unu denaro por miaj bezonoj de l'tago, mi donas ĉiutage po unu denaro al tiuj, kiuj estas ĉirkaŭ mi.

Tiam la patrino de la filoj de Zebedeo proksimiĝis

al li kun siaj filoj, kaj, prenante lin aparte, ŝi adorkliniĝis por ion peti de li.

Nu, Jesuo ŝin relevis, dirante : Neniĝis adorkliniĝo antaŭ iu ajn homo, sed ĉiam stare diru, kion ci havas por diri.

Ĉar ŝi hezitis, li plie diris : Se la vortoj, kiuj estas en ci, povas esti eldirataj nur surgenue, lernu de nun ne plu genuiĝi, kaj forgesu la vortojn nur genue eldireblajn.

Ŝi do, stare restante, diris : Majstro, Simon-Petro estas malhumilulo, kiu sin kredas plibona ol ĉiuj kaj volus al ĉiuj komandi;

Kaj ci ja scias, ke miaj filoj pli valoras ol li. Jesuo respondis : Amu ciajn filojn, kaj ne juĝu tiun, kiu ne estas filo cia.

Sed ŝi reparolis : Ordonu do, ke miaj ambaŭ filoj estu sidontaj unu dekstre de ci kaj la alia maldekstre en cia Regno.

Jesuo respondis : Ci ne scias, kion ci petas. Ĉu mi estas la sola reĝo en mia Regno ? Ĉu en mia Regno ne ĉiuj estas reĝoj ?

Koncerne ciajn filojn, ili sidas en mia koro inter la amaso de la homoj. Kaj mi tro amas ilin, ke mi amu ilin pli ol la aliajn.

Sed vi ne kapablas kompreni tiujn aferojn. Kaj tamen, ci mem tro amas Johanon, ke ci amas lin pli ol Jakobon, kaj ci tro amas Jakobon, ke ci amas lin pli ol Johanon.

Kaj li demandis : Ĉu ciaj filoj povas trinki la kalikon, kiun mi trinkos, kaj esti baptoj per la bapto, per kiu mi estas bapto ?

Jakobo kaj Johano respondis : Ni ja povas. Kaj Jesuo respondis : Se tiel estas, kial vi petas pri gloro ?

Aŭ ĉu vi ne scias, ke mi trinkos kalikon da amaraĵo kaj sufero, kaj ke la homoj baptos min per la malpura akvo de sia malnobleco ?

Ĉio tio okazis en Jeriĥo, sur la vojo al Jerusalemo.

Kaj, kiam ili ekiris de Jeriĥo, granda homamaso sekvis ilin.

Kaj jen du blinduloj sidantaj apud la vojo, aŭdinte, ke Jesuo preterpasas, ekkriis : Majstro, majstro, kompatu nin.

Kaj la popolo admonis, ke ili silentu; sed ili ankoraŭ

pli laŭte kriis : Majstro, majstro, kompatu nin.

Kaj Jesuo, haltinte, demandis : Kion vi deziras de mi ?

Ili diris : Sinjoro, faru, ke niaj okuloj estu malfermitaj.

Li respondis : Mi ne povas malfermi la okulojn eĉ de tiuj, kiuj de longa tempo sekvas min; kiel do mi malfermus viajn okulojn ?

Kaj, rigardante la blindulojn kaj pensante pri siaj disĉiploj kaj sia senpoveco, li ploris.

Tial, dum li malproksimiĝis, la popolo diris al la blinduloj : Li ploris pri vi. Paciencu kaj esperu. Ĉar li estas potenca en verkoj kaj vortoj, kaj morgaŭ malfermiĝos viaj okuloj.

Ĉapitro XX.

Kiam ili proksimiĝis al Jerusalemo kaj jam alvenis en Betanio, apud la monto Olivarba, Jesuo sendis du disĉiplojn,

Dirante : Iru al la vilaĝo, kiu estas kontraŭ vi, kaj la unuan azeninon aŭ azenidon, kiun vi trovos, deligu kaj konduku al mi.

Ĉar la mortonto volas eniri Jerusalemon en paca prezentado, kiel homo, kiu batalas nur per la armiloj de amo,

Tio estas per parolo kaj bonfarado.

Kaj, se iu diros ion al vi, kiam vi prenos tiun azeninon aŭ azenidon, vi respondos : Lasu nin fari, ĉar homo ĝin bezonas.

La disĉiploj do ekiris, kaj komence agis, kiel Jesuo estis ordoninta.

Sed, dum ili deligis aparte belan azeninon, kelkaj el la tie-estantoj demandis : Kial vi deligas ĉi tiun azeninon ?

Kaj ili respondis, ne kiel Jesuo ordonis al ili, sed ili diris : La Kristo ĝin bezonas.

Kaj la mastroj de la azenino kredis, ke tiuj viroj estas Zelotoj, kaj ili ektimis kaj lasis fari.

La disĉiploj do kondukis la azeninon al Jesuo kaj Jesuo ekrajdis sur ĝi.

Kaj, kiam ili proksimiĝis al la deklivo de la monto

Olivarba, tiuj, kiuj ĉirkaŭis Jesuon, kaj la multa amaso el Galileanoj, samtempe alvenantaj por la festo, komencis laŭte laŭdi Dion,

Dirante, laŭ la kutimo, la parolon el la Psalmo :
Benata estu tiu, kiu venas en la nomo de l'Sinjoro.

Sed, kiam ili eniris en la urbon, Petro kaj Simono la Zeloto demetis siajn vestojn kaj sternis ilin antaŭ la rajdobesto de Jesuo.

Kaj ankaŭ palmobranĉojn ili ĵetis sur lian pasvojon.

Tion vidante, pluraj disĉiploj faris kiel ili; kaj multaj el la Galileanoj enirantaj kun ili samon faris.

Tiam Petro kaj Simono la Zeloto ekkriis : Hosana !
Benata estu la Kristo, kiu venas por la savo al Izraelo!

Kaj la tumulto estis granda, ĉar multaj ripetis la kriojn de Petro kaj Simono la Zeloto.

Tial Jesuo diris al ili : Silentu. Ĉar mi ne venis kiel filo de Esavo kaj viro de milito;

Mi ne armis min per arko kaj glavo, kaj mi ne alvenas rajdante sur batalĉevalo.

Sed mi alvenas rajdante sur azenino, kiel filo de Jakobo kaj homo de paco kaj justo;

Por ke la milita ĉaro de Efraimo estu flanken metita, samkiel la batalĉevalo de Jerusalemo, kaj ke la arko de milito estu disrompita.

Vi do, silentu. Ĉar mi volas morti por vero kaj amo, ne pro mensogo kaj pro la gloro de ĉi tiu mondo.

Sed Simono la Zeloto respondis : Majstro, se ni silentus, la ŝtonoj krius.

Kaj li ree kriadis per sia tuta forto. Kaj pli kaj pli kriadis kiel li la homamaso.

Tiel, ke la tuta urbo malkvietiĝis. De ĉiuj direktoj oni alkuris al la pordo, tra kiu eniris Jesuo.

Kaj ĉiu demandis : Kiu estas ĉi tiu ? Ĉu Eleazaro, kiun kelkaj Galileanoj nomas Kristo, kaj kiu jam kaŭzis tiom da tumulto ?

Sed tiuj, kiuj konis lin, respondis : Li ne estas Eleazaro. Li estas Jesuo el Nazareto, alia Galilea profeto.

Jesuo ĉagreniĝis pro tiuj okazoj, kaj, por ilin ĉesigi, li forlasis la urbon kun la dek du, revenante al Betanio,

Kie li haltis en la domo de Marta, Maria kaj Lazaro

ilia frato.

Nu, tiu Lazaro estas tiu, kiu dum longa tempo sin allasis al diboĉo. Kaj iam lia fratino Maria parolis pri li nur plorante, kaj diradis : Por mi li estas mortinta.

Sed la paroloj de Jesuo lin forŝiris el diboĉado. Kaj nun Maria diris : La Majstro lin relevis el inter la mortintoj.

Kaj Marta ridante diris : Eĉ liaj paroloj kaj lia koro jam malbonodoris.

Jesuo estis kun ili de mallonga tempo, kiam iu venis anonci al li, ke unu homo deziras paroli kun li sen ies ĉeesto.

Tien irinte, Jesuo ekvidis, ke tiu homo estas Eleazaro, kiun ankaŭ pluraj nomis Kristo kaj reĝo de l'Judoj.

Kaj la hieraŭon, Eleazaro eniris en Jerusalemon rajdante sur batalĉevalo kaj sekvate de granda trupo da Galileanoj,

Kiuj sternis sur lian vojon siajn vestojn kaj palmo-branĉojn kaj kriis : Benata estu la reĝo de l'Judoj ! Benata estu la Kristo, kiu venas por la savo al Izraelo !

Nu, Eleazaro diris al Jesuo : Unuigu ni niajn ambaŭ trupojn, kaj ni ribeligos la popolon, kaj ni forpelos la Romianojn.

Kaj ci estos reĝo de l'Judoj. Ĉar, min koncerne, mi volas nenion krom la savo al Izraelo kaj la morto de la malbonuloj.

Jesuo respondis al li : Mi venis ne por mortigi, sed por morti.

Kaj, tuj lasante lin, li revenis al siaj amikoj kaj al la dek du, kaj ili komencis manĝi.

Eleazaro ekmiris, al si mem demandante : Ĉu li freneziĝis ?

Aŭ pli kredeble, ĉu li sin opinias sufiĉe forta sen mi, kaj li volas al mi nenion ŝuldi ?

Kiel grave por mi ? Mi tenos miajn Zelotojn pretaj, kaj, kiam li ribeligos la popolon, mi subtenos lin.

Ĉar mi volas nur la savon por Izraelo kaj la morton por la Romianoj kaj la perfiduloj.

Sed, ekde kiam li estos reĝo, ĉar li volas al mi ne-

nion ŝuldi, kaj fakte li ŝuldos al mi multon,

Mi kaŝos min en la profundo de l' dezerto, kaj neniu scios, kio mi fariĝis,

Por ke li ne mortigu min.

Eleazaro foriĝis en tiuj pensoj; kaj li imagadis planojn pri ribelo, planojn pri batalo kaj planojn pri fuĝo.

La morgaŭon, Jesuo, reveninte en Jerusalemo, eksidis en la Templo. Kaj lin ĉirkaŭis granda popolamaso aŭskultanta liajn parolojn;

Kaj ĉirkaŭ li estis ankaŭ pastroj, skribistoj kaj pliaĝuloj;

Kaj Eleazaro estis veninta kun pluraj el siaj trupanoj.

Nu, Jesuo malkaŝe parolis kontraŭ la pastrojn, la skribistojn kaj la fariseojn.

Kaj li parolis ankaŭ, sed en pli kaŝa maniero, kontraŭ la Templon kaj kontraŭ la Leĝon.

Tiel ke Eleazaro miris, ne komprenante, kaj diris en si mem : Kiel la popolo povas sekvi homon, kies parolo estas tiel malklara ?

Kredeble estas lia voĉo, kiu ilin ensorĉas, kaj, kion ajn li diras, ili ĉiam estas pretaj lin admiri,

Kiel juna viro admiras la stultaĵojn, kiuj eliras el el la buŝo de bela virino.

Sed Eleazaro plie diris al si : Kiel grave por mi ? Ĉar lin ili amas, estu li la savonto de Izraelo.

Nu, la pastroj, la skribistoj kaj la pliaĝuloj komprenis, ke la vortoj de Jesuo estas kontraŭ ilin, kaj ili incitiĝis.

Kaj ili metis al li falilojn per siaj paroloj. Tiel ke ankaŭ Jesuo incitiĝis kaj komencis malkaŝe paroli kontraŭ la Templon, dirante :

Ĉu iam el la Templo venis eĉ unu profeto ? Sed kiuj sin vivtenas per la Templo, ĉu tiuj ne ĉiam persekutis kaj mortigis la profetojn ?

Ĉar vi estas homoj de murdado kaj sango, kaj vi metis mensogojn en la Skribojn por fari al vi Dion de murdado kaj sango.

Kaj ĉar lia Templo estas via domo, homoj de sango kaj ventro, vi faris el lia Templo buĉejon kaj kuirejon.

Viajn festojn oni ne povus rigardi sen vomo; tial la Eternulo vomis vin.

Ĉu vi kredas, ke la Eternulo povas ami la bolantan sangan, kiun vi transigas inter vi en vazo de mano al mano ĝis la altaro de la oferoj,

Kaj kiun vi verŝas sur la altaron, kaj per kiu vi faras aspergojn sur la popolon ?

Ĉu vi kredas, ke, se la Eternulo loĝus en ĉi tiu domo, li ne fuĝus el ĝi dum ĉiu el viaj festoj,

Kiam la tuta Templo estas maro kaj ŝtormo de fumanta sango kaj la altaro insulo invadita de la sangaj ondoj?

Tial, ke vi amas la viandon de bovoj kaj ŝafoj, vi diras, ke la Eternulo amas la viandon de bovoj kaj ŝafoj.

Sed estas io, kion vi amas pli ol la viandon de bovoj kaj ŝafoj;

Kaj tiu io estas la sango de homoj.

Vi daŭre amas oferbuĉi homojn, kiel en la tempoj, kiam vi adoris sur la altaj lokoj.

Tial vi ne hontas pri via cirkumcido, kiu estas figuro pri la antikvaj homoferoj kaj la iamaj barbaraĵoj.

Kaj, kiam vi povas, kruelaj buĉistoj de bovoj kaj ŝafoj, vi refariĝas buĉistoj de homoj;

Kaj vi oferas profeton, ne plu, ĉar estas al vi malpermesate, sternante lin sub la sanktan tranĉilon aŭ ĵetante lin en la sanktan fornegojn,

Sed faligante lin sub la Leĝo kaj la ŝtonoj, aŭ fordonante lin al Romianoj kaj kruco.

Sed mi venis en Jerusalemon por esti via lasta viktimo, kaj por ke la popolo, vidante vin murdi min, fine komprenu, kiaj homoj vi estas.

Kaj ke, ekde nun, ĝi ne permesu plu, ke vi murdu iun ajn;

Kaj ke, malamante kiel la Eternulo la Templon malpurigitan per la ĉeesto de la pastroj,

Ĉiu starigu por la Eternulo templon de pureco en koro, en kiun penetros neniu pastro.

La pastroj diris al li : Ci mensogas, kaj la Eternulo mem elektis por si tiun ĉi Templon.

Jesuo respondis : Kiam la Eternulo elektas por si domon, tio estas por loĝi en ĝi ĝis ĝi estos malpurigita.

Aŭ ĉu ne estas skribite pri nia patro Jakobo, ke, renkontinte la Eternulon en urbo antaŭe nomita Luzo, li nomis ĝin la Domo de Dio ?

Sed poste la Izraelidoj tie oferis al idoloj laŭ ordono de reĝo Jeroboamo.

Tial Amoso la profeto kaj Hoŝeo la profeto ne nomas plu tiun lokon la domo de Dio, sed la domo de maljusto.

Ankaŭ la Templo de Salomono estis la domo de la Eternulo, tiel longe, dum venadis en ĝin justuloj por adori la Eternulon.

Sed pli poste eniris en ĝin murdistoj, ŝtelistoj kaj idolanoj.

Tial Jeremio diris al liatempaj homoj, kiel mi diras al miatempaj homoj :

Ne fidu la mensogajn vortojn dirantajn : Ĉi tie estas la Templo de la Eternulo, la Templo de la Eternulo, la Templo de la Eternulo.

Sed iru al mia loko, kiu estis Ŝilo, kie mi loĝigis mian nomon ekde la komenco, kaj rigardu, kion mi faris al ĝi pro la malico de mia popolo Izraela.

Tiun ĉi domon, sur kiu mia nomo estas alvokata, kaj kiun vi fidas, kaj la lokon, kiun mi donis al vi kaj al viaj pastroj, mi traktos tiel, kiel mi traktis Ŝilon.

Se do en la nova Templo estas faritaj pli multaj krimoj ol en la antikva Templo, kiel la hodiaŭaj profetoj ne dirus sur la nova Templo la malbenojn, kiujn diris Jeremio sur la antikva Templo ?

Sed la pastroj demandis al li : Laŭ kia aŭtoritato ci diras tiujn aferojn, kaj kiu estas tiu, kiu donis al ci tian aŭtoritaton ?

Jesuo unue respondis : Ĉia aŭtoritato venas de malsupre, ĉar ĉia servuteco venas de malsupre;

Sed kio de supre venas, tio nomiĝas libero.

Koncerne min, mi parolas kun libero, ne kun aŭtoritato kaj servuteco; eĉ mi parolas kontraŭ ĉian aŭtoritaton kaj kontraŭ ĉian servutecon.

Nu, la popolo ne komprenis plu la vortojn de Jesuo. Kaj pluraj murmuris :

Estas ja la aŭtoritato de la Leĝo, kiu nomiĝas libero, ĉar la Leĝo estas malamiko de la aŭtoritato de l'Romianoj.

Jesuo, vidante, ke ili ne komprenas plu liajn parolojn kaj ke pluraj murmuris, malgajiĝis.

Sed li diris al la skribistoj, kaj al la pastroj, kaj al la pliaĝuloj : Ankaŭ ion alian mi demandas al vi :

Ĉu la bapto de Johano venis de la Ĉielo, aŭ de la homoj ?

Sed ili diskutis inter si, dirante : Se ni diros : De

la ĉielo, li diros : Kial do vi ne kredis pri ĝi ?

Kaj se ni diros : De la homoj, la tuta popolo ŝtonmortigos nin, ĉar ili estas konvinkitaj, ke Johano estis profeto.

Tial ili ne respondis. Tiam Eleazaro incitiĝis kontraŭ ilin kaj diris : Respondu do, sklavoĵ de l'Romianoj kaj murdistoj de profetoj.

Sed ili eliris unu post alia nenion dirante, aŭ dirante, ke ili ne scias, de kie venis la bapto de Johano.

Kaj la popolo kriis kontraŭ ilin kaj mokis ilin, sed Jesuo kaj Eleazaro malhelpis, ke oni faru al ili ian malbonon.

Kiam ili estis for, Eleazaro diris al Jesuo : Ci bone parolis kontraŭ tiujn malbonajn Izraelidojn, kiuj sin faras kunliganoj de l'Romianoj;

Nun do, diru al ni, kion ni faru kontraŭ la Romianojn, kiuj subpremas Izraelon, por ke ci liberigu ĉian popolon kaj fariĝu reĝo de l'Judoj.

La trupanoj de Eleazaro ekkriis, ke li pravus; kaj la popolo kriis, ke li pravus; kaj la disĉiploj de Jesuo kriis, ke li pravus.

Tiel, ke estis grandaj aklamoj :

Benata estu Jesuo el Nazareto, la reĝo de l'Judoj. Sed Jesuo skuis la kapon, kiel iu diranta : Ne, kaj li faris per la manoj la geston, kiu forpuŝas.

Kiam la aklamoj estis kvietiĝintaj, Eleazaro reparolis : Ni kredas al ci kaj ni volas, ke ci fariĝu nia reĝo kaj la savo por Izraelo.

Do unue malpermesu, ke ni pagu la imposton al Cezaro.

Sed Jesuo diris al li : Kial ci volas min surprizi ? Aŭ kial ci volas, ke mi estu ci anstataŭ esti mi ?

Montru al mi la impostan moneron. Kaj Eleazaro prezentis al li denaron.

Kaj Jesuo demandis : Kies estas tiu bildo kaj tiu surskribo ?

Kaj la popolo huante kriis : De Cezaro. Tiam Jesuo diris al ili : Se vi estas sklavoĵ de mono, do vi estas sklavoĵ de Cezaro;

Ĉar, se vi rigardas kiel bonan ion, kio venas de Cezaro, kiel vi iam liberiĝos de li ?

Nenio bona povas veni de Cezaro, sed ĉio bona venas de Dio.

Kiu batalas kaj mortigas pro tiu mono, ĉu tiu ne oferas sian fraton al la bildo de Cezaro ?

Nu, nur al dioj oni oferas, kaj estas skribite : Izraelo, ci ne havos alian dion krom mi.

Vi do, lasu reiri al Cezaro tion, kio venas de Cezaro, kaj redonu nur al Dio tion, kio apartenas al Dio.

Poste, laŭ sia kutimo, li parolis kontraŭ la monon kaj kontraŭ la riĉaĵojn; kaj li parolis ankaŭ pri la beleco de koro apartenanta al Dio anstataŭ aparteni al mono kaj riĉaĵoj.

Kaj li proponis al la popolo jenan parabolon : La Regno de l'Ĉielo similas al vasta riĉa lando, for de kiu nin apartigas riverego.

Kaj la riverego estas larĝa kaj impeta kiel la maro.

Pluraj penas ĝin trairi. Sed ili naĝas ŝarĝite per peza ŝarĝo.

Tiel, ke iliaj fortoj perfidas ilin; ili estas renversataj de la fluo; kaj la akvoj kelkatempe rulas ilin vivajn, poste la akvoj forportas ilin mortajn.

Do, antaŭ ol eniri en la riveregon, liberigu vin el la ŝarĝo de la riĉaĵoj kaj senigu vin je la vesto de la deziro pri riĉaĵoj. Tiel vi tranaĝos la riveregon.

Kaj vi eniros en la Regnon, kie amo estos al vi glora vesto, kie vi trovos la verajn riĉaĵojn pendantajn de ĉiuj arboj, kie vi trinkos vinon el nesekigeblaj fontoj,

Kaj kie estas nek ŝtelistoj nek rusto nek vermoj, sed kie la ĝojo ĉion envolvas kaj penetras tute same, kiel lumo de Dio.

Dum li tion diris, Elezaro eliris kun siaj trupanoj kaj granda parto el la popolamaso, dirante : Tiu viro estas freneza, kaj kun li estos nenio por fari.

Kaj li estos al ni malforto, ne forto; ĉar, kiel longe li vivos, ni ne povos kuntreni la popolon.

Sed mi ne malesperas, ĉar lia frenezo kondukas lin al morto.

Dume Jesuo afliktiĝis, ĉar neniu lin komprenis. Liaj vortoj de amo fariĝis sur alies lipoj krioj de malamo, kaj liaj vortoj de paco, kriadoj de milito.

Eĉ tiuj el liaj disĉiploj, kiujn li pleje amis, ĉiam atendis de li la gloron de ĉi mondo kaj la ĉi-mondajn

posedaĵojn.

Longatempe Jesuo estis esperinta, ke lia Patro ŝanĝos ĉies korojn, kiel li ŝanĝis lian koron.

Poste li esperis, ke lia parolo ŝanĝos almenaŭ la korojn de la sepdek, kaj ke tiuj ŝanĝos aliajn korojn;

Tiel, ke la homoj, serĉante la Regnon de Dio kaj lian juston, ricevos plie la ceteron.

Nun li vidis sian verkon : nenion profundan li faris; ne unu koron li sukcesis vere ŝanĝi.

Kaj li nenion plu esperis krom de sia morto. Lia morto, ĉu ĝi ne estos la granda lumo, kiu lumos la okulojn, kaj la granda skuego, kiu returnos la korojn ?

Sed li malgajiĝis, dirante al si mem : Mi ne vidos la rikolton, eĉ ne la leviĝantan grenon.

Kaj, en la horoj, kiam li ne plu esperis, li konsoliĝis dirante : Kiam mi estos por ili mortinta, mi estos farinta por ili ĉion, kio dependis de mi;

Kaj, se la greno ne leviĝos, aŭ se la suno sekigos la herbon, aŭ se hajlo sternos la spikaron en subitan koton, pri tio mi neniom scios.

Kiam li estis sola, se lia spirito inklinigis lin al preĝo, li diris : Kiu do ci estas, ci, kiun mi preĝas ?

La aliaj homoj nomas cin la Eternulo; kaj mi, iam, nomis cin mia Patro.

Sed, se ci estas la sola Eternulo kaj se ci estas la sola Patro, ĉu ci ne faris la malbonon kiel la bonon ?

Ĉar, se ci kreis tiujn, kiuj malbonfaras, ĉu ne estas same, kiel se ci mem malbonfaris ?

Kaj kiel mi, verko cia, distingas inter ciaj verkoj? Mi naskiĝis miksite el bono kaj malbono;

Kiel mi povis forpeli la malbonon, kiu estis en mia koro, kaj kreskigi la bonon, kiu estis en mia koro ?

Kiu donis al mi la kapablon diferencigi, en mi kaj en aliaj homoj, la bonon disde la malbono ? La kampo, sur kiu kreskas herbo, ja ne scias, ĉu ĝi portas tritikon aŭ lolon.

De kie do venas al mi la ideo, ke ekzistas la bono kaj la malbono, kaj de kie venas al mi la amo al bono kaj la malamo al malbono ? Kaj kiu forto inklinigas mian koron al justo ? Kaj kiu forto klinigas mian koron kiel urnon de kompatato ?

Eternulo, oni raportas, ke ci diris al niaj patroj :

Ne estas alia Dio krom mi.

Kaj mi timas pro la pensoj, kiuj estas en mi. Sed iafoje ŝajnas al mi, ke ekde la homo kaj ties komenciĝanta koro, estas du Eternuloj :

Estas Tiu, kiu Estas, kaj Tiu, kiu Iĝas.

Estas nia Patro, kiu ĉion kreis, sed li estas ne-perfekta laŭ potenco aŭ laŭ boneco, ĉar ekzistas malbono en la mondo kaj en la koroj.

Kaj ĉu ne estas ankaŭ nia Filo, tiu, kiun ni kreas per niaj bonaj pensoj kaj per nia amo al justo;

Tiu, kiu ne faris Jesajon, sed kiun Jesajo komencis, kaj kiun mi daŭrigas krei aŭ revigi.

Kaj mi ne kulpigas min, ho Patro, ke mi amas la Filon super ĉion. Ĉar ankaŭ ci, eble ci amas la Filon pli ol cin mem.

Jesuo neniam diris tiujn dubojn al siaj disĉiploj, memorante la vorton de l'profeto : Ili estas infanetoj apenaŭ demamigitaj.

Kaj ĉiam li parolis al ili pri la Patro, tial ke nur lakton ili povis trinki. Ĉar ilia malforteco ne tolerus la viandojn, kaj li nenion diris al ili pri tiu, kiun liaj plej sekretaj pensoj nomis la Filo.

Sed, tiun tagon, kiam li estis sola kun siaj disĉiploj, lia nova penso estis kvazaŭ nova vino fermentanta kaj rompanta la ujojn,

Tiel, ke li proponis al ili jenan parabolon : Kiu staras ĉe la pordo de la Regno, tiu similas al viro, kiu honoris sian patron, sed kiu amis sian filon super ĉion.

Kaj kelkaj demandis al li : De kio venas, ke ci amas cian filon pli ol cian patron ? Li respondis : Mi scias, kiu estas mia patro;

Kaj mia patro estas bela kiel arbo plene kreskinta kaj ne plu ŝanĝigonta.

Sed mia filo estas bela kiel kreskanta arbo kaj kiel promeso ekrealiĝanta.

Kaj tiu viro plie diris : Mia filo estas mi, pli ol mi mem estas mi.

Kaj ili diris : Kiel ci ne estus ci mem ?

Kaj li respondis : Kiel mi estus mi mem ? Mi estas ja la ruinaĵoj de mi mem.

Ha! se vi scius, kiel fenditaj estas miaj muroj, kaj kiel grandaj murpecoj de mia volo estas sur min falintaj!

Mi estas templo, kiun detruis la jaroj kaj la mal-amikoj; kaj kiam mi rigardas min, mi vidas amason da ruboj.

Sed mia filo estas templo ankoraŭ ne finkonstruita, kiun la tempo starigos ĉiam pli bela, ĉiam pli granda, ĉiam pli fortika.

Kaj la disĉiploj petis, ke li klarigu al ili tiun similaĵon. Sed li timis ilin dolorigi, kaj li rifuzis.

Kaj, por diri sian rifuzon, li proponis al ili alian parabolon : Kiu staras ĉe la pordo de la Regno, tiu similas al unu patro, kiu estis baldaŭ mortonta.

Lia ununura filo estis diboĉulo. Kaj la patro diris al si mem : Se mi donos al li la monon, kiun mi hieraŭ ricevis,

Li ĝin elspezos kun malĉastaj virinoj, kaj ili elkonsumos lian korpon, kaj li mortos.

Kion do mi faros el tiu mono, ĉar mi ne volas senheredigi mian filon ?

Kaj li kaŝis la monon malantaŭ la rulolibroj de la Leĝo kaj la rulolibroj de l'Profetoj.

Ĉar lia filo rigardadis tiujn librojn kun respekto, sed ne malfermis ilin.

Kaj la maljunulo mortis, tiel ĝojante en sia koro : Kiam li estos naŭzita de la malĉastaj virinoj, li iros malfermi la librojn, kaj li eltrovos la trezoron, kaj la trezoro utilis al li.

Petro diris : Eble la filo neniam iros malfermi la librojn.

Kaj Jesuo respondis : Tiaokaze, almenaŭ, la trezoro kaŭzos al li nenian malbonon.

Sed Judaso Iskariota, kiu estis avara kaj estis pro mono perfidonta Jesuon, diris : Jam la morgaŭon de la morto de l'patro, la filo vendos la librojn kaj eltrovos la trezoron.

Kaj la antaŭzorgo de l'patro estos por nenio servinta.

Tiam Jesuo memoris, kiel, en lia infanaĝo, la unuan fojon, kiam li iris al Jerusalemo, li renkontis Judason, kaj kiel Judaso batis lin.

Tial li malgaje lin rigardis, kaj diris al li : Ho Judaso Iskariota, unu fojon jam, ci frapis min ĉe la koron.

Ĉapitro XXI.

La ĉefpastroj, la skribistoj kaj la pliaĝaj el la popolo kunvenis en la ĉambrego de la pastrestro nomata Kajafo.

Kaj ili diskutis pri la rimedoj por lerte kapti Jesuon kaj mortigi lin.

Sed ili diris : Necesas, ke tio okazu ne dum la festo, pro timo, ke okazus kelka tumulto inter la popolo.

Tiam unu el la dek du, Judaso, el la vilaĝo Iskarioto, venis al la ĉefpastroj, skribistoj kaj pliaĝuloj,

Kaj diris al ili : Kiom vi volas doni al mi, kaj mi lin al vi fordonos. Kaj ili interkonsentis, ke ili donos al li tridek argentajn monerojn.

Nu, Nikodemo kaj Gamalielo ĉeestis en tiu kunsido, kiel ankaŭ pliaĝulo nomata Jozefo, el la vilaĝo Arimateo. Kaj ili klopodis per siaj paroloj por malhelpi la Leĝon plenumi novan krimon.

Sed ĉiuj kun fortego leviĝis kontraŭ ilin, tiel ke ili afliktiĝis en sia koro.

Do Gamalielo kaj Jozefo el Arimateo komisiis Nikodemon, ke li haste iru al Betanio por averti Jesuon.

Kaj, renkontinte sur la vojo Natanaelon, Nikodemo, marŝante kun li, rakontis al li ĉiujn tiujn okazojn.

Poste li lasis Natanaelon, kaj, aparte prenante Jesuon, li diris al li : Rapide foriru kaj savu cin en Galileon. Ĉar la pastroj volas kapti cin kaj juĝi cin laŭ la juĝo de l'zelo.

Kaj inter la cial estas perfidulo, Judaso el la vilaĝo Iskarioto, kiu promesis fordoni cin.

Sed Jesuo respondis : Nikodemo, necesas, ke mi mortu pro amo al ci, kaj por ke mi eklumigu en cia koro la amon al ĉiuj homoj.

Kaj li marŝis kun li sur la kamparo, parolante pri la Regno kaj dirante al li : Mia morto estos por pluraj la ŝlosilo, kiu malŝlosas la pordon de l'Regno.

Natanaelo sekvis ilin je kelka distanco. Kaj ili tri iris preter la torento Kidrono. Kaj la akvoj estis alte ondaj kaj gruntantaj kiel kolero de Fariseoj.

Subite Natanaelo ekvidis homon en la torento; kaj tiu homo malespere luktis kontraŭ la akvojn kaj ilian furiozon.

Kaj Natanaelo sin ekĵetis en la torenton por savi sian fraton el la danĝero. Sed, kiam li estis apud li, li ekkonis, ke tiu viro estas Judaso Iskariota.

Tial li sin deturnis de la perfidulo kaj revenis sola al la bordo.

Sed li ekaŭdis la voĉon de Jesuo. Kaj, levinte la okulojn, li vidis Jesuon kaj Nikodemon starantajn sur roko kaj lin rigardantajn.

Nu, la rigardo de Jesuo estis incitiĝa; kaj lia mano leviĝis kvazaŭ por malbeno.

Kaj lia buŝo diris, pli laŭte ol la bruo de l'torento : Ne mortigu.

Natanaelo respondis : Majstro, mi ne estas mortiganto.

Sed la kolero de Jesuo altiĝis kiel fajro, kaj li kriis : Se ci lasas cian fraton morti, kiam ci povus lin savi, ci estas kulpa pri lia morto; kaj ci respondis malkuraĝe, kiel pastro.

Natanaelo plie respondis : Majstro, tiu viro estas Judaso Iskariota, kiu ĵus perfidis cin. Sed Jesuo diris al li : Ne juĝu, kaj ci ne estos juĝata.

Kaj la inteligento kaj la volo de Jesuo fariĝis la inteligento kaj la volo de Natanaelo. Kaj, revenante al la dronanta viro, Natanaelo savis Judason Iskariotan.

La unuan tagon de macoj, kiam oni oferbuĉis la Paskon, liaj disĉiploj diris al Jesuo : Kie ci volas, ke ni iru pretigi por ci la necesajon por manĝi la Paskon?

Tiam li sendis du el siaj disĉiploj kaj diris al ili: Iru al la urbo, en la domon de Nikodemo, kaj diru al li: La Majstro demandas : Kie estas la loko, en kiu mi manĝos la Paskon kun la Dek du ?

Kaj li montris al vi grandan ĉambron altan, meblitan kaj tute pretan. Tie vi pretigos por ni la Paskon.

Kiam vesperiĝis, li venis kun la Dek du.

Kiam ili sidis ĉe la tablo kaj manĝis, Jesuo diris : Vere mi diras al vi, ke unu el vi, manĝanta kun mi, perfidos min.

Kaj ili ekafliktiĝis, kaj demandis unu post alia : Ĉu eble mi ?

Sed li diris duonlaŭte, por esti aŭdata nur de Judaso : Kiu metas kun mi la manon en la pladon, ĉu ne tiu min perfidos ?

Kaj li diris laŭte, por esti de ĉiuj aŭdata : Koncerne min, mi volas foriri; kaj ne pro perfido, sed ja pro mia amo mi mortos. Sed ve trifoje al tiu, kiu perfidas iun ajn homon : plibone estus por li, esti neniam naskita.

Dum ili manĝis, Jesuo prenis panon, kaj, laŭ sia kutimo, benis kaj disrompis ĝin. Kaj li disdonis ĝin al ili, dirante :

Tial, ke ĝi estas disrompita en miaj manoj kaj pistota inter viaj dentoj, tiu pano iĝos por vi forto kaj nutro.

Same, kiam mia korpo estos rompita sur kruco aŭ pistita sub ŝtonoj, ĉu ĝi ne iĝos por viaj koroj forto kaj nutro ?

Prenu do ĉi tiun panon, tre amataj miaj, kaj ĝin manĝu pensante pri mia korpo, kiun mi donas al vi.

Preninte ankaŭ la kalikon kaj, eldirinte dankon, li ĝin donis al ili, kaj ili ĉiuj trinkis el ĝi.

Kaj li diris al ili : Kiel longe ĉi tiu vino restis en la traŭboj, ĝi ne donis al vi sian forton kaj sian varmon.

Sed, post kiam la traŭboj estis premitaj, la vino estis verŝita en la barelojn, poste en la kalikon, kiu staras sur tiu ĉi tablo, fine en la kalikon de via buŝo; kaj tiam ĝi donis al vi forton kaj varmon.

La sango, kiu estas enfermita en mia korpo, kiam mia korpo estos premegita per mia amo, tiam tiu sango elverŝiĝos por vi; kaj tiam, ĉu ĝi ne penetros ĝis en viaj koroj, portante en ilin forton kaj amon ?

Prenu do tiun vinon, tre amataj miaj, kaj trinku ĝin pensante pri mia sango kaj pri mia amo.

Kantinte kantikon, ili foriris al la monto Olivarba.

Kaj Jesuo diris al ili : Homoj kun tro granda kredo kaj tro malgranda inteligento, kvankam plurfoje mi avertis vin, ĉiam vi atendas de mi tion, kion mi ne povas doni al vi.

Kaj ĉi-nokte mi estos al vi okazo por falo, ĉar vi ĉiam kredas, ke mi devas esti venkanta, kiel la homoj estas venkantaj.

Sed Petro diris : Ne kiel la aliaj homoj. Sed cia Patro sendos pli ol dek du legiojn da anĝeloj, kiuj batalos por ci, kaj ni ĉeestos cian gloron kaj la honton de

ciaj malamikoj.

Jesuo respondis : Mia Patro ne havas anĝelojn por sendi al mi. Kaj vi kredos ĉeesti mian honton kaj la gloron de miaj malamikoj.

Tiam vi estos similaj al ŝafoj, kiuj diskuras, kiam la paŝtisto estas frapita.

Sed, post kiam mi estos malsuprenmetita en tombon, revenu en Galileon. Tie vi retrovos miajn vortojn, kaj ilian sencon, kaj ilian flamon. Tie vi retrovos min kaj mian spiriton.

Kaj Petro diris : Se eĉ ĉiuj diskuras, mi cin ne forlasos.

Sed Jesuo malgaje lin rigardis kaj demandis : Kiofoje ci malkonfesos min, en tiu ĉi nokto, antaŭ ol krios koko ?

Poste ili iris al loko sur la monto Olivarba, nomata Getsemano. Kaj Jesuo diris al siaj disĉiploj : Sidiĝu tie ĉi dum mi iros preĝi.

Kaj li prenis kun si Petron, Jakobon kaj Johanon; kaj lin ekkaptis dubo kaj agito,

Kaj li diris al ili : Mia animo estas ĝismorte malĝoja; restu ĉi tie kaj viglu.

Kaj irante iom pli antaŭen, li rigardis la ĉielon en la direkto al okcidento.

Kaj li diris : Patro, ci suferas en ĉiuj tiaj kreaĵoj, tial ke ci estas senpova por fari ilin bonaj kaj sensuferaj.

Kaj jen. Mi oferos mian korpon kaj mian sangon, por ke ci formu el ili la Filon, kiu estas komencita en la vortoj de Jesajo.

Sed ci lasas pere tiom da ĝermoj kaj tiom da infanoj! Ĉu ci scipovas ion fari el tio, kion mi donos al ci ?

Patro, mi ekbruligas mian koron kaj mi ĵetas tiun bruligilon inter la homojn por ekflamigi ilin per amo.

Sed la homoj estas tute surfluataj de malamo, de deziro pri riĉaĵoj kaj de respekto al la Leĝo. Ĉu la bruligilo ekflamigos eĉ ununuran el tiuj malsekaj pajlostakoj ?

Patro, mi volas morti, por ke ili vivu. Sed ĉu iam ili scios, kio estas vivo ?

Patro, mi estas grenrikoltisto, kiu falas laca kaj mortanta, la grenon falĉinte. Kaj li ne scias, ĉu venos tiuj, kiuj devas ligi la grengarbojn.

Kaj eble la greno putros forlasite sub la pluvoj kaj la suno, dum la infanoj ploros : Mi malsatas.

Patro, se ci povas, forigu de mi tiun kalikon da du-bo kaj timo.

Poste li sin turnis al Oriento kaj diris : Filo, por kiu mi estas en akusdoloro, mi ne volas plu pensi pri la Patro, sed pri ci sola.

Al ci mi min turnas, kaj nur cin mi rigardas. Kaj cin mi ne vidas; Oriente kiel Okcidente mi nenion vidas krom la nokto.

Tamen mi scias, al kiu direkto endas rigardi. Kaj mi scias, ke la nokto estas la vojo kondukanta al la tago.

Tiam revenante al siaj disĉiploj, li trovis ilin dorm-antaj. Kaj pli ol iam ajn li malĝojis en sia koro. Kaj li diris : Jen estas tamen tiuj, kiuj devos ligi la gre-non.

Samtempe li ekvidis la lumon de lanternoj kaj torĉoj proksimiĝantaj; kaj li ekaŭdis la bruon de granda trupo.

Do li diris al siaj disĉiploj : Leviĝu, la horo prok-simiĝas.

Kaj li marŝis fronte al la venantoj, kaj diris al ili: Kiun vi serĉas ? Ili respondis : Jesuon el Nazareto. Kaj li diris : Estas mi.

Tamen ili ne kaptis lin, ne sciante, ĉu li diras ve-ron. Sed ili turnis la okulojn al Judaso.

Ĉar Judaso estis doninta al ili jenan signon : Kiun mi kisos, tiu estas li, kaptu lin.

Li do iris al Jesuo, dirante : Majstro, majstro, kaj li kisis lin.

Tuj la soldatoj, la tribunuso ilin komandanta kaj la servistoj de la pastroj kaptis kaj katenis lin.

Tiam Simon-Petro eltiris sian glavon kaj frapis serv-iston de la ĉefpastro nomatan Malĥo.

Sed Jesuo diris al li : Remetu cian glavon en la in-gon; ĉar kiu frapas per glavo, tiu pereos per glavo,

Kaj ne per tiaj armiloj triumfos la amo.

Petro lin obeis. Sed li estis skandalita. Kaj li diris al si mem :

Per kiaj armiloj do triumfos ni, ĉar lia Patro ne sen-das anĝelajn leglojn por defendi lin, kaj li ne volas esti defendata de la homoj ?

Tiam, vidante, ke oni lin fortrenas, kaj ke li nek per armiloj nek per mirakloj kaj sorĉoj sin defendas, la dis-

ĉiploj ektimis, kaj ĉiuj lin forlasis kaj fuĝis.

Tamen tie estis junulo, kiu sekvis lin, kovrite nur per tuko. La soldatoj volis aresti lin, sed li lasis la tukon inter iliaj manoj kaj li eskapis nuda el inter ili.

Ili kondukis Jesuon ĉe la pastroprincon, kie kunvenis la pastroj, la pliaĝaj el la popolo kaj la skribistoj.

Petro en malproksimo sekvis ilin ĝis interne de la korto de la pastroprinco; kaj, sidante apud la fajro kun la servistoj, li sin varmigis.

Nu, la ĉefpastro kaj la tuta sinedrio serĉis ateston kontraŭ Jesuon, por lin mortigi; kaj ili trovis nenion ateston sufiĉan.

Ĉar pluraj atestis kontraŭ lin, sed iliaj atestoj ne estis akordaj.

Sed kelkaj leviĝis kaj atestis, dirante :

Ni aŭdis lin diri : Mi detruos ĉi tiun templon konstruitan per la manoj de la homoj, kaj mi konstruos alian, kiu ne estos konstruita per la manoj de la homoj.

Tiam la pastroprinco, ekstarante en la mezo de la juĝantaro, demandis Jesuon : Ci nenion respondas al tio, kion tiuj homoj asertas kontraŭ cin ?

Kaj Jesuo diris : Neutile estas respondi al pastroj, kaj neutile respondi al la memfiduloj, kiuj aŭdacas juĝi.

La pastroprinco ankoraŭ lin demandis kaj diris : Ĉu ci estas la Kristo, la filo de Dio ?

Jesuo respondis : Ci demandas du aferojn, dum ci kredas demandi unu nuran. La Kristo ne estas mi, nek ankaŭ ci. Sed mi estas filo de Dio, kaj ci estas filo de la mallumo.

Kaj mi estas ankaŭ, sed laŭ maniero, kiun ne komprenos la maliculoj, patro de Dio.

Tiam la pastroprinco disŝiris siajn vestojn kaj diris : Kiel ankoraŭ ni bezonus atestantojn ?

Vi ja aŭdis la blasfemon kaj la frenezaĵon. Kion vi opinias ?

Kaj ili kondamnis Jesuon al morto.

Dum Petro estis en la korto, iu servistino, vidante lin sidantan apud la fajro, kaj atente rigardante lin,

diris : Ankaŭ ĉi tiu estis kun Jesuo el Nazareto.

Sed li neis, dirante : Virino, mi ne konas tiun viron. Kaj li pasis en la vestiblon.

Kaj tie, denove lin vidinte, tiu servistino diris al la ĉeestantoj : Tiu viro estas el tiuj homoj. Sed Petro diris : Virino, mi ne estas el ili.

Kaj, iom poste, la tie-estantoj diris : Certe ci estas el tiuj homoj, ĉar ci estas Galileano, kaj tion sufiĉe pruvas cia parolmaniero.

Sed Petro komencis malbeni kaj sakri. Kaj li ĵuris : Mi ne konas tiun, pri kiu vi parolas.

Kaj en la sama momento, dum li ankoraŭ parolis, koko ekkriis. Kaj Petro rememoris la vortojn de Jesuo, kaj kiel li diris al li :

Jam ĉi tiun nokton, antaŭ ol krios koko, kiomfoje ci estos min malkonfesinta ?

Tiam Petro, elirinte, amare ploris.

Ĉapitro XXII.

Tuj kiam ektagiĝis, la ĉefpastroj kun la pliaĝuloj, la skribistoj kaj la tuta sinedrio, interkonsiliginte, forkondukis Jesuon katenitan kaj lin transdonis al Ponceo-Pilato, gubernatoro.

Kaj ili komencis akuzi lin, asertante : Ni trovis tiun ĉi viron, kiu delogis la nacion, malpermesis pagi la imposton al Cezaro, kaj sin diris la Kristo, tio estas la reĝo de l'Judoj.

Tiam Pilato lin demandis : Ĉu ci estas la reĝo de l'Judoj ? Kaj Jesuo respondis : Mi neniam mortigis iun, kaj neniam marŝis sur la tordaj vojoj de maljusto. Kiel ci aŭdacas demandi min, ĉu mi estas reĝo aŭ gubernatoro?

Pilato estis simila al homo ne aŭdanta. Kaj li diris al la pastroj kaj al la popolo : Mi trovas nenian krimon en ĉi tiu viro. Tial, punbatiginte lin, mi lin ellasos.

Li plie diris : Vi scias, ke ĉiujare, je la Paskofesto, mi liberigas al vi unu malliberulon. Kiun vi volas, ke mi liberigu, ĉu Jesuon el Nazareto aŭ Barabason ?

Tiu Barabaso estis rimarkinda malliberulo, Zeloto arestita pro murdo en ribelo.

Tuj kiam Pilato estis demandinta, kiun ili volis li-

berigi, ĉu Barabason aŭ Jesuon, Natanaelo, kiu estis en la homamaso, komencis krii : Liberigu al ni Jesuon Nazaretan.

Kaj li kriis per sia tuta forto, esperante, ke la plej proksimaj krios kiel li, poste aliaj pli malproksimaj, poste ĉiuj malriĉuloj kaj malgranduloj, kiuj akklamis Jesuon ĉe lia eniro en Jerusalemon, aŭ amis liajn parolojn en la Templo.

Kaj li kalkulis ankaŭ je tiuj homoj, kiuj ĉiam krias, kion aliaj antaŭe kriis.

Sed Jesuo severe rigardis Natanaelon, kaj diris al li : Kiu donis al ci la rajton elekti inter tiaj fraĵoj, kaj kion kulpis kontraŭ ci tiu Barabaso, ke ci kondamnu lin al morto ?

Li plie diris al li : Memoru la parolon : Ne juĝu, kaj ci ne estos juĝata. Kaj Natanaelo, klinante la kapon, ekploris.

Tiam Eleazaro, per sia voĉo forta kiel tondro, ekkriis : Liberigu al ni Barabason.

Kaj la Zelotoj kaj la Galileanoj, kiuj estis kun Eleazaro, kaj la pastroj, la skribistoj kaj la pliaĝuloj, kriis : Liberigu al ni Barabason.

Kaj la popolo, kiu ĉiam krias tion, kion oni kriis antaŭ ĝi, ripetis, kvazaŭ eĥo plilalutiganta la voĉojn: Liberigu al ni Barabason.

La gubernatoro demandis : Kian malbonon faris tiu Jesuo el Nazareto ?

Sed Eleazaro, kaj liaj Galileanoj, kaj la Zelotoj kaj ĉiuj Templanoj kriis : Li estu krucumita !

Kaj la popolo, kiu scipovas nur ripeti la stultaĵojn kaj la kruelaĵojn de tiuj, kiuj subtenadas la Leĝon, kaj ankaŭ la stultaĵojn kaj kruelaĵojn de tiuj, kiuj anoncas baldaŭajn ŝanĝojn kaj venĝotagon, ripetis : Li estu krucumita !

Tiam Pilato, dezirante kontentigi la popolon, ellasis Barabason. Sed li ankoraŭ provis klopodon por savi Jesuon.

Li fordonis lin al soldatoj, ke ili skurĝu lin. Kaj li ordonis, ke ili vestu lin per purpura mantelo, metu en lian manon sceptron el kano, kaj metu sur lian kapon kronon el interplektitaj dornoj.

Post kiam li tion faris, Pilato denove eliris kaj diris al la popolo : Mi skurĝigis tiun viron. Sed vi

bone sciu, ke mi trovas en li nenian kaŭzon por kondamno.

Samtempe Jesuo estis alkondukata portante la dornokronon, la kanosceptron kaj la skarlatan mantelon. Kaj lia vizaĝo estis kovrita per lia sango kaj la kraĉaĵoj de la soldatoj.

Kaj Pilato montris lin al la popolo, dirante : Jen la homo! Kaj tiuj vortoj estis granda lumo ne vidata de ĉiuj, escepte de Jesuo.

Ĉar, se blinduloj marŝas nokte sur vojo, iafoje la bastono de iu blindulo frapas ŝtonon kaj elŝprucigas fajrerojn.

Sed tiuj fajreroj lumigas nenion : ili naskiĝas kaj mortas antaŭ okuloj, kiujn nenio malfermos.

Kaj Jesuo diris : Ja ci diris. Jen la homo tia, kia lin faras gubernatoroj kaj reĝoj, kiam ili volas protekti lin.

Sed neniu aŭdis tiujn vortojn. Ĉar la popolo jam kriis : Li estu krucumita !

Nu, dum la popolo tiel kriadis, Prokula, edzino de Pilato, sendis al li serviston, kiu mallaŭte parolis al li.

Ĉar Prokula, edzino de Pilato, estis pia kaj Dion timanta. Kaj, pli ol unu fojon, vualite kaj kovrite per malriĉaj vestoj, ŝi estis irinta en la homamason, kiu aŭskultis Jesuon.

Kaj en ŝian koron estis penetrintaj pluraj el la vortoj de Jesuo, kaj ŝi amis Jesuon.

Pilato do diris al la popolo : Prokula, mia edzino, sendis diri al mi : Tiu homo estas justa, kaj mi ricevis sonĝon, kiu tre turmentis min pri li.

Sed la ĉefpastroj ekkriis : Sorĉisto li estas : jen li sendas sonĝojn al virinoj. Li estu krucumita !

Kaj, ĉar Pilato ankoraŭ ne sciis, kion li decidis, ili diris al li : Se ci liberigos lin, ci ne estas amiko de Cezaro;

Ĉar li pretendas reĝecon, malpermesas la impostopagon kaj estas, ĉiurilate, malamiko de Cezaro.

Kaj ili plie diris : Ni sendos al Cezaro leterojn koncerne tiun aferon.

Tiam Pilato ektimis pri tio, kion ili skribus al Cezaro, kaj li fordonis al ili Jesuon, ke li estu krucumita.

Ili kondukis lin al loko nomata Golgoto, tio estas la Loko de Kranio.

Kaj, laŭ la kutimo, ili prezentis al li vinon kun enmiksita mirho, kiu, ebriligante la kondamnitajn, igis ilin stuporaj kaj kvazaŭ nesentemaj pri doloro.

Sed Jesuo deziris koni la guston de sia morto, kaj volis resti ĝis la fino homo pensanta kaj amanta.

Tial li repuŝis la vinon kun enmiksita mirho, kiu igus lin morti en peza ebrio kaj stuporo.

Kaj li diris : Ĉu ne estas mia penso la plej forta el ĉiuj vinoj ? Kaj ĉu mia amo ne iĝis pli amara ol mirho ?

Ili do krucumis ilin, kaj du rabistojn kun li.

Kaj la soldatoj diris insultojn al li, kaj la preterpasantoj insultis lin, kaj ankaŭ la du rabistoj krucumitaj dekstre kaj maldekstre de li, insultis lin.

Kaj Jesuo diris : Sur ilin malsuprenvenu la pardono, ĉar ili ne scias, kion ili faras.

Pluraj aŭdis tiujn vortojn. Sed Jesuo vidis, ke apud li estas neniu el liaj disĉiploj kaj neniu el la virinoj, kiuj amis lin.

Kaj li estis malgaja kiel en la Olivarba ĝardeno; kaj li pensis, ke lia morto estos neutila al ĉiuj homoj.

Nu, baldaŭ li rekuraĝiĝis. Kaj denove li parolis, sed, ekde tiam, nenio povis kapti iun el liaj vortoj.

Ĉar kio eliĝis el inter liaj lipoj, tio estis simila al voĉo el fore aŭ al susuro de fonto inter kanoj.

Kaj li diris : Ho Patro, ĉu ci pardonas al ili aŭ ne, kaj ĉu ci ekzistas aŭ ne, mi pardonas al ili.

Mia koro estas elverŝanta vazo, kaj mia kompatato fluas sur iliajn kapojn, sed ili ne sentas ĝian refreŝigon, kaj ĝia mildeco ne penetras ilin.

Kaj neniam, mi timas, neniam ili scios, kion ili faras.

Ho kompatindaj estaĵoj ! Ĉu ilia koro ne estas simila al graveda besto ? Kaj kion ĝi enportas, se ĝi elvenus al lumo, tio estus la komenco de homo.

Sed la infano ne povas eliri, kaj tie estas neniu kurocisto scianta, kio endas, kaj portanta en siaj manoj la necesajn instrumentojn.

Kaj ankaŭ mi ne scipovis akuŝigi ilian koron.

Tial ilia vivo restas dolora kiel ino akuŝanta, al kiu ne prosperas liberigi sin je sia ŝarĝo.

Kaj ilia vivo estas morto; kaj mia morto estas vivo.

En tiu momento Jesuo fermis la okulojn, kaj li ne vidis plu, kio okazas en la ĉielo aŭ sur la tero.

Kaj pluraj, plenaj de miro, demandis : Ĉu li estus jam mortinta ? Se oni ne rompas iliajn krurojn, al krucumitoj necesas tri tagoj kaj eĉ pli por morti.

Sed eble la Eternulo, kiun li nomis sia Patro, helpis lin kaj forprenis lian animon en la ĉielon.

Aŭ pli kredeble, li estis potenca sorĉisto; kaj li volis morti, sed li volis mallonge suferi; kaj li faris la miraklon morti dudek- aŭ tridekoble pli rapide, ol oni mortas de la kruca torturo.

Sed miraklon faris nek Jesuo nek lia Patro. Tiel, ke Jesuo daŭre vivis. Kaj rigardante en si mem, li parolis al si sen movi la lipojn.

Kaj li sin mem instruis en granda ĝojo, dirante :

Sur la ebenaĵo, kie mi parolis al la popolo, mi vidis nenium veraĵon; kaj sur la monto, kie mi parolis al la disĉiploj, mi ankoraŭ ne vidis la plej altajn veraĵojn.

Sed necesis, ke mi estu pendanta kiel frukto inter la ĉielo kaj la tero, por ke fine mi ekkonu la feliĉojn, kiuj miksiĝas kun nenia zorgo kaj nenia bedaŭro.

Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, tiuj, kiuj deziras nek la riĉaĵojn de ĉi tiu mondo nek la riĉaĵojn de ĉielo ekster ili mem; ĉar tiuj solaj ne forvendas sian animon, kaj al ili apartenas la interna regno.

Feliĉaj tiuj, kiuj estas en aflikto rigardante la malriĉecon kaj la servutecon de sia animo; ĉar tiuj havos ĉiujn riĉaĵojn kaj tutan liberon; kaj ilia aflikto, ĉu ne estas komenco de konsolo ?

Sed malfeliĉaj egale tiuj, kiuj afliktiĝas aŭ ĝojas pro nunaj posedaĵoj aŭ pro estontaj esperaĵoj. Ĉar ĉiuj, kiuj eksteren rigardas, estos disrevigitaj.

Kaj eĉ, kiel utilus al ili gajni la nunon aŭ la estonton, la teron aŭ la ĉielon, ĉar ili perdis sian animon ?

Feliĉaj estas la humile bonaj; ĉar la tero persekutos ilin kaj la ĉielo forlasos ilin. Kaj tiam ili heredos de si mem.

Feliĉaj tiuj, kiuj malsatas kaj soifas esti justaj; ĉar ilia malsato estas satiga, kaj ilia soifo mem refreŝigas ilin.

Sed malfeliĉaj egale tiuj, kiuj malsatas kaj soifas la justecon de l'ceteraj homoj aŭ la justecon de Dio, ĉar ili ricevos ŝtonojn anstataŭ pano kaj vinagron anstataŭ vino. Kaj ili vivados en malsato, soifo kaj mal-espero.

Kaj pluraj el ili eltiros la glavon por konkeri la eksteran juston. Sed ili mem iĝos maljustaj; kaj ilia korpo aŭ ilia animo pereos per alies glavo aŭ per propra glavo. Kaj ili mortos blasfemante.

Feliĉaj estas la kompatemaj; ĉar kompaton ili ricevos nek sur la tero nek en la ĉielo. Sed ili estas tiuj, kiuj kompaton ne bezonas; kaj, samkiel la fonto situas pli alte ol la rivero, ili situas super la kompaton.

Feliĉaj la kore puraj; ĉar ili ne bezonas rigardi ĉirkaŭ si aŭ levi la okulojn al la ĉielo, sed ili ne timas rigardi en si mem.

Feliĉaj estas tiuj, kiuj havigas pacon al si mem, ĉar ili estos nomataj idoj de si mem.

Sed malfeliĉaj, kiuj volas havigi pacon al la homoj. Ĉar ĉiuj homoj estos iliaj malamikoj, kaj ili fariĝos kaptitoj de siaj malamikoj. Kaj ili afliktiĝos tial, ke iliaj amaj vortoj servos kiel kunligaj krioj por malamoj, kaj iliaj pacpredikoj iĝos la militojn pli teruraj.

Feliĉaj, kiuj estas persekutataj pro sia justeco; ĉar la tero sin levas kontraŭ ilin kaj la ĉielo kuniĝas kun la tero. Sed ili rigardas en si mem, kaj ili konas la solan regnon, en kiu povas regi justo.

Feliĉaj tiuj, kiuj estas malriĉaj, ne turmentante sin pri riĉaĵoj proksimaj aŭ foraj, personaj aŭ komunaj; kiuj ne deziras eksteran konsolon; kiuj estas humilaj, bonaj, justaj, kompatemaj, puraj kaj pacemaj. Ĉar la mondo persekutos ilin, kaj Dio forlasos ilin.

Sed ili timos nek Dion nek la homojn, kaj ili enfermiĝos en si mem kiel en neprenebla fortikaĵo.

Kaj ili vivos kaj mortos en la regno de l'riĉaĵoj, kiujn ne putrigas la vermoj kaj ne forprenas la rabistoj; en la regno de la vera lumo, de la vera ĝojo, de la sola boneco, de la sola justeco kaj de la unika paco.

Kaj ili pardonos al la tero kaj al la ĉielo, kiuj ne scias, kion ili faras.

Kiam venis la naŭa horo, Jesuo sentis kolapson, kaj li kredis, ke li por ĉiam endormiĝas, kaj lia kapo falis

sur lian ŝultron.

Kaj la centestro komandanta la soldatojn estis mirigita de la nova beleco, kiu kovris la vizaĝon de la krucumito. Kaj li diris al la ĉeestantoj : Jen la unuan fojon estis feliĉo sur ĉi tiu loko.

Sed la centestro mem ekmiris pri sia parolo, kvazaŭ li aŭdus fremdan parolon. Kaj li ĝin ne komprenis. Ĉar li estis simila al ebria homo, kiu diras veron kaj ne scias, kion li diras.

Ĉar estis jam malfrue, kaj estis la Prepara tago, tio estas la antaŭtago de l'sabato,

Jozefo el Arimateo, tre honorata pliaĝulo kaj sekreta amiko de Jesuo, aplombe venis al Pilato kaj petis de li la korpon.

Pilato ekmiris, ke li estas jam mortinta; kaj, vokiginte la centestron, li demandis al ĉi tiu, ĉu li estas morta.

La centestro respondis : Li estis viro malfortika kiel infano; preskaŭ morta li jam estis je la sesa horo, kiam ni lin krucumis, kaj li mortis ĉirkaŭ la naŭa.

Do Pilato donis la korpon al Jozefo. Kaj, kiam li estis sola, li diris : Se tiu justulo estas ankoraŭ viva, mi ĝojas. Ĉar mi savis lin sen riski ian danĝeron.

Jozefo, aĉetinte tolaĵon, haste venis kun Nikodemo. Ili deprenis Jesuon de la kruco, lin envolvis en la tuko kaj lin portis proksime en novan tombon freŝe elhakitan en roko.

Kaj Maria Magdalena, kaj Johana, edzino de Ĥuzo, kaj Maria, patrino de Joso, vidis, kien ili lin portis, kaj ili foriris.

Kiam Jozefo el Arimateo kaj Nikodemo estis solaj en la tombo kun la korpo de Jesuo, Jozefo diris : Mi ne povis kunporti aromaĵojn. Sed ni revenos enbalzami lin la morgaŭon de l'sabato, ekde frumateno.

Kaj Nikodemo diris : Ankaŭ mi ne portis aromaĵojn. Sed mi alportis medikamentojn kaj fortigaĵojn. Ĉar necesas tri tagoj kaj pli por morti sur la kruco, kaj li tie restis nur malmulte da horoj.

Kaj Jozefo Arimatea ektemis. Kaj li diris : Silentu, Nikodemo. Ne donu al mi falsajn esperojn.

Kaj, proksimiĝante al la korpo, li diris : Mi timas esperi.

Sed Nikodemo diris al li : Rigardu. Lia brusto ĵus

ekleviĝis. Rigardu. Liaj palpebroj ekstremitis, kvazaŭ liaj okuloj tuj malfermiĝos.

Kaj Jozefo, metante manon sur sian koron tro forte batantan, diris : Ofte tiuj, kiuj maldormas apud mortintoj, kredas vidi ilin moviĝi.

Sed Nikodemo estis sidiĝinta kaj preninta Jesuon sur siaj genuoj. Kaj li diris, kiel iu, kiu volus krei pro ĝojo, sed scias, ke li ne devas krei : Li estas viva.

Kaj ili komencis flegi lin. Kaj Jesuo murmuris, kvazaŭ eligante el dormo : Tiel feliĉa mi estis : la homoj estis feliĉaj, kaj ilia feliĉo estis mia verko. Ĉu tio estis nur sonĝo ?

Sed Jozefo Arimatea diris al li : Ne parolu, majstro; ne lacigu cin. Ĉar ci pene eliras el la ombro de morto.

Kaj, post kiam ili faris al li la unuajn flegojn en la tombo, kiam la nokto estis densa, ili transportis lin ĝis en la domo de Nikodemo.

La sabatan matenon, Jozefo el Arimateo iris al la Esenoj, kiuj loĝis pli ol kvarmiloj en la najbaraĵo de la maro Morta,

Kaj kiuj amis Jesuon, tial ke li diradis preceptojn similajn al iliaj preceptoj, kaj liaj paraboloj estis blanke vestitaj kiel iliaj paraboloj.

Kaj li rakontis al ili ĉion, kio okazis en Jerusalemo, kaj diris, ke Jesuo estas daŭre vivanta kaj ne povas resti en Jerusalemo, time, ke li falos en la manojn de siaj malamikoj.

Kelkaj el la Esenoj revenis kun Jozefo Arimatea. Kaj, en la nokto, kiu finas la sabaton, ili transportis Jesuon inter siajn fratojn.

Sed Jesuo deziris, ke oni sciigu al liaj disĉiploj, ke li eskapis el la morto.

Tiel, du Esenoj venis al la tombo kaj reĵetis la ŝtonegon, kiun Jozefo Arimatea kaj Nikodemo estis starigintaj por fermi la tombon kaj malhelpi, ke iu vidu la tombon malplena.

Kaj ili restis sidantaj en la tombo por vidi, kio okazos, kaj diri al la unuaj venontoj la vortojn, kiujn Jesuo petis ilin diri.

Nu, kiam finiĝis la sabato kaj alvenis la mateno, Maria Magdalena, Johana edzino de Ĥuzo kaj Maria patrino de Joso venis al la tombo alportante aromaĵojn kaj parfumojn.

Kaj ili trovis, ke la ŝtonego de la tombenirejo estis flanken ŝovita.

Kaj ili eniris mirante, kun la koro plena je timo.

Kaj ili ne trovis en la tombo la korpon de Jesuo, sed tie estis du viroj kun vestoj blankaj kiel neĝo.

Tial ili estis pli kaj pli timigitaj, kaj ili klinis la vizaĝon al tero. Sed tiuj viroj diris al ili : Kial vi serĉas inter la mortintoj tiun, kiu estas inter la vivantoj ?

Li ja eliris el la tombo. Kaj li diris : Kiuĵ amas min, tiuj revenu en Galileon. Kaj tie ili vidis min.

Ĉar mi ne povas reiri en Jerusalemon, kie miaj malamikoj denove kaptus min.

Kaj, reveninte de la tombo, la virinoj rakontis al la Dek du ĉiujn tiujn aferojn.

Sed tio, kion la virinoj diris, ŝajnis al ili revaĵo, kaj ili ne kredis al tio.

Tamen Petro levigis kaj kuris al la tombo; kaj, kliniginte por rigardi, li vidis nur la mortotukon tere kuŝantan; poste li foriris, admirante en si mem la okazintaĵon.

Kaj li diris al la aliaj : Mi ja sciis, ke lia Patro venos helpi lin kaj eligos lin el la tombo. Ĉar li estas la Kristo, kaj, por doni al ni signon, li volis, antaŭ ol triumfi super la homoj, triumfi super la morto.

Kaj li volas, ke liaj malamikoj kredu lin enfermita en la tombo, por ke li surprizu ilin en ilia memfido kaj orgojlo,

Kaj ke li faligu ilin de pli alte en honton kaj morton.

Ĉapitro XXIII.

Jesuo diris al la Esenoj : Hieraŭ mi eraris, kaj necesas, ke mi reiru al Jerusalemo. Mi havas ion tie farendan por obei al mia koro.

Sed, ĉar ili timis por li pro liaj malamikoj, li promesis al ili, ke li ne iros al la Templo kaj ke li restos mallongan tempon.

Nu, Jesuo marŝis al Jerusalemo pensante pri Judaso, kaj li diris al si : Kredeble li suferas pli ol la aliaj, kaj eble nun li amas min.

Ĉar estis al li rakontite, kiel Judaso reportis al la ĉefpastroj la monon de l'perfido,

Dirante : Mi pekis fordonante la sangon de la Justulo. Sed ili respondis al li : Kiel grave por ni ? Estas je cia afero.

Tiam Judaso ĵetis la tridek arĝentajn monerojn sur la pavimon de la Templo kaj foriris.

Kaj, de tiu horo, li vagadis, eligante laŭtajn kriojn, en la Olivarba ĝardeno; kaj li prenis nenian nutr-aĵon, kaj li genuis sur la loko, kie li perfidis Jesuon per kiso,

Kaj li kisis la teron kaj ĝin surverŝis per siaj larmoj, kaj sur liaj lipoj estis la ŝlimo de konscienc-riproĉo.

Tial Jesuo pensis : Mi montras al li, ke mi estas viva, ke mi lin pardonas, kaj ke mi lin amas;

Por ke li havu la forton pardoni sin mem kaj denove sin ami.

Eble li, pleje suferanta, plejbone min komprenos. Eble li estas tiu, kiun mi savos.

Do, alveninte al la monto Olivarba, Jesuo ekvidis, ke Judaso ligis ŝnuron al arbobranĉo kaj tuj pendigos sin.

Kaj li kuris al li, kriante : Ho frato mia, mi ne estas morta, kaj estas neniu motivo, ke ci mortu.

Venu kisi min. Venu per nova kiso forigi la malnovan kison. Venu pardoni min, ke mi diras al ci : Mi cin pardonas.

Ĉar en la nuna momento mi ne scias aliajn vortojn por pacigi cin. Sed mi ne lasos cin, antaŭ ol mi estos cin resanigiĝta, kaj mi eltrovos la vortojn, kiuj pacigos cian koron.

Judaso, timigite, fuĝis antaŭ Jesuo, kiu marŝis al li malfermante la brakojn.

Kaj Judaso ne sciis, pro kio li fuĝas. Li timis vidi fantomon, kaj li timis vidi vivanton.

Kaj, regresante kun okuloj pligrandigitaj de teruro, li fuĝis la konsciencriproĉon kaj li fuĝis la pardonon.

Kaj Jesuo kriis al li : Fantomo mi ne estas; mi estas cia amiko, kiu cin amas.

Sed Judaso, pli timsovaĝa, fuĝis la amon.

Jesuo ankoraŭ kriis al li : Haltu, Judaso Iskariota, kaj turnu cin. Rigardu, kien ci estis falonta.

Kaj Jesuo, mem haltante, tremis pro la danĝero de Judaso.

Judaso, sin retroturnante, rigardis. Li vidis, ke tie estas abismo.

Tiam ekestis sur lia vizaĝo infera grimaco, sur ĝi estis fulmaj eklumoj kaj ŝtormaj ekombroj. Kaj liaj lipoj malfermiĝis por kruelega rido, simila al tondro en monta krutfendego.

Kaj, levante la brakojn, li saltis en la abismon.

Jesuo, kurante al la krutrando, vidis, ke Judaso falis en la fundon, resaltante sur akraj rokoj. Kaj lia ventro krevis je la mezo, kaj liaj intestoj elverŝiĝis.

Kaj Jesuo, kroĉante sin ĉe la rokoj, sin retenante ĉe la arbustoj kaj dornaĵoj, malsupreniris al Judaso.

Kaj Jesuo ne rimarkis, ke liaj manoj kaj liaj kubutoj kaj genuoj estas kovritaj de sango; sed, rigardante Judason, li vidis, ke Judaso estas ĉesinta vivi.

Kaj li sidiĝis plorante apud la mortinto, kiun li estis volinta savi. Kaj li restis tie longe, pensante : Neniam mi sukcesis iun savi.

Tamen, kiam la okazo denove sin prezentos, mi ankoraŭ provos savi. Ĉar kiu ne faras ĉion, kion li povas por savi siajn fratojn, ne savas sin mem.

Kaj li forpelis per paroloj de saĝo la demonojn de la melankolia kompatemo, kiuj volis sidiĝi en lia koro.

Kelkajn tagojn poste, Jesuo iris en Galileon por vidi, ĉu la disĉiploj nun komprenos lian parolon.

Sed ili komprenis ĝin malpli ol iam ajn. Ĉar lia triumfo super la morto ebriigis ilin, kiel tro forta vino ebriigas infanojn.

Kaj ili diris strangajn frenezaĵojn. Kaj, kiam Jesuo volis klarigi al ili la simplecon de la vero,

Ili respondis : Ĉiam ci parolas al ni laŭ kaŝa maniero, kaj neniam ci rakontas al ni cian gloron.

Ci estas suno, kiu sin envolvas en nuboj. Sed la nuboj ne trompos nin plu, ĉar unu tagon ni vidis la sunon.

Kaj, se li diris al ili : Mi estas homo simila al la aliaj, krom tio, ke mi havas la forton kaj la malforton ami,

Ili respondis : Ci estas la Kristo, kaj ci ne opinias, ke venis la horo por diri al ni : Mi estas la Kristo. Ci ĉiam anoncas la provadon, neniam la rekompencan.

Sed nia kredo estas granda, kaj vane ci provas nin. Ci anoncis al ni, ke ci mortos, kaj ci ja mortis, ĉar ci ne scipovus mensogi.

Sed ci ne anoncis al ni, ke ci reviviĝos el inter la mortintoj.

Tiel ci ĉiam diras nur la duonon de la aferoj. Sed nun ni konas la alian duonon per la okuloj de la kredo.

Jesuo, vidante, ke de tiuj malsaĝuloj estas esperebla nenia inteligento, benis ilin kaj foriĝis, malrapide suprenirante sur monton.

Kaj li malpermesis, ke ili lin sekvu, dirante : Necesas, ke mi supreniru sola en mian Regnon; kaj neniu el vi povas veni hodiaŭ kun mi.

Sed petu vian Patron, ke li sendu al vi la mensan kapablon. Strebu kompreni miajn vortojn kaj kompreni vian koron.

Tiam ankaŭ vi supreniros en la Regnon.

Sed, plene turnate al ekstero, ili neniam sciis, kio estas la Regno kaj kio estas supreniri.

Tial ili ne komprenis la lastajn vortojn de sia Mastro.

Nu, kiam Jesuo estis de kelka tempo suprenirinta, preter la monto leviĝis vaporo;

Tiel, ke baldaŭ estis nubo inter la disĉiploj kaj li. Kaj tiu nubo, bela kaj glora, ŝajnis portata sur flugiloj de lumo.

Kaj, ne vidante plu Jesuon, la disĉiploj kredis, ke li altiĝis en la ĉielon, kie li sidiĝis dekstre de la Patro, kaj de kie li revenos por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.

Ĉapitro XXIV.

Nu, Jesuo retiriĝis en la dezerton. Kaj li diris al si mem : Mi ne povas plu paroli al la homoj, tial ke mi staras tro fore de ili;

Mi staras sur la alta monto, kaj mia voĉo ne plu venas ĝis ilia valo.

Kaj mi ne povas malsupreniri. Ĉar kiu malsupreniras, tiu malfeliĉiĝas, kaj malsupreniri estas ofero, kiu ĉiam restas neutila.

Se mi irus diri al ili, kion oni vidas sur la supro

de l'monto, tiuj, kiuj ne havas orelojn por la vortoj de la monto, aŭdus vortojn de la ebenaĵo.

Kaj, kiam mi laŭdus la Dian blankon de la neĝo, tiam la blanko, kiun ili vidus per la okuloj de sia spirito, estus simila al la blanko de iliaj tomboj.

Kaj, se mi instigus kelkajn el ili resupreniri kun mi, ili trenus post miaj paŝoj la pezon de la deziroj kaj de la esperoj de la ebenaĵo. Kaj ili plorus pro la malvarmo kaj la vento de la suproj.

Ili dezirus rikolti la neĝokampojn, kaj, vidante siajn manojn malplenaj kaj frostrigidaj, ili riproĉus min : Kial ci kondukis nin en ĉi tiujn lokojn, kie oni ne rikoltas la malsupran grenon, kaj kie oni ne kolektas la malsupran vinberon ?

Kiam Jesuo malsatis, li manĝis kelkajn radikojn aŭ kelkajn sovaĝajn berojn, aŭ iafoje li iris ĉe la Esenojn.

Li eniris dirante : Paco kun vi. Li diris ankaŭ : Mi amas vin, tial ke vi amas unuj la aliajn.

Sed baldaŭ ili malplaĉis al li, tial ke ili estis, kiel Johano la Baptisto, malamikoj de ĝojo kaj amikoj de pentofarado; tial ke ili celebris la sabaton kun solena rigoro; tial ke ili kredis, kiel la Fariseoj, pri la efiko de puriĝadoj;

Kaj tial ke ili serioze elparolis la nomojn de la anĝeloj, imagante, ke ili posedas en ĉiu el tiuj nomoj trezoron de scienco kaj potenco.

Li ne mallaŭdis ilin, ĉar ili amis la pacon kaj malŝatis la riĉaĵojn. Sed li diris al si mem : Ili fariĝis infanetoj kaj eniris en la Regnon.

Sed ili malfermis nur unu el la klapoj de la pordo de l'Regno : ili eniris tra la vojo de simpleco kaj bonvolo.

Kaj ili ne scipovis malfermi la alian flankon de la pordo, la flankon, kiu malfermiĝas sur la vojo de inteligento.

Koncerne min, mi eniris en la Regnon apenaŭ duonmalfermante ambaŭ klapojn, kaj mia korpo kaj mia koro frotvundiĝis ĉe la mallarĝa aperturo.

Sed mia spirito konas ambaŭ dornajn vojetojn, kiuj kondukas al la pordo, kaj ambaŭ reĝajn vojojn, kiuj plilarĝiĝas, kiam la pordo estas trapasita.

Tial ankaŭ mi eniris en la Regnon simila al infaneto.

Sed mi grandiĝis inter ĝojoj, kiujn ili ne konas kaj inter doloroj pli altvaloraj ol ĉiuj ĝojoj.

Kaj ili ne povas grandiĝi.

Kaj mi ne provu kuntreni ilin tra mia vojo : tie ili renkontus tro da rokoj kaj tro da ŝtormoj; kaj ili ne havus la forton necesan por altiĝi super la fulmotondroj, ĝis la supro de la malvarma ĝojo.

Kaj ili plorus, senmovaj kaj frostrigidaj; kaj ili jam ne kuraĝus reeniri en la Regnon tra la pordo de la infanoj.

Kaj la Esenoj amis Jesuon.

Sed ilia amo estis plena de maltrankvilo. Malgraŭ tio, kio estis inter ili frateca, kvankam ili estis apartigitaj de la homoj per komunaj virtoj,

Ili sentis lin malproksima, kaj ke liaj vortoj, similaj al iliaj vortoj, kovras malsaman silenton.

Tial, kiam li venis, ili akceptis lin, sed, kiam li volis foriri, ili ne retenis lin.

Iafoje Esenoj revenantaj de Jerusalemo renkontis Jesuon en la dezerto aŭ inter la fratoj. Kaj ili rakontis al li la parolojn kaj la agojn de Jakobo lia frato, de Petro, de Johano kaj de la ceteraj.

Kaj ili kredis lin ĝojigi, dirante al li kiel altiĝis kaj grandiĝis la sinagogo, kiun li konstruis. Kaj ili asertis : Ĝi ĉirkaŭprenos la tutan teron kaj altiĝos ĝis la ĉielo.

Sed li ne ĝojis, tial ke Jakobo lia frato, Johano, Petro kaj ceteraj ne komprenis la flirtantan mildecon de lia parolo.

Kaj ili predikadis la respekton al la Leĝo, kiun li venis detruigi, kaj ilia doktrino preciziĝis kiel muro de malliberejo altiĝanta al la ĉielo kaj kaŝanta la ĉielon.

Kaj Jakobo lia frato iradis dirante : afliktigu vin mem; estu en funebro kaj en larmoj. Via rido ŝanĝigu en plorojn kaj via ĝojo en malgajecon.

Tial, kiam iu Eseno parolis al Jesuo pri Jakobo lia frato, Jesuo respondis, skuante la kapon : Mi ŝanĝis en vinon la akvon de Johano;

Sed mia frato ne kredas al mi, kaj el mia plejbona vino, jen li refaras akvon.

Kaj Jesuo eksciis pri la unuaj disiĝoj kaj la unuaj persekutoj de lia sinagogo, aŭ, kiel jam diris kelkaj

helenistoj, de lia eklezio.

Kaj li eksciis pri la morto de Stefano, unua atestanto pri la eraro, kiu disvastiĝis sub lia nomo; kaj li sciis, ke la vortoj de Stefano estis elokventaj kaj torentaj kiel frenezo indignanta kontraŭ alia frenezo, kaj lia morto kuraga kiel blindeco kaj obstino.

Li eksciis ankaŭ, ke Saŭlo, disĉiplo de Gamalielo, gardis, dum Stefano estis premegata sub la ŝtonoj, la vestojn de la murdantoj, kaj ke li konsentis pri la morto de Stefano.

Jesuo rememoris, ke iam, en la Templo, li aŭdis Saŭlon paroli favore al la Leĝo kun la krudeco de animo, kiu hezitas kaj sin trudas,

Kaj kiu malespere kaptopremas sian parolon de hazardo, samkiel dronanto ekpremas tion, kion renkontas lia mano.

Li pensis : Tiu serĉas senscie, kaj eble li komprenus.

Kaj li proksimiĝis al Jerusalemo por ekkoni ĉion, kion faros Saŭlo.

Nu, Saŭlo ruinigadis la sinagogon de la disĉiploj, kaj, enirante en la domojn, li perforte eltiris la virojn kaj la virinojn kaj metigis ilin en malliberejon.

Kaj fine, elspirante nur minacojn kaj buĉadojn, li iris al la pastroprinco,

Kaj petis de li leterojn por la sinagogoj de Damasko, por ke, se tie troviĝas kelkaj personoj el la sekto, viroj aŭ virinoj, li konduku ilin katenitajn al Jerusalemo.

Do Jesuo lin atendis sur la vojo al Damasko, kaj, subite sin prezentante antaŭ li, diris al li : Saŭlo, filo de Gamalielo; vinagro, filo de vino, kial ci persekutas min ?

Saŭlo ekstremis kaj respondis : En mia karno estas pikilo, kiu incitas min kaj igas min kruela kiel taŭro de tabano pelata.

Sanigu min do, Majstro, se ci povas; kaj eble tiam mi fariĝos bona.

Jesuo diris al li : Se ci volas, mi povas sanigi cian menson kaj cian koron.

Saŭlo respondis : Mi volas. Kaj li plie diris : Sinjoro, kiun mi vidis morti sur la kruco, nun mi vidas cin

vivan, kaj mi ekkonas la veron, kiun proklamis ciaj dis-
 ĉiploj, kaj mi agnoskas, ke ci estas la Kristo.

Sed Jesuo diris : La Kristo ne estas homo. Nenio es-
 tas pli senpova ol homoj.

La Kristo estas Vorto. La Vorto fariĝos potenca, se
 iam estos oreloj por ĝin aŭdi.

Saŭlo, estu hodiaŭ malfermiĝanta orelo, por ke ci es-
 tu morgaŭ parolanta lango. Aŭdu la Vorton kaj ripetu ĝin.
 Iru kaj diru ĉie, kie ci renkontos homojn : Amu unuj la
 aliajn.

Iru kiel manĝeganta fajro; detruu kaj forbruligu ĉion,
 kio ne estas amo. Ĉar ĉio, kio ne estas amo, estas baro
 kontraŭ amo.

Iru kaj detruu la karnan cirkumcidon; ĉar ĝi forges-
 igas la koran cirkumcidon, kiu estas amo.

Iru kaj detruu la Leĝon, malamikon de amo kaj krea-
 ton de peko. Ĉar vere, mi diras al ci, la sola rimedo
 por detruo la pekon estas detruo la Leĝon.

Kaj Jesuo foriris, lasante Saŭlon tute emociitan de
 novaj pensoj.

Sed Saŭlo estis misaŭdinta. Ĉar, anstataŭ aŭskulti,
 li revis : Jen, la Kristo venkis la morton.

Kaj lia venko estas, por ĉiuj, kiuj kredos, promeson
 pri venko. Mia korpo reviviĝos, kiel lia korpo reviviĝis,
 kaj eble mi ne mortos.

Tial, anstataŭ amon prediki, Saŭlo predikis pri Kris-
 to, unuenaskito el inter la mortintoj kaj promeso pri re-
 viviĝo por kiu ajn kredos al li.

Iafoje okazis, ke li, kiel ĉiuj parolantoj al popolo,
 proklamis amon, dirante, ke amo estas ĉio.

Sed tio estis malplenaj paroloj, por momento lin mem
 trompantaj pri la vero de lia koro. Ĉar li, sklavo de
 kruda kredo kaj de kruda espero, ne konis la liberajn
 profundojn de amo.

Kaj li estis sonora cimbalo, ĉirkaŭ kiun svarme grup-
 iĝas abelaroj.

Kaj, sub la nomo libero, li starigis novan servutecon.
 Ĉar anstataŭ la servuteco de la manoj li starigis la
 servutecon de la spiritoj;

Kaj se li detruis la kredon al la Leĝo, tio estis por
 konstrui la leĝon de la Kredo.



Tabelo de enhavo

vvvvvvvvvvvvvvvv

Antaŭparolo	...	3
Ĉapitro I	...	5
Diversaj Kristoj - Anonco pri koncipado de Johano.		
Ĉapitro II	...	9
Maria kaj Pantero - Anonco pri koncipado de Jesuo - Kantiko de Pantero - Morto de Pantero - Vizito de Maria - Kantiko de Elizabeta Naskiĝo de Johano - Kantiko de Zeĥarĵo		
Ĉapitro III	...	15
Konscienciproĉoj kaj decido de Jozefo - Maria kaj Jozefo - Sonĝo de Jozefo - Sonĝo de Maria - Adorado de la Magoj - Masakro de la Senpekuloj - Fugo en Egiption - Prezento en la Templo - Vortoj de maljunulo Simeono Unua pasko de Jesuo - Unua renkonto kun Judaso - Infano Jesuo kaj la Doktoroj - Unua renkonto kun Barabaso		
Ĉapitro IV	...	25
Predikado de Johano - Jesuo baptata - Jesuo en la profundoj de l'dezerto - La Akrido kaj la Araneo - Aliaj tentoprovoj al Jesuo - Jesuo forĵetas la fastadon		
Ĉapitro V	...	32
Johano en karcerro - Alvokiĝo de la unuaj disĉiploj - Nupto en Kanao		
Ĉapitro VI	...	35
Vendistoj forpelataj de la Templo - Jesuo konfesas sian kulpon - Interparolo kun Nikodemio - Reiro en Galileon - Interparolo kun la Samarianino		
Ĉapitro VII	...	39
Predikado en Nazareto - La demonhavanto en Kapernaumo - La bopatrino de Simon-Petro		
Ĉapitro VIII	...	42
Homkaptistoj - La fiŝkaptado de Simon-Petro		

Jesuo kaj la Skriboj - La paralizulo - Al-
vokiĝo de Mateo - La manĝo de Mateo - Jesuo
parolas kontraŭ la oferojn - Jesuo
parolas kontraŭ la fastadon - Paraboloj pri
la malnova vesto kaj pri la nova vino

Ĉapitro IX ... 46

Parolado pri la Sabato - Elektiĝo de la Dek
du - La patrino kaj la fratoj de Jesuo

Ĉapitro X ... 49

La Parolado sur la ebenaĵo - Kontraŭparolo
de Eleazaro - La popolo sekvas Eleazaron -
La Parolado sur la monto - Kial ŝanĝiĝis la
parolo de Jesuo - La Feliĉpromesoj - La Le-
ĝo kaj la justeco - La paco - Ami siajn
malamikojn - La veraĵidoj de la Patro

Ĉapitro XI ... 56

Sekvo de la Parolado sur la monto - Kiel
oni devas preĝi - Ne servi du mastrojn - Ne
zorgi pri la morgaŭo - Ne juĝi - La pajlero
kaj la trabo - Resumo pri la Leĝo - La bona
arbo kaj la malbona - La domo konstruita
sur roko kaj la domo konstruita sur sablo -
Karaktero de la instruo de Jesuo

Ĉapitro XII ... 59

Kristo Eleazaro kaj Kristo Simono - Parabolo
pri la Lambastonoj - La senditoj de Johano
La manĝo ĉe Simono - Maria Magdalena

Ĉapitro XIII ... 64

La akompanantoj de Jesuo - Ŝtormo sur la
lago - Moseo kaj la Kristo - Aliaj promesoj
de la Skribo - Jesuo parolas kontraŭ la mi-
raklojn - Kio estas la Kristo - Parabolo
pri la Semanto - Niaj veraĵmalamikoj - Pa-
rabolo pri tritiko kaj lolo - La vojaĝanto
Parabolo pri la Loĝanto sur dezerta insulo

Ĉapitro XIV ... 70

Paraboloj pri la Trezoro kaŝita kaj la faj-
na Perlo - Krudeco de Petro - Petro volas
marŝi sur la akvoj - Misio de la Dek du

- Ĉapitro XV ... 75
 Herodo volas mortigi Jesuon - Senkapigo de Johano - La Kristo homo de doloro - Parabolo pri la Birdoj de l'ĉielo - Jesuo nutras kvin mil homojn - La filino de la Kanaanidino
- Ĉapitro XVI ... 81
 Jesuo malestimas la tradiciojn - En kio oni devas legi la Leĝon - Kio malpurigas la homon - Parabolo pri la Vazo plena de nutraĵo - Parabolo pri la Lampo kaj la Sunradio - Lasu la mortintojn entombigi siajn mortintojn - Eraro de Simon-Petro
- Ĉapitro XVII ... 88
 La transfigurigo - Fariĝi simila al infano - Ĉiam pardoni - Parabolo pri la Malica Suldanto - Kiu estas mia proksimulo - Parabolo pri la Bona Samaritano - Mensogoj en la Skriboj -
- Ĉapitro XVIII ... 95
 Jesuo rifuzas juĝi - Parabolo pri la Manaĵo - La mallarĝa vojo - Jesuo anoncas pri la neceso de sia morto
- Ĉapitro XIX ... 99
 Diversaj paraboloj - Kio estas la Regno - La adulta virino - Vortoj sur sablo skribitaj - La riĉuloj kaj la Regno - Parabolo pri la Riĉulo kaj Lazaro - Parabolo pri la Laboristoj de la vinberejo - Peto de la patrino de la filoj de Zebedeo - La blinduloj el Jeriĥo
- Ĉapitro XX ... 106
 Eniro en Jerusalemon - Reiro al Betanio - Revivigo de Lazaro - Interparolo de Jesuo kaj Eleazaro - Diskuto en la Templo kun la pastroj - Kio venas de Cezaro, kaj kio venas de Dio - Parabolo pri la Lando, de kiu nin apartigas rivero - Malgajeco de Jesuo - Du Eternuloj - Paraboloj pri la Homo, kiu amis sian filon pli ol sian patron - Parabolo pri la Trezoro kaŝita malantaŭ la Skriboj - Judaso duafoje frapas Jesuon

Ĉapitro XXI ... 117

Perfido de Judaso - Jesuo kaj Natanaelo savas Judason - La Manĝo - Parolo de Jesuo pri pano kaj vino - Jesuo sur la monto Olivarba
Jesuo preĝas al la Patro - Jesuo preĝas al la Filo - Jesuo arestata - Jesuo ĉe la pastroprinco - Malkonfeso de Petro

Ĉapitro XXII ... 123

Jesuo antaŭ Pilato - Jesuo savas Barabason - Jen la homo! - Songo de Prokula - Jesuo rifuzas vinon kun mirho - Jesuo krucumita - Vortoj de pardono - La Parolado pli alte ol sur la monto - Vortoj de la Centestro - Jesuo en la tombo - La virinoj, kiuĵ sekvadis Jesuon, vizitas la tombon - Petro vizitas la tombon

Ĉapitro XXIII ... 131

Malespero kaj morto de Judaso - Jesuo en Galileo - La Ĉieliro

Ĉapitro XXIV ... 134

Soleco de Jesuo - Jesuo kaj la Esenoj - Jesuo kaj lia Eklezio - Jesuo aperas antaŭ Saŭlo sur la vojo al Damasko.



Broŝurservo de SAT
La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut

En la sama serio :

La aperoj de Ahasvero (Han Riner)
Atomcentraloj (R. Levreaud)
Adamaĵoj (Lanti)
Antropogenezo (Pannekoek)
Abundo kaj konsumsocio (Duboin/Berthier)
Anarkio kaj organizo (Malatesta)
Argentina novelaro (du kajeroj)
La bazoj de anarkiismo (Balkanski)
La blankaj gardistoj (Heiligstein)
Civila malobeemo (Thoreau)
Durruti, simbolo de la hispana revolucio
Esperanto or English ? (Masson)
Espéranto de poche (franc.)
Esperanto en 24 paĝinas (hisp.)
Esperanto su 24 pagine (ital.)
Etiko I (Kropotkin)
La forto de la fortaj (J. London)
Fronte al la vivo (Krishnamurti)
La homa animo sub socialismo (O. Wilde)
Historia materiismo (Pannekoek)
Humanitaristaj principoj (E. Relgis)
Individuismo en Antikveco (Han Riner)
Initiation à l'Espéranto (An Kaù)
La parlamentisma iluzio (Laisant)
Individuisma manlibreto (Han Riner)
Jen la Dio ! (B.G.D.)
Kontraŭflue (Valo)
...el la kara infaneco (Valo)
Katastrofplano (Fessenheim - Wyhl)
Lingvaj anguloj (Baronnet)
La laborista esperantismo (Lanti)
Linguistique et non-violence (Masson)
La liberecana penso
Liberecanaj vivkonceptoj (Fontaura)
La ingenia hidalgo Miguel Cervantes (Han Riner)

La mistero de nia surtera ekzisto (Archdeacon)
La migrantoj en Francio nuntempe (de Cazenove)
Memvola servuto (La Boétie)
Mia vivo. Artikolaro. Poemaro (Bartelmes)
Naciecaj problemoj (Roza Luksemburg)
Manlibro de nova homo (Rufegon)
Ne mortigu! (Tolstoj)
Nekombitaj pensoj (SJ.Lec)
Neperforta revolucio (T. Ebert)
Parabolo pri la cisterno (E. Bellamy)
La rajto de pigro (P. Lafargue)
Pri la esperanta literaturo (Laval)
Por nia medito (Han Riner/Alain)
Politika neperforto (M.A.N.)
Por la paco (citaĵoj)
Prognozo (novelaro el la pola)
La piramido de l'tiranismo (Domela Nieuwenhuis)
Revolucia registaro kaj aliaj tekstoj ;
La Pariza Komuno (Kropotkin)
La rentumo, kiun ni pagas (W. Schmid)
Du rêve à la réalité : l'espéranto (Masson)
Rido sanigas ! (J. Burger)
Sepdek jaroj sub la verda stelo (Valo)
Sindikatismo - Sovetoj (Pannekoek)
Tabakismo kaj emancipiĝo (Masson)
La triviala homo (Ingenieros)
Tiu, kiu ne volas morti (J. Rostand)
Tra la mondo per biciklo (Alfa-Beta)
La veraj interparoloj de Sokrato (Han Riner)
Vivi en komunumo (M. Schneller)
El verkoj de Lanti
El verkoj de Leo Tolstoj